


**LA POŜTO DE
DOKTORO DOLITTLE**

DE

HUGH LOFTING

TRADUKITA DE

DONALD BROADRIBB



la origina titolpaĝo



LA POŜTO DE DOKTORO DOLITTLE

DE

HUGH LOFTING

TRADUKITA DE

DONALD BROADRIBB

Dato de la originala anglalingva verko: 1924

Dato de la esperantolingva traduko: 2005

© traduko Donald Broadribb 2006

La teksto estis kompostita per iMac

Programo uzita: Mellel

Tiparo: Palatino Linotype 14 pkt. sur 16.8 pkt.

La Poŝto de Doktoro Dolittle

La Poŝto de Doktoro Dolittle

ANTAŬPAROLO

Preskaŭ la tuta historio de la poŝto de Doktoro Dolittle okazis dum li revenis de vojaĝo al okcidenta Afriko. Tial mi komencos (tuj post nelonga klarigo pri kial li faris la vojaĝon) de la punkto kiam li returnis sian ŝipon hejmen kaj ekvelis al Puddleby-sur-la-Marĉo.

Iom da tempo antaŭe, la puŝumi-tiruvio, post longa restado en Anglujo, iom nostalgiis al Afriko. Kaj kvankam li multe amis la Doktoron kaj neniel volis forlasi lin por ĉiam, unu vintran tagon kiam la vetero estis nekutime malvarmega kaj malagrabla li demandis al li ĉu li bonvolos veturi al Afriko por feriado — nur por unu aŭ du semajnoj.

La Doktoro volonte konsentis ĉar li jam de kelka tempo ne faris vojaĝon kaj li sentis ke ankaŭ li bezonas iom alian veteron ol la malvarmajn decembrajn tagojn de Anglujo.

Do li ekiris. Krom la puŝumi-tiruvio li kunprenis Dab-Dabon la anason, Jipon la hundon, Gub-Gubo la porkon, Tu-Tuon la strigon, kaj la blankan muson — la sama afabla grupo kiu estis kun li dum lia aventuroplena reveno de la Lando de la Simioj. Por ĉi tiu vojaĝo la Doktoro aĉetis malgrandan velboaton — tre malnovan kaj veterbatitan kaj eluzitan, sed bonan bonstatan boaton por malbona vetero.

Ili forvelis al la suda bordo de la Golfo de Benino. Tie ili vizitis multajn afrikajn regnojn kaj strangajn tribojn. Kaj dum ili estis surtere la puŝumi-tiruvio havis oportunon vagadi libere tra siaj malnovaj paŝtejoj. Kaj li plene ĝuis siajn feritagojn.

Unu matenon ĝojigis la Doktoron revidi siajn malnovajn amikojn la hirundojn denove grupiĝi ĉirkaŭ lia ankrita ŝipo por sia ĉiujara flugo al Anglujo. Ili demandis lin ĉu ankaŭ li reiras; ĉar se jes, ili diris, ili akompanos lin, same kiel kiam li eskapis de la Regno Ĵoliginkiujo.

Ĉar la puŝumi-tiruvio nun estis tute preta foriri, la Doktoro dankis la hirundojn kaj diris al ili ke lin plezurigos ilia akompanado. Tiam dum la cetero de tiu tago estis multaj hasto kaj okupiĝado, dum provianto por la ŝipo estis akirata kaj oni preparis sin por la longa reiro al Anglujo.

Jam la sekvan matenon ĉio estis preta por vojaĝo sur la maro. La ankro estis levita kaj kun ĉiuj veloj levitaj la ŝipo de la Doktoro moviĝis norden antaŭ favora vento. Kaj de tiu punkto komenciĝas mia rakonto.

PARTO I

Unu matenon de la unua semajno de la reira vojaĝo dum Johano Dolittle kaj liaj bestoj sidis matenmanĝante ĉirkaŭ la granda tablo en la kajuto unu el la hirundoj descendis kaj diris ke li volas paroli kun la Doktoro.

Johano Dolittle tuj foriris de la tablo kaj eliris en la koridoron kie li trovis la ĉefhirundon mem, tre neta, eleganta, malgranda birdo, kun tre longaj flugiloj kaj akraj precizemaj nigraj okuloj. Rapidulo-la-Tanĝema li nomiĝis — nomo vere fama tra la tuta plumhava mondo. Li estis la ĉampiona muŝkaptisto kaj aerakrobato de Eŭropo, Afriko, Azio, kaj Ameriko. Dum multaj jaroj ĉiusomere li venkis en ĉiuj flugkonkursoj, kaj la pasintan jaron mem li superis sian propran rekordon per sia transiro de Atlantiko en dek unu kaj unu horoj — rapido egala al pli ol 322 kilometroj hore.

“Nu, Rapidulo”, diris Johano Dolittle. “Kio ĝenas?”

“Doktoro”, diris la malgranda birdo per mistera flustro, “ni rimarkis kanuon proksimume du kilometrojn antaŭ la ŝipo kaj iomete oriente, en kiu estas nur nigra virino. Ŝi ploras amare kaj tute ne pagajas la kanuon. Ŝi estas plurajn kilometrojn for de la tero — almenaŭ dudek, mi taksas — ĉar nunmomente ni transiras la Golfon de Fantipo kaj povas nur malfacile vidi la bordon de Afriko. Ŝi estas en vera danĝero, tiom for de la tero en tiel malgranda boato. Sed ŝajnas ke ne gravas al ŝi. Ŝi nur sidas en la kanuo, plorante kvazaŭ ne gravas al ŝi kio okazos al ŝi. Bonvolu veni paroli kun ŝi, ĉar ni timas ke io grava afliktas ŝin”.

“Bone”, diris la Doktoro. “Flugu nerapide al la loko de la kanuo kaj mi stiros la ŝipon por sekvi vin”.

Do Johano Dolittle iris sur la ferdekon kaj stirante la boaton sekvante la gvidantajn hirundojn li baldaŭ vidis malgrandan obskuran kanuon leviĝi kaj malleviĝi sur la ondoj. Ĝi aspektis tiom eta sur la larĝa faco de la akvo ke oni povus kredi ĝin ŝtipo aŭ bastoneto — aŭ, efektive, tute ne rimarki ĝin, krom se oni estus sufiĉe proksima por vidi ĝin. En la kanuo sidis virino kun sia kapo klinita sur siajn genuojn.

“Kio ĝenas?” kriis la Doktoro, tuj kiam li estis sufiĉe proksima por aŭdigi sin al la virino. “Kial vi venis tiom malproksime de la tero? Ĉu vi ne scias ke estus granda danĝero se ekŝtormus?”

Nerapide la virino levis sian kapon.

“Foriru”, diris ŝi, “kaj lasu min lamenti. Ĉu vi blankuloj ne jam sufiĉe misagis al mi?”

Johano Dolittle stiris la boaton pli proksimen kaj plu parolis al la virino afable. Sed ŝi ŝajnis dumlonge malfidi lin ĉar li estas blankulo. Tamen iom post iom la Doktoro fidigis ŝin kaj fine, ankoraŭ plorante amare, ŝi rakontis sian historion al li.


En tiu tempo, sciu, la sklaveco estis nuligata. Kapti, aĉeti aŭ vendi sklavojn estis efektive plej severe malpermesita de la plej multaj Registaroj. Sed certaj fiuloj ankoraŭ sekrete venis al la okcidenta bordo de Afriko kaj kaptis aŭ aĉetis sklavojn kaj forprenis ilin en ŝipoj al aliaj landoj por laborigi ilin en koton- kaj tabak-kultivejoj. Kelkaj afrikaj reĝoj vendis militkaptitojn al ili kaj tiel gajnis multan monon.

Nu, tiu virino en la kanuo estis ano de tribo kiu estis militinta kontraŭ la Reĝon de Fantipo — afrika regno situanta sur la bordo apud kiu la hirundoj vidis la kanuon.

Kaj en tiu milito la Reĝo de Fantipo kaptis multajn personojn, inter ili estis la edzo de la virino. Nelonge post la fino de la milito kelkaj blankuloj haltis ĉe la Regno Fantipo por provi aĉeti sklavojn por tabak-kultivejoj. Kaj aŭdinte kiom da mono ili konsentas pagi por nigraj

sklavoj la reĝo decidis vendi al ili la homojn kaptitajn en la milito.

La virino nomiĝis Zuzano kaj ŝia edzo estis tre forta kaj belaspekta viro. La Reĝo de Fantipo pro tio retenus la edzonde



Zuzano, ĉar al li plaĉis havi fortulojn en sia kortego. Sed la sklavistoj ankaŭ volis fortulojn ĉar ili povas multe labori ĉe la kultivejoj. Kaj ili proponis al la Reĝo de Fantipo tre altan prezon por la edzo de Zuzano. Kaj la reĝo vendis lin.

Zuzano parolis al la Doktoro pri kiel ŝi estis sekvinta la ŝipon de la blankuloj tre longe en kanuo, petegante ilin redoni ŝian edzon. Sed ili nur mokis ŝin kaj plu veturis. Kaj ilia ŝipo baldaŭ ne plu estis videbla.

Tial, ŝi diris, ŝi malamas ĉiujn blankulojn kaj ne volis paroli al la Doktoro kiam li vokis al ŝia kanuo.

La Doktoro koleregis aŭdinte la historion. Kaj li demandis al Zuzano antaŭ kiom da tempo la ŝipo de la sklavistoj portanta ŝian edzon estis foririntaj.

Ŝi diris ke antaŭ duono de horo. Sen ŝia edzo, ŝi diris, la vivo havas neniun signifon por ŝi, kaj kiam la ŝipo forpasis el ŝia vido, ŝi ekploris kaj nur lasis la kanuon drivi, ĉar al ŝi eĉ ne restis sufiĉa espero por repagaji al la bordo.

La Doktoro diris al la virino ke negrave kiom malfacile estis, li helpos ŝin. La Doktoro fervore deziris rapidigi sian ŝipon kaj tuj persekuti la sklavboaton. Sed Dab-Dabo la anaso avertis lin ke lia ŝipo estas tre malrapida kaj ke ĝiajn velojn povus facile vidi la sklavistoj, kiuj neniel lasus ĝin proksimiĝi.

Do la Doktoro mallevis sian ankron kaj, lasante la ŝipon en ĝia pozicio, eniris la kanuon de la virino. Tiam, vokinte la hirundojn por ke ili helpu gvidi lin, li ekiris norden laŭ la bordo, rigardante en ĉiujn golfojn kaj malantaŭ ĉiujn insulojn por trovi la sklavŝipon kiu prenis la edzon de Zuzano.

Sed post multaj horoj da senrezulta serĉado la nokto komenciĝis, kaj la gvidantaj hirundoj ne plu povis vidi longadistance, ĉar mankis luno.

Povra Zuzano rekomencis larmi kiam la Doktoro diris ke li devos halti por la nokto. “Je la matena krepusko”, diris ŝi, “la ŝipo de la fiaj sklavistoj estos multajn kilometrojn for kaj mi neniam rehavos mian edzon. Ve! Ve!”

La Doktoro konsolis ŝin laŭeble, dirante ke se li malsukcesos li akiros por ŝi novan edzon egale bonan. Sed ŝajne malplaĉis al ŝi tiu ideo kaj ŝi nur plu ploradis, “Ve! Ve!”

Ŝi tiom bruegis ke la Doktoro ne povis endormiĝi sur la planko de la kanuo — kiu, verdire, ne estis tre komforta. Kelkaj el la hirundoj ankoraŭ estis kun li, sidante sur la rando de la kanuo. Kaj la fama Tanĝemulo, la ĉefo, ankaŭ estis tie. Ili kaj la Doktoro estis diskutantaj kion ili povos fari, kiam subite la Tanĝemulo diris, “Ĉit! Rigardu!” kaj indikis okcidenten trans la senluma ondanta maro.

Eĉ Zuzano ĉesis plori kaj turnis sin por rigardi. Kaj tie, tre malproksiman sur la apenaŭ videbla nigra horizonto de la maro, ili povis vidi malgrandan lumon.

“Ŝipo!” kriis la Doktoro.

“Jes”, diris Rapidulo, “tio estas ŝipo, tute certe. Mi demandas al mi ĉu ĝi estas alia sklavŝipo”.

“Nu, se ĝi estas sklavŝipo, ĝi ne estas tiu kiun ni serĉas”, diris la Doktoro, “ĉar ĝi estas malĝustadirekta. Nia ĉasata ŝipo iris norden”.

“Aŭskultu, Doktoro”, diris Rapidulo-la-Tanĝema, “lasu min flugi al ĝi kaj vidi kia ŝipo ĝi estas kaj poste reveni kaj informi vin. Kiu scias? Eble ĝi povos helpi nin”.

“Bone, Rapidulo. Dankon”, diris la Doktoro.

Do la Tanĝemulo forrapidis en la mallumon cele la lumeton tre malproksiman sur la maro, dum la Doktoro demandadis al si kiel statas lia propra ŝipo kiun li estis lasinta plurajn kilometrojn sude laŭ la marbordo.

Post la forpaso de dudek minutoj Johano Dolittle komencis maltrankviliĝi, ĉar la

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Tanĝemulo, pro sia rapidego, devus estis irinta kaj reveninta antaŭ longe.

Sed baldaŭ perflugila flirto la fama ĉefo bele cirkliris kaj descendis, malpeze kiel plumo, sur la genuon de la Doktoro.



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Nu”, diris Johano Dolittle, “kia ŝipo ĝi estis?”

“Ĝi estas granda ŝipo”, anhelis la Tanĝemulo, “kun tre altaj mastoj kaj, laŭ mia takso, rapida. Sed ĝi velas ĉidirekte kaj ĝi velas tre zorge, timante, mi supozas, malprofundaĵojn kaj subsurfacan sablon. Ĝi estas tre bela ŝipo, tute eleganta kaj nova. Kaj estas grandegaj pafiloj — kanonoj — rigardantaj tra pordetoj en ĝiaj flankoj. La viroj sur ĝi, ankaŭ, estas ĉiuj bone vestitaj per modaj bluaj vestoj — tute ne kiel ordinaraĵoj maristoj. Kaj sur la flanko de la ŝipo estis literaro — ĝia nomo, supozeble. Kompreneble, mi ne povis legi ĝin. Sed mi memoras ĝian aspekton. Donu al mi vian manon kaj mi montros al vi.

Tiam la Tanĝemulo, per unu el siaj ungoj, komencis skizi kelkajn literojn sur la polmo de la mano de la Doktoro. Antaŭ ol li multe skizis Johano Dolittle eksaltis, preskaŭ renversante la kanuon.

“Ŝ.Ŝ.M.!” li kriis. “Tio signifas ‘Ŝipo de Ŝia Moŝto’. Ĝi estas militŝipo — mararmea ŝipo. Precize kion ni volas por persekuti la sklavistojn!”

Tiam la Doktoro kaj Zuzano komencis pagaji sian kanuon kiel eble plenforte direkte al la lumo. La nokto estis trankvila, sed la ondemo de la maro puŝis la malgrandan kanuon supren kaj malsupren kiel baskulo kaj Zuzano bezonis sian tutan lerton por pagaji rekte antaŭen.

Post proksimume horo la Doktoro rimarkis ke la ŝipo kiun ili penas atingi ne plu venas cele ilin, sed ŝajne ekhaltis. Kaj kiam li fine venis sub ĝian turantan formon en la mallumo li vidis la kialon — la militŝipo estis trafinta lian propran ŝipon, kiun li lasis ankritan sen lumigo. Tamen, la mararmeŝipo estis iranta sufiĉe zorge ke neniu el la ŝipoj suferis gravan difekton.

Trovinte ŝnuran eskalon pendantan sur la flanko de la militŝipo, Johano Dolittle grimpis ĝin, kun Zuzano, kaj surŝipiĝis por paroli kun la Kapitano.

Li trovis la Kapitanon pavanta sur la pobo kaj murmuranta al si.

“Bonan vesperon”, diris la Doktoro ĝentile. “Belan veteron ni havas”.

La Kapitano venis al li kaj skuis sian pugnon antaŭ lia vizaĝo.

“Ĉu vi estas la posedanto de tiu noaa arkeo tie?” li kriis kolere, indikante la alian ŝipon apudan.

“Nu — jes — provizore”, diris la Doktoro. “Kial?”

“Nu, ĉu vi bonvolos”, furiozis la Kapitano, kies vizaĝo estis tordita pro kolerego, “diri al mi pro kia stultuleco vi lasis vian malnovan flosaĵaĉon ankritan dum senluma nokto tute sen lumiloj? Kia velisto vi estas? Jen mi, veniganta la plej novan kruzilon de Ŝia Moŝto por kapti Jaĉjon Ostoĵn, la sklaviston — kiun mi persekutas jam de semajnoj, jes ja — kaj, kvazaŭ la bordaĉo ne estas jam sufiĉe malfacila, mi kolizias kontraŭ boato ankrita tute sen lumiloj. Feliĉe mi veturis malrapide, atentante la malprofundaĵojn, alie ni ĉiuj estus sinkintaj kaj dronintaj. Mi kriis al via ŝipo, kaj aŭdis nenian respondon. Do mi suriras ĝin, kun pistoloj, pensante ke eble ĝi estas sklavista ŝipo provanta trompi min. Mi silente traserĉas la tutan ŝipon, kaj eĉ ne unu homon trovas. Fine en la kajuto mi trovas porkon — **dormantan en fotelo!** Ĉu vi kutimas lasi porkon mastri la ŝipon, kun ordono dormi? Se la ŝipo estas via, kial vi ne surestas? Kie vi estis?”

“Mi estis kanuveturanta kun sinjorino”, diris la Doktoro, kaj li ridetis konsole al Zuzano, kiu jam rekomencis plori.

“Kanuveturanta kun sinjorino!” mokrakis la Kapitano. “Se vi min —”

“Jes”, diris la Doktoro. “Mi konigu ŝin al vi. “Jen Zuzano, Kapitano — e...”

Sed la Kapitano interrompis lin alvokante mariston proksime starantan.

“Mi montros kion sekvigas tia laso de noaa arkeo sur la alta maro por ke la mararmeo koliziu kun ĝi, mia bela surmara amoranto! Ĉu vi kredas ke la marleĝoj estas nur ŝerco? Jen”, li turnis sin al la maristo veninta responde al lia alvoko, “Suboficiro, arestu ĉi tiun viron”.

“Jes, Sinjoro”, diris la suboficiro. Kaj antaŭ ol la Doktoro konsciis ĝin, liaj pojnjoj estis enkatenigitaj.

“Sed ĉi sinjorino estis suferanta”, diris la Doktoro. “Mi tiom hastis ke mi tute forgesis lumigi la ŝipon. Efektive, ankoraŭ ne estis nokte kiam mi foriris”.

“Subenigu lin!” muĝis la Kapitano. “Subenigu lin antaŭ ol mi mortigos lin!”

Kaj la povran Doktoron trenis la suboficiro cele ŝtupojn kondukantajn al la suba etaĝo. Sed ĉe la supro de la ŝtupoj la Doktoro kaptis la balustradon kaj alkroĉis sin sufiĉe longe por kii al la Kapitano:



“Mi povus diri al vi kie trovi Jaĉjon Ostojn, se mi volus”.

“Kio?” elkriis la Kapitano. “Jen, revenigu lin. Kion vi diris?”

“Mi diris”, murmuris la Doktoro, elprenante sian poŝtukon kaj mungante, “ke mi povus diri al vi kie trovi Jaĉjon Ostojn — se mi volus”.

“Jaĉjon Ostojn, la sklaviston?” kriis la Kapitano. “Ke mi trovu lin la registaro sendis min. Kie li estas?”

“Mia memoro ne bone funkcias dum miaj manoj estas en katenoj”, diris la Doktoro trankvile, indikante per sia kapo la katenojn. “Eble se vi forprenigus ilin, mi memorus”.

“Ho, pardonu”, diris la Kapitano, ekĝentile parolante. “Suboficiro, malkatenu la kaptiton”.

“Jes, Sinjoro”, diris la maristo, kaj li formetis la katenojn de la pojnoj de la doktoro kaj pretis foriri.

“Ho, krome”, la Kapitano vokis al li, “alportu seĝon sur la ferdekon. Eble nia vizitanto estas laca”.

Do Johano Dolittle diris al la Kapitano la tutan rakonton pri Zuzano kaj ŝiaj suferoj. Kaj ĉiuj aliaj oficiroj de la ŝipo ĉirkaŭgrupiĝis por aŭskulti.

“Kaj mi neniom dubas”, finis la Doktoro, “ke tiu sklavisto kiu forprenis la edzon de la virino estas Jaĉjo Osto mem, la viro kiun vi persekutas”.

“Sendube”, diris la Kapitano. “Mi scias ke li estas ie apud la bordo. Sed kie li estas nun. Malfacilas kapti lin”.

“Li iris norden”, diris la Doktoro. “Sed via ŝipo rapidas kaj povos atingi lin. Se li kaŝiĝas en iu el la golfoj aŭ golfetoj mi kunhavas plurajn birdojn kiuj povos, tuj je la mateniĝo, serĉi lin kaj diri al ni kie lin trovi”.

La Kapitano mirigite rigardis la vizaĝojn de siaj aŭskultantaj oficiroj, kiuj ĉiuj ridetis malkredante.

“Kion vi diras — birdojn?” la Kapitano demandis. “Kolombojn — dresitajn kanariojn — ion tian?”

“Ne”, diris la Doktoro, “la hirundojn kiuj reiras al Anglujo por la somero. Ili bonvolas gvidi mian ŝipon hejmen. Ili estas amikoj miaj, sciu”.

Nun ĉiuj oficiroj ekridegis kaj frapetis siajn fruntojn por indiki ke laŭ ili la Doktoro frenezas. Kaj la Kapitano, kredante ke la Doktoro mokas lin, refuriozis kaj volis rearestigi la Doktoron.

Sed la vickapitano flustris al la Kapitano:

“Kial ne kunvenigu kaj provu la maljunulon, Sinjoro? Ĉiukaze ni intencis iri norden. Mi kredas memori ion, kiam mi servis en la Apudborda Mararmeo, pri maljunulo en la okcidenta regiono kiu havas mirindajn kapablojn rilate al bestoj kaj birdoj. Mi ne dubas ke ĉi tiu viro estas li. Dolittle, li nomiĝis. Li ŝajnas sufiĉe maldanĝera. Estas eta eblo ke li povos iom helpi nin. La indiĝenoj evidente fidis lin, alie la virino ne akompanus lin — vi scias kiom ili timas veturi surmare kun blankulo”.

Pensinte dum momento, la Kapitano returnis sin al la Doktoro.

“Viaj diroj ŝajnas frenezaj, laŭ mi, amiko. Sed se vi povos helpi min kapti Jaĉjon Ostojn la sklaviston ne gravas al mi kiel vi faros tion. Tuj je la mateniĝo ni ekveturos. Sed se vi nur amuzas vin koste de la Mararmeo de Ŝia Moŝto mi avertas ke neniam vi tiom misagis al vi mem. Nun iru lumigi haltolumilojn sur tiu arkeo via kaj diru al la porko ke se li lasos ilin estingiĝi li fariĝos lardotranĉaĵoj por la manĝo de la oficiroj”.


Estis multaj ridado kaj ŝercado dum la Doktoro malgrimpis la ŝipoflankon kaj reiris al sia propra ŝipo por lumigi. Sed la sekvan matenon kiam li revenis al la militŝipo — kaj ĉirkaŭ

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

mil hirundoj venis kun li — la oficiroj de la Mararmeo de Ŝia Moŝto multe malpli emis moki lin.

La suno estis leviĝanta super la malproksima afrika bordo kaj estis la plej bela mateno dezirebla.

Rapidulo-la-Tanĝema estis interkonsentinta planojn kun la Doktoro dum la nokto. Kaj multe antaŭ ol la granda milit-



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

ŝipo levis sian ankron kaj turnis sin por por ekveturi la fama hirundoĉefo estis kilometrojn antaŭe, kun grupo de elektitaj ĉasistoj, esplorante golfetojn kaj ekzamenante ĉiujn kurbiĝojn de la bordo kie la sklavisto povus kaŝi sin.

Rapidulo estis akordinta kun la Doktoro pri speco de superkapa telegrafa sistemo farota de la hirundoj. Kaj tuj kiam la milionoj da birdetoj estis disirintaj en vico laŭlonge de la bordo, tiel ke ili kvazaŭ polvo kovris la ĉielon ĉie kien oni rigardas, ili komencis transdoni mesaĝojn, fajfante unu al alia, la tutan vojon inter la antaŭaj serĉantoj kaj la Doktoro sur la militŝipo, por doni la novaĵojn pri la progreso de la serĉo.

Kaj ĉirkaŭ la tagmezo venis mesaĝo ke la sklavŝipo de Osto estis vidita malantaŭ longa alta kabo. Necesas multe zorgi, la mesaĝo diris, ĉar la sklavista ŝipo estas tute preta ekveturi se avertite. La sklavistoj estis haltintaj nur por akiri akvon kaj gvatistoj estis postenigitaj por averti ke ili tuj revenu, se necese.

Kiam la Doktoro diris tion al la Kapitano la militŝipo ŝanĝis sian direkton por veturi ankoraŭ pli proksime al la bordo, por resti kaŝata de la longa kabo. Ĉiuj velistoj estis avertitaj fari nenian bruon, tiel ke la mararmea ŝipo povos kaŝe atingi la sklavistojn.

Nu, la Kapitano, anticipante ke la sklavistoj batalos, ankaŭ ordonis ke la pafiloj estu pretigitaj. Kaj ĝuste kiam ili estis ĉirkaŭirontaj la longan kabon unu el la stultaj pafistoj akcidente funkciigis la pafilon.

“Bum!”... La pafo sonegadis eĥante dum ĝi tondre flugis trans la silentan maron.

Tuj venis mesaĝo per la hirunda telegrafo ke la sklavistoj estas avertitaj kaj eskapas. Kaj, tutvere, kiam la militŝipo fine ĉirkaŭiris la kabon, jen la sklavista ŝipo veturanta surmaren, kun ĉiuj veloj levitaj kaj almenaŭ dudek kilometrojn antaŭ la militŝipo.

Kaj tiam komenciĝis ekscitega markonkuro. Estis nun la dua horo posttagmeze kaj ne restis multaj taghoroj.

La Kapitano (kiam li ĉesis sakradi kontraŭ la stulta pafisto kiu akcidente funkciigis la pafilon) konsciis ke se li ne atingos la sklavistan ŝipon antaŭ ol krepuskos la nokto li verŝajne tute maltrafos ĝin. Ĉar ĉi tiu Jaĉjo Ostoj estis tre ruza fripono kaj li tre bone konis la okcidentan bordon de Afriko (oni ankoraŭ nun kelkafoje nomas ĝin **La Sklavista Bordo**). Post la mallumiĝo li facile trovis iun kaŝlokon per velado sen lumiloj — aŭ retroveturus kaj estus multajn kilometrojn for antaŭ la mateniĝo.

Do la Kapitano ordonis kiel eble plej rapide veturi. En tiu epoko oni unue komencis uzi vaporon por movi ŝipojn. Sed komence oni uzis ĝin nur kune kun veloj, por helpi la ventopuŝadon. Pri ĉi tiu ŝipo, la **Ŝ.Ŝ.M. Violeto**, la Kapitano multe fieris. Kaj li volegis ke la **Violeto** honoriĝu per kapto je la sklavisto Ostoj, kiu dum tiom longe defiadis la mararmeon per sklavigado post ĝia malpermesiĝo. Do la vapormotoroj de la **Violeto** estis plejplene funkciigitaj. Kaj densa nigra fumo torentis el ĝiaj funeloj kaj mallumigis la bluan maron kaj malkulegis ĝiajn belajn blankajn velojn kiuj estis streĉitaj en la brizo.

Tiam la motoristo, ankaŭ fervora ke lia ŝipo honoriĝu per kapto je Ostoj, ligis la sekurvalvon, por ke ĝi pli rapidu, kaj post tio iris sur la ferdekon por vidi la eventojn. Kaj baldaŭ, kompreneble, unu el la tute novaj vaporkaldronoj de la **Violeto** eksplodis farante teruran bruegon kaj plene ruinigis la motorĉambron.

Sed, ĉar ĝi estis plene velopretigita militŝipo, la **Violeto** restis tre rapida. Kaj plu ĝi veturis, rapide plugante la ondojn kaj iom post iom pliproksimiĝante al la sklavista ŝipo.

Tamen, ruza Ostoj, pro sia granda malproksimo, ne estis facile atingebla. Kaj baldaŭ la suno komencis malleviĝi kaj la Kapitano fruntosulkis kaj piedbatis la plankon. Ĉar li sciis ke pro mallumo lia malamiko estos sekura.

Sube, inter la velistaro, la viro kiu akcidente pafigis multe suferis. Ĉiuj liaj kompanoj atakis lin kaj riproĉegis lin ĉar li estis tiom stulta ke li avertis Ostojn — kiu nun preskaŭ certe eskapos. La distanco por atingi la sklavistan ŝipon estis ankoraŭ tro granda por la speco de pafiloj uzata tiuepoke. Sed kiam la Kapitano vidis la mallumon rampi trans la maron kaj sian malamikon eskapi, li ordonis malgraŭ ĉio pafadi — kvankam estis neniam espero ke la pafoj trafos la sklavistan ŝipon tiom distancan.

Nu, Rapidulo-la-Tanĝema, tuj post la komenco de la konkuro, venis sur la militŝipon por ripozi. Kaj hazarde li ĉeestis parolante kun la Doktoro kiam koniĝis la ordono de la Kapitano pafadi. Do la Doktoro kaj Rapidulo subeniris por rigardi la pafadon.

Ili trovis etoson silentan sed tre ekscitoplenan tie. Ĉiu pafisto apogiĝis sur sia pafilo, celigante ĝin, gvatante la malproksiman malamikan ŝipon kaj atendante la ordonon pafi. La povrulo atakita de siaj kompanoj ankoraŭ preskaŭ ploris pro sia propra stulta eraro.

Subite oficiro kriis **“Pafu!”** kaj farante ŝokon kiu skuis la tutan ŝipon ok grandaj obusoj fajfante flugis trans la akvon.

Sed eĉ ne unu trafis la sklavistan ŝipon. **Plaŝ! Plaŝ! Plaŝ!** ili falis sendanĝere en la akvon.

“La lumo malsufiĉas”, grumblis la pafistoj. “Kiel eblus trafi ion tri kilometrojn for en ĉi tia lumaĉo?”

Tiam Rapidulo flustris al la Doktoro: “Petu ke mi rajtu pafi. Mi pli bone vidas ol ili en malbona lumo”.

Sed ĝuste tiumomente ordono de la Kapitano sonis, **“Ĉesu pafi!”**. Kaj la pafistoj foriris el siaj pozicio.

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Tuj kiam ili turnis la dorson Rapidulo saltis sur pafilon kaj, apartiginte siajn mallongajn blankajn krurojn, li celigis siajn bidajn nigrajn okuletojn per la celilo. Tiam per siaj flugiloj li signalis al la Doktoro malantaŭ li turni la pafilon tien kaj tien por ke ĝi celu laŭ lia volo. **“Pafu!”** diris Rapidulo. La Doktoro pafis.

“Kio je la Ĉielo okazas?” muĝis la Kapitano el la pobo kiam la pafo eksonis. “Ĉu mi ne ordonis ne plu pafi?”

Sed la vickapitano tiris lian manikon kaj indikis trans la akvon. La obuso de Rapidulo estis tute duoniginta la ĉefmaston de la sklavista ŝipo, kaj faligis la velojn amasigitaj sur la ferdekon!

“Jadil!” kriis la Kapitano. “Ni trafis lin! Vidu, Ostoĵ signalas sian cedon!”


Tiam la Kapitano, kiu antaŭ momento fervoris puni la viron kiu pafis kontraŭordone, volis scii kiu celigis tiun mirindan pafon kiu haltigis la sklavistan ŝipon. Kaj la Doktoro intencis diri al li ke temas pri Rapidulo. Sed la Tanĝemulo flustris en lian orelon:

“Ne, Doktoro. Li nepre ne kredus vin. Ni uzis la pafilon de la viro kiu faris la paferaron. Li ricevu la krediton. Oni verŝajne honoros lin per medalo, kaj li plifeliĉiĝos”.

Kaj nun estis nur ekscitego sur la **Violeto** dum ili proksimiĝis al la sklavista boato kuŝanta kripligita en la maro. Ostoĵ, la kapitano, kun sia grupo de dek unu aliaj fiuloj, estis kaptita kaj metita en la karcerojn en malsupra etaĝo de la militŝipo. Tiam la Doktoro, kun Zuzano, kelkaj maristoj kaj oficiro, suriris la sklavistan ŝipon. Enirinte la holdon, ili trovis la lokon plenplena de sklavoj katenitaj. Kaj Zuzano tuj rekonis sian edzon kaj kovris lin per larmoj pro ĝojo.

La nigruloj estis tuj liberigitaj el siaj katenoj kaj venigitaj en la militŝipon. Poste la sklavista ŝipo estis ligita al la **Violeto** por esti trenata. Kaj jen la fino de la sklavvendado de S-ro Ostoĵ.

Sekvis multaj ĝojo kaj manpremado kaj gratulado en la militŝipo. Kaj grandioza manĝo estis preparita por la sklavoj sur la ĉefa ferdeko. Sed Johano Dolittle, Zuzano kaj ŝia edzo es-



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

tis invititaj en la manĝejon de la oficiroj, kie oni trinkis omaĝe al ilia sano per Portovino, kaj paroladojn faris la Kapitano kaj la Doktoro.

La sekvan tagon, tuj je la mateniĝo, la militŝipo rekrozadis laŭlonge de la bordo, remetante la nigrulojn en iliajn proprajn landojn.

Tio necesigis multan tempon, ĉar Ostoj montriĝis esti kolektinta sklavojn el tre multaj diversaj triboj. Kaj nur posttagmeze la Doktoro kun Zuzano kaj ŝia edzo estis reportitaj al la ŝipo de Johano Dolittle, kiu ankoraŭ havis brilantajn lumilojn en la tagmezo.

Tiam la Kapitano manpremis kun la Doktoro kaj dankis lin pro lia granda helpo al la Mararmeo de Ŝia Moŝto. Kaj li demandis pri lian adreso en Anglujo, ĉar li diris ke li informos la Registaron pri li kaj la Reĝino verŝajne volos kavalirigi lin aŭ doni al mi medalon aŭ ion tian. Sed la Doktoro diris ke li preferus anstataŭe ricevi duonan kilogramon da teo. Li jam de pluraj monatoj ne gustis bonan teon kaj la speco de teo uzata en la manĝejo de la oficiroj estas tre bona.

Do la Kapitano donis al li tri kilogramojn de la plej bona ĉina teo kaj denove dankis lin nome de la Reĝino kaj la Registaro.

Post tio la **Violeto** denove turnis sian grandan pruon norden kaj forvelis cele Anglujon, dum la blujakuloj amasiĝis ĉe la balustrado kaj kriegis trans la maron trioblan huraon pro la Doktoro.

Kaj nun Jipo, Dab-Dabo, Gub-Gubo, Tu-Tuo kaj la ceteraj grupiĝis ĉirkaŭ Johano Dolittle kaj volis aŭdi pri ĉiuj liaj aventuroj. Kaj jam estis la vespermanĝa horo antaŭ ol li finis sian rakonton. Do la Doktoro petis Zuzanon kaj ŝian edzon vespermanĝi kun li antaŭ ol surteriĝi.

Tion ili volonte faris. Kaj la Doktoro mem preparis la teon kaj ĝi estis bonega. Dum la trinkado Zuzano kaj ŝia edzo (nomita Begvo) konversaciis pri la Regno Fantipo.



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Mi kredas ke ni devus ne reiri tien”, diris Begvo. “Ne ĝenas min esti soldato en la armeo de Fantipo, sed supozu ke alia sklavisto venos. Eble la Reĝo denove vendus min. Ĉu vi sendis tiun leteron al nia kuzo?”

“Jes”, diris Zuzano. “Sed mi kredas ke li neniam ricevis ĝin. Ĉar ne venis respondo”.

La Doktoro demandis al Zuzano pri kiel ŝi sendis la leteron. Kaj ŝi klarigis al li ke kiam Osto proponis grandan pagon pro Begvo kaj la Reĝon tentis vendi lin ŝi diris al la Reĝo ke ŝi akiros dek du bovojn kaj tridek kaprojn de riĉa kuzo en sia propra lando se li akceptos atendi por ke ŝi skribu al li. Nu, la Reĝo de Fantipo multe amis bovojn kaj kaprojn — bestoj estis konsiderataj egale bonaj kiel mono en lia lando. Kaj li promesis al Zuzano ke se ŝi akiros la dek du bovojn kaj tridek kaprojn ĝis du tagoj ŝia edzo estos libera, anstataŭ esti vendita al la sklavistoj.

Do Zuzano rapidis al profesia leteroskribisto (ĉar, sciu, ordinaraj homoj en tiuj triboj ne scikapablis mem skribi) kaj skribigis leteron petegante la kuzon sendi la kaprojn kaj bovojn tuj al la Reĝo. Post tio ŝi portis la leteron al la Poŝtoŝicejo de Fantipo kaj sendis ĝin.

Sed du tagoj pasis kaj venis neniun respondo — kaj neniuj bestoj. Tiam povra Begvo estis vendita al la viroj de Osto.

Nu, tiu fantipa poŝto pri kiu Zuzano parolis al la Doktoro estis iom stranga.

Unue, kompreneble, estis tre malkutime trovi poŝtoŝticejon aŭ poŝton en ia sovaĝa afrika regno. Kaj la maniero laŭ kio ĝi efektiviĝis estis tia:

Kelkajn jarojn antaŭ ĉi tiu vojaĝo de la Doktoro estis multa diskutado en la plej civilizitaj partoj de la mondo pri poŝtoj kaj kiom devus kosti sendi leteron de unu lando al alia. Kaj en Anglujo viro nomita Rowland Hill komencis kion oni nomis “La Penca Poŝto”, kaj estis interkonsentite ke unu penco por unu letero estu la normala pago por poŝtaĵo el unu parto de la Britaj Insuloj al alia. Kompreneble, por tre pezaj leteroj oni devis pli pagi. Poŝtmarkoj estis faritaj, unupencaj markoj, dupencaj markoj, du-kaj-duon-pencaj markoj, sespencaj markoj kaj ŝilingaj markoj. Kaj ĉiu havis propran koloron kaj ili estis bele gravuritaj kaj la plej multaj surhavis bildon de la Reĝino — kelkaj kun ŝia krono sur la kapo kaj kelkaj sen ĝi.

Kaj Francujo kaj Usono kaj ĉiuj aliaj landoj komencis samon fari — tamen iliaj poŝtmarkoj surhavis valorojn laŭ la tiulanda mono, kompreneble, kaj havis aliajn reĝojn aŭ reĝinojn aŭ prezidentojn sur si.

Tute bone. Nu, unu tagon ŝipo haltis ĉe la bordo de okcidenta Afriko, kaj liveris leteron por Koko, la Reĝo de Fantipo. Reĝo Koko neniam antaŭe vidis poŝtmarkon kaj, veniginte blankan komerciston kiu loĝis en sia urbo, li demandis de kiu reĝino estas la vizaĝo sur la poŝtmarko sur la letero.

Tiam la blanka komercisto klarigis al li la tutan ideon de penca poŝto kaj registaraj poŝtoj. Kaj li diris al li ke en Anglujo kiam oni volas sendi leteron ien en la mondo oni nur bezonas meti markon sur la koverton kun la kapo de la Reĝino sur ĝi kaj meti ĝin en leterkeston ĉe la stratangulo, kaj ĝi portiĝos al la loko al kiu oni adresas ĝin.

“Ah, ha!” diris la Reĝo. “Nova speco de magio. Mi komprenas. Tre bone. La Alta Regno Fantipo havos propran poŝton. Kaj **mia** serena kaj bela vizaĝo estos sur ĉiuj poŝtmarkoj kaj miaj leteroj veturos per pli rapida magio ol iu alia”.

Tiam Reĝo Koko de Fantipo, estante tre vanta viro, farigis belan aron da poŝtmarkoj kun siaj bildoj sur ili, kelkaj kun lia krono sur li kaj kelkaj sen ĝi; kelkaj ridetantaj, kaj kelkaj sulkante la frunton; kelkaj montrantaj lin sur ĉevalo, kelkaj kun li sur biciklo. Sed la poŝtmarko pri kiu li plej fieris estis la dekpenca marko sur kiu estis bildo de li ludanta golfon — ludon kiun li nur tre lastatempe lernis de kelkaj skotoj kiuj minadis oron en lia regno.

Kaj li fabrikigis leterkestojn, tute similajn al tiuj kiuj laŭ la komercisto estas en Anglujo, kaj li starigis ilin ĉe la stratanguloj kaj informis al sia popolo ke ili nur devas meti unu el liaj markoj sur leteron, puŝi ĝin en tian keston, kaj ĝi veturos al kiu ajn loko sur la tero kiun ili deziras.

Sed baldaŭ la popolo komencis plendi ke ili estis rabitaj. Ili pagis bonan monon por la markoj, ili diris, fidante la magion, kaj ili metis siajn leterojn en la **poŝt**kestojn ĉe la stratanguloj laŭ la instrukcioj. Sed unu tagon bovino frotis sian kolon per unu el la leterkestoj kaj ĝi ekkreis, kaj interne estis ĉiuj leteroj kiujn oni estis metintaj en ĝin, ili ne estis veturintaj eĉ unu milimetron for de la kesto!

Tiam la Reĝo koleregis, kaj alvokinte la komerciston, li diris:

“Vi trompis Mian Moŝton. Ĉi tiuj poŝtmarkoj pri kiuj vi parolas tute ne havas magian kapablon. Klarigu!”

Do la komercisto diris al li ke la leteroj veturas per la poŝto ne pro magio de la markoj aŭ kestoj. Sed veraj poŝtoŝticejoj havas poŝtistojn, kiuj kolektas la leterojn el la kestoj. Kaj li plu klarigis al la Reĝo ĉiujn aliajn devojn de poŝtoŝticejo kaj kio funkciigas la poŝton.

Do tiam la Reĝo, kiu estis persistema homo, diris ke malgraŭ ĉio Fantipo devas havi

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

sian poŝton. Kaj li mendis el Angl-



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

ujo centojn da poŝtistaj uniformoj kaj ĉapo. Kaj kiam ili alvenis, li vestigis aron da nigruloj per ili kaj laborigis ilin kiel poŝtistojn.

Sed la nigruloj trovis la pezajn uniformojn terure varmegaj por la fantipa vetero, kie oni vestas sin nur per ĉeno de bidoj. Kaj ili demetis la uniformojn kaj konservis nur la ĉapojn. Tial la poŝtista uniformo fantipa estiĝis eleganta ĉapo, ĉeno de bidoj, kaj poŝtosako.

Tiel kiam Reĝo Koko akiris siajn poŝtistojn, la Reĝa Fantipa poŝto vere funkciis. Leteroj kolektiĝis el la kestoj ĉe stratanguloj kaj forsendiĝis kiam ŝipoj alvenis; kaj alvenintaj poŝtaĵoj estis liverataj ĉe la pordoj de la domoj en Fantipo trifoje ĉiutage. La poŝtoŝtanco fariĝis la plej okupata loko en la vilaĝo.

Nu, la okcidentafrikaj popoloj havas kuriozajn emojn pri vestoj. Ili amas brilantaĵojn. Kaj iu fantipa dando inaŭguris la ideon uzi malnovajn poŝtmarkojn por fari vestokompletojn el ili. Ili aspektis tre brilaj kaj modaj kaj tia kompleto farita el poŝtmarkoj fariĝis valora posedaĵo inter la indiĝenoj.

Ĉirkaŭ la sama tempo, en la civilizitaj partoj de la mondo unu rezulto de la pencopoŝta sistemo estis la hobia kolekti poŝtmarkojn. En Anglujo kaj Usono kaj aliaj landoj homoj komencis aĉeti poŝtmarkalbumojn kaj glui poŝtmarkojn en ilin. Rara poŝtmarko fariĝis tre valora.

Kaj hazarde unu tagon du viroj, kies hobia estis kolekti poŝtmarkojn, venis al Fantipo en ŝipo. La poŝtmarko kiun ili precipe fervoris akiri por siaj kolektoj estis la “du-kaj-duonpenca Fantipa ruĝa”, poŝtmarko kiun la Reĝo ĉesis presigi — pro tio ke la bildo de li sur ĝi ne estis sufiĉe bela. Kaj ĉar li ĉesis presigi ĝin, ĝi fariĝis tre rara.

Tuj kiam tiuj du viroj paŝis sur la teron ĉe Fantipo portisto venis al ili por porti iliajn valizojn. Kaj ĝuste en la mezo de la brusto de la portisto la kolektantoj vidis la du-kaj-duonpencon Fantipan ruĝan! Tiam ambaŭ kolektistoj proponis aĉeti la poŝtmarkon. Kaj ĉar ĉiu el ili ambaŭ fervoris havi ĝin por sia kolekto, post nelonge ili proponis altajn prezojn por ĝi, ĉiu volis proponi pli altan prezon ol la alia.

Reĝo Koko informiĝis pri tio kaj li alvokis unu el la poŝtmarkokolektantojn kaj demandis al li kial oni proponas altajn prezojn por unu malnova uzita marko. Kaj la blankuloj klarigis al li la novan furoron je poŝtmarkokolektado kiu venkas la civilizitan mondon.

Do Reĝo Koko, kvankam li opiniis la civilizitan mondon nepre freneza, decidis ke estus bona ideo **mem** vendi poŝtmarkojn por kolektoj — multe pli bona komerco ol vendi ilin ĉe sia poŝtoŝtanco por leteroj. Kaj post tio kiam ajn ŝipo eniris la havenon de Fantipo li sendis sian Poŝtoĉefon — tre elegantan viron kiu surhavis **du** ĉenojn de perloj, poŝtistan ĉapon kaj ne kunportis poŝtosakon — al la ŝipo kun poŝtmarkoj vendotaj por kolektoj.

Tiom vigla komerco estiĝis tiel ke la Reĝo pli laborigis siajn presilojn ol antaŭe, por ke tute nova aro da fantipaj poŝtmarkoj estu preta por vendo antaŭ ol la sama ŝipo revenos survoje al Anglujo.

Sed pro la nova komerco de vendado de poŝtmarkoj por poŝtmarkokolektoj, kaj ne por veraj poŝtoceloj, la Fantipa poŝto neglektiĝis kaj multe suferis.

Nu, Doktoro Dolittle, dum Zuzano parolis dum tetrinkado pri sia letero kiun ŝi sendis al sia kuzo — kaj pri kiu neniuj respondo estis veninta — subite ekmemoris ion. Dum unu el liaj antaŭaj vojaĝoj la ŝipo per kiu li veturis haltis ĉe tiu sama haveno de Fantipo, kvankam neniuj pasaĝeroj surteriĝis. Kaj poŝtisto venis sur la ŝipon por vendi tre elegantan grupon de novaj verdaj kaj violaj markoj.

La Doktoro, kiu estis fervora poŝtmarko-kolektanto, aĉetis tri kompletojn.

Kaj li konsciiĝis nun, aŭskultante Zuzanon, kio misas en la Fantipa Poŝto, kaj kial ŝi neniam ricevis respondon al la lete-



ro kiu estus savinta ŝian edzon el sklaveco.

Dum Zuzano kaj Begvo stariĝis por foriri, ĉar komenciĝis noktiĝi, la Doktoro rimarkis kanuon ekveturantan de la bordo al lia ŝipo. Kaj en ĝi, kiam ĝi proksimiĝis, li vidis Reĝon Kokon mem, kiu venas al la boato de la blankulo kun poŝtmarkoj vendotaj.

Do la Doktoro komencis paroli kun la Reĝo kaj li diris al li tute klare ke li devus honti pro sia poŝto. Post tio, doninte al li tason da ĉina teo, li klarigis al li ke la letero de Zuzano verŝajne neniam estis liverita al ŝia kuzo.

La Reĝo aŭskultis atente kaj komprenis kiel lia poŝto misagas. Kaj li invitis la Doktoron veni surteren kun Zuzano kaj Begvo kaj aranĝi la poŝton por li kaj ĝustigi ĝin por ke ĝi funkciu enorde.

Post iom da persvado la Doktoro akceptis tiun proponon, sentante ke eble li povos ion bonan fari. Malmulte li konsciis pri la grandaj laboroj kaj aventuroj kiujn li prenas por si, irante en la kanuon kun la Reĝo, Begvo kaj Zuzano por esti pagajita al la vilaĝo Fantipo.

Tiun lokon li trovis tre malsimila al ĉiu alia afrika vilaĝo aŭ loĝloko kiun iam li vizitis. Ĝi estis tre granda, preskaŭ urbo. Ĝi havis multakoloran kaj gajan aspekton kaj la popolo, simile al sia Reĝo, ŝajnis tre afabla kaj gaja.

La Doktoro konatiĝis kun ĉiuj ĉefuloj de la fantipa nacio kaj poste li estis kondukita al la poŝtoŝicejo.

Tiun li trovis en tre aĉa stato. Estis leteroj ĉie — sur la plankoj, en malnovaj tirkesto, disŝutitaj sur skribtabloj, eĉ kuŝantaj sur la pavimo ekster la pordo de la poŝtoŝicejo. La Doktoro klarigis al la Reĝo ke tio estas tute malĝusta, ke en bonordaj poŝtoŝicejoj la leteroj sur kiuj estas poŝtmarkoj estas traktataj respektoplene kaj zorge. Ne estas mirinde, li diris, ke la letero de Zuzano neniam estis liverita al ŝia kuzo se tiel oni prizorgas la poŝton.

Tiam Reĝo Koko denove petegis lin ĉefi la poŝton kaj peni reĝustigi ĝin. Kaj la Doktoro diris ke li konsideros kion fari. Kaj, enirinte la poŝtoŝicejon, li demetis sian mantelon kaj eklaboris.

Sed post multaj horoj da terura laborego, penante enordigi la leterojn kaj la ejon Johano Dolittle konsciis ke tia taskego kia reĝustigi la Fantipan Poŝton ne estus nur unu-du-tagaj laboroj. Necesus almenaŭ semajnoj. Do li diris tion al la Reĝo. Tiam la ŝipo de la Doktoro estis prenita en la havenon kaj sekure ankrita kaj ĉiuj ĝiaj bestoj estis surterigitaj. Kaj bela nova domo sur la ĉefa strato estis donita al la Doktoro por ke li kaj liaj dorlotbestoj loĝu en ĝi dum la laboroj ĝustigi la Fantipan Poŝton daŭros.

Nu, post dek tagoj Johano Dolittle sufiĉe bonordigis tion kion oni nomas la **Enlanda Poŝto**. Enlanda poŝto estas la portado de leteroj el unu parto de lando al alia parto de la sama lando, aŭ de unu parto de urbo al alia parto de la urbo. La poŝto por leteroj kiuj iras el la lando al aliaj landoj nomiĝas **Fremdlanda Poŝto**. La Doktoro trovis ke estas granda problemoj starigi bonan regulan fremdlandan poŝtoservon, ĉar la ŝipoj portantaj poŝtaĵojn ne ofte venas al tiu haveno. Fantipo, kvankam Reĝo Koko multe fieris pro ĝi, ne estis opiniata tre grava inter la ordinaraj civilizitaj nacioj, kaj nur du aŭ tri ŝipoj iris tien ĉiujare.

Nu, unu tagon, fruege en la mateno, dum la Doktoro kuŝis en sia lito, demandante al si kion fari pri la Fremdlanda Poŝtoservo, Dab-Dabo kaj Jipo portis al li lian matenmanĝon sur pleto kaj diris ke ekstere estas hirundo kiu deziras doni al li mesaĝon de Rapidulo-la-Tanĝema. Johano Dolittle envenigis la hirundon kaj la malgranda birdo sidis sur la piedo de lia lito dum li matenmanĝis.

“Bonan matenon”, diris la Doktoro, dum li rompis la supron de boligita ovo. “Kion mi povas fari por vi?”

“Rapidulo deziras scii”, diris la hirundo, “kiom longe vi anticipas resti en ĉi tiu lando. Li ne volas plendi, sciu — nek iu alia el ni — sed ĉi tiu veturo via daŭras li longe ol ni anticipis. Sciu, estis prokrasto dum ni elĉasis Ostojn la sklaviston, kaj nun verŝajnas ke vi okupos vin pri ĉi tiu poŝto dum pluraj pliaj semajnoj. Kutime ni estus en Anglujo longe antaŭ nun, pretigante la nestojn por la familioj de la nova sezono. Ni ne povas prokrastigi la nestosezonon, sciu. Kompreneble, vi komprenas ke ni ne plendas, ĉu ne? Sed la prokrasto iom malfaciligas nian vivon”.

“Ho, jes, ja. Mi komprenas plene”, diris la Doktoro, puŝante salon en sian ovon per osta ovkulero. “Mi multege bedaŭras. Sed kial Rapidulo mem ne alportis la mesaĝon?”

“Mi supozas ke li ne volis”, diris la Hirundo. “Pensis ke ofendus vin, eble”.



“Ho, neniel”, diris la Doktoro. “Vi birdoj estis tre helpaj. Diru al Rapidulo ke mi venos paroli kun li tuj kiam mi estos surmetinta mian pantalonon. Io aranĝeblas, sendube”.

“Tre bone, Doktoro”, diris la Hirundo, turnante sin por foriri. “Mi diros al la Rapidulo kion vi diris”.

“Krome”, diris Johano Dolittle, “mi penas memori kie mi antaŭe vidis vian vizaĝon. Ĉu iam vi konstruis vian neston en mia stalo en Puddleby?”

“Ne”, diris la birdo. “Sed mi estas la hirundo kiu portis al vi la mesaĝon de la simioj kiam ili malsanis”.

“Ho, jes — kompreneble”, kriis la Doktoro. “Mi sciis ke ie mi vidis vin. Mi neniam forgesas vizaĝojn. Estis ege malfacile por vi veni al Anglujo dum la vintro, ĉu ne — neĝo sur la tero ktp. Vi estis tre kuraĝa entrepreni tion”.

“Jes, la veturo estis malfacila”, diris la hirundo. “Mi preskaŭ mortis pro frosto pli ol unufoje. Flugi en la dentojn de tiu frosta vento estis terurega. Sed io estis farenda. La simioj plej verŝajne estus nuligitaj se ni ne povus venigi vin”.

“Kiel okazis ke oni elektis vin alporti la mesaĝon?” demandis la Doktoro.

“Nu”, diris la Hirundo, “efektive Rapidulo mem volis alporti ĝin. Li estas ege kuraĝa, sciu — kaj rapida kiel fulmo. Sed la aliaj hirundoj rifuzis permesi lin. Ili diris ke li estas tro valora kiel ĉefo. Estis riskoplena afero. Kaj se li perdus sian vivon pro la frosto neniam ni sukcesus akiri novan ĉefon egalan al li. Ĉar, krom esti kuraĝa kaj rapida, li estas la plej lerta ĉefo kiun iam ni havis. Kiam ajn la hirundoj renkontas problemojn li ĉiam elpensas solvon. Li estas naskita ĉefo. Li flugas rapide kaj li pensas rapide”.

“Humf!” murmuris la Doktoro, dum li pensoplene forbrosis la toastajn panerojn de la litkovriloj. “Sed kial ili elektis vin por alporti la mesaĝon?”

“Ili ne elektis min”, diris la hirundo. “Preskaŭ ĉiuj el ni proponis sin por la tasko, por ke Rapidulo ne bezonu endanĝerigi sian vivon. Sed Rapidulo diris ke la sola justa metodo estas loti. Do ni akiris aron da malgrandaj folioj kaj ni deprenis la trunketojn de ĉiuj el ili escepte de unu. Kaj ni metis la foliojn en malnovan kokosan ŝelon kaj skuis ilin. Post tio, kun la okuloj fermitaj, ni komencis elpreni ilin. La hirundo kiu elprenis la folion kun ĝia trunketo devos porti la mesaĝon al Anglujo — kaj mi prenis la folion kun trunketo. Antaŭ ol komenci la veturon mi adiaŭe kisis mian edzinon, ĉar mi vere ne anticipis reveni viva. Tamen, mi iom ĝojas ke la loto trafis min”.

“Kial?” demandis la Doktoro, puŝante la matenmanĝan pleton for de siaj genuoj kaj pugne ĝustigante la formon de la kapkusenoj.

“Nu, sciu”, diris la hirundo, levante sian dekstran kruron por montri ruĝan rubandeton faritan el maizfadenoj ligitan ĉirkaŭ lian maleolon, “mi ricevis ĉi tion pro tio”.

“Kio ĝi estas?” demandis la Doktoro.

“Ĝi estas por montri ke mi faris ion kuraĝan — kaj specialan”, diris la hirundo modeste.

“Ho, mi komprenas”, diris la Doktoro. “Simile al medalo, ĉu?”

“Jes. Mi nomiĝas Kvipo. Antaŭe ĝi estis simple Kvipo. Nun oni nomas min **Kvipo la Portisto**”, diris la malgranda birdo, fiere rigardante sian malgrandan dikan blankan kruron.

“Bonege, Kvipo”, diris la Doktoro. “Mi gratulas vin. Nun mi ellitiĝu. Mi havas multegan laboron farendan. Ne forgesu diri al Rapidulo ke mi renkontos lin sur la ŝipo je la deka horo. Ĝis! Ho, kaj ĉu vi bonvolos peti Dab-Dabon, elirante, forpreni la manĝilojn? Mi ĝojas ĉar vi venis. Vi donis al mi ideon. Ĝis!”

Kaj kiam Dab-Dabo kaj Jipo venis forpreni la pleton ili trovis la Doktoron razanta sin. Li rigardis per spegulo, tenis la finaĵon de sia nazo kaj murmuris al si: “Jen la ideo por la

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Fantipa Fremdlanda Poŝtoservo — kial mi ne elpensis ĝin antaŭe? Mi havos la plej rapidan transmaran poŝtoservon iam viditan en la mondo. Ho, kompreneble! — **La Hirunda** Poŝto!”



Vestinte kaj razinte sin la Doktoro tuj iris al sia ŝipo kaj renkontis Rapidulon.

“Min multege bedaŭrigas, Rapidulo”, diris li, “aŭdi kiom da malfacilo mi donas al vi birdoj pro mia prokrasto ĉi tie. Sed vere mi sentas ke la poŝta afero devas esti prizorgata, sciu. Ĝia stato estas aĉa — tute vere ĝi estas”.

“Mi scias”, diris Rapidulo. “Kaj se ni povus ni nestus ĉi tie mem por ne ĝeni vin, kaj ne okupus nin per veturo al Anglujo ĉijare. Ne ege gravus la manko de unu somero en la nordo. Sed, komprenu, ni hirundoj ne povas bone nesti en arboj. Al ni plaĉas nesti en domoj kaj brutdomoj kaj konstruaĵoj”.

“Ĉu vi ne povas uzi la domojn de Fantipo?” demandis la Doktoro.

“Ne bone”, diris Rapidulo. “Ili estas tre malgrandaj kaj bruplenaj — pro la indiĝenaj infanoj kiuj ludas ĉe ili dum la tuta tago. La ovoj kaj gejunuloj ne estus sekuraj eĉ dum minuto. Kaj, krome, ili estas malĝuste konstruitaj por ni — plejparte el greso, la tegmentoj misdeklivas, la aleroj tro proksimas al la tero, kc. Kio plaĉas al ni estas solidaj anglaj konstruaĵoj, kie la homoj ne krias kaj bruas kaj tamburas tuttage — trankvilaj konstruaĵoj, kiaj malnovaj brutejoj kaj staloj, kie, se efektive iam venas homoj, ili venas dece kaj digne, venante kaj forirante je regulaj horoj. Ni ŝatas homojn, komprenu — en lokoj konvenaj por ili. Sed nestantaj patrinbirdoj devas havi trankvilon”.

“Humf! Mi komprenas”, diris la Doktoro. “Kompreneble, mi mem ja ĝuas la ĝojemon de la fantipanoj. Tamen mi bone komprenas vian punkton. Sed jen, ĉu taŭgus mia malnova ŝipo? Tio devus esti sufiĉe trankvila por vi. Neniu loĝas en ĝi nun. Kaj pensu, ĝi havas amasojn da fendoj kaj truoj kaj anguloj kie vi povus konstrui viajn nestojn. Kion vi opinias?”

“Estus bonege”, diris Rapidulo — “se vi ne bezonos la boaton post kelkaj semajnoj. Kompreneble neniel eblus se, post la konstruo de la nestoj kaj la demeto de la ovoj, vi eltirus la ankron kaj forvelus — la gejunuloj marmalsaniĝus”.

“Ne, kompreneble ne”, diris la Doktoro. “Sed nenial mi foriros dum la proksima venonteco. Vi povos havi la tutan ŝipon por vi mem, kaj neniu ĝenos vin”.

“Bone”, diris Rapidulo. “Mi ordonos la hirundojn tuj komenci nestokonstruadon. Sed, kompreneble, ni akompanos vin al Anglujo kiam vi pretos, por montri al vi la vojon — kaj ankaŭ por instrui al la gejunuloj la vojon. Sciu, la novaj birdoj de ĉiu jaro faras sian unuan revenon el Anglujo al Afriko kun ni plenkreskuloj. Ili devas fari la unuan veturon gvidate de ni”.

“Tre bone”, diris la Doktoro. “Do estas decidite. Nun mi devas reiri al la poŝtoŝtacio. La ŝipo estas via. Sed tuj post la nestado venu sciigi min, ĉar mi havas tre specialan ideon pri kiu mi deziras paroli kun vi”.


Do la boato de la Doktoro nun fariĝis nestoŝipo por la hirundoj. Kviete ĝi staris ankrite en la trankvila akvo de Haveno Fantipa, dum multaj miloj da hirundoj konstruis siajn nestojn en la rigo, en la ventumiloj, en la lukoj, kaj en ĉiu fendo kaj angulo ĝiaj. Neniu proksimiĝis al ĝi kaj la hirundoj estis solaj en ĝi. Kaj poste ili konsentis ke ili trovis ĝin la plej bona nestoloko kiun iam ili uzis.

Tre baldaŭ la ŝipo estis kurioza kaj eksterordinara vidaĵo pro la kotaj nestoj ĉie kroĉitaj al ĝi kaj miloj da birdoj ĉirkaŭflugantaj la mastojn, venante kaj irante, konstruante hejmojn kaj manĝigante siajn idojn.

Kaj la kultivistoj tra tuta Anglujo tiujare diris ke la sekva vintro estos malfacilega ĉar la hirundoj nestis alilande antaŭ ol alveni kaj restis nur kelkajn aŭtunajn semajnojn en la nordo.

Kaj poste, post la nestado, estis pli ol duoble tiom da birdoj kiom antaŭe, kompreneble. Kaj oni neniel povus suriri la ŝipon pro la tunoj da koto sur ĝi.

Sed la gepatraj birdoj, tuj kiam la idoj povis flugi, devigis



LA POŬTO DE DOKTORO DOLITTLE

siajn infanojn purigi la lokon. Kaj ĉiom de la koto estis forprenita kaj faligita en la havenon, peco post peco. Kaj la ŝipo de la Doktoro troviĝis pli pura ol iam antaŭe dum ĝia tuta ekzisto.

Nu, unu tagon la Doktoro venis al la poŝtoŝicejo, kiel kutime, je la naŭa horo matene. (Li devis esti tie je tiu horo, ĉar alie la poŝtistoj ne komencus labori.) Kaj ekster la poŝtoŝicejo li trovis Jipon mordanta oston sur la pavimo. Io kurioza pri la osto trafis la Doktoron, kiu, kompreneble, ĉar li estis naturosciencisto, estis specialisto pri ostoj. Li petis Jipon permesi lin ekzameni ĝin.

“Nu, estas eksterordinare!” diris la Doktoro, tre zorge ekzamenante la oston. “Mi ne sciis ke tiu speco de bestoj ankoraŭ troveblas en Afriko. Kie vi akiris ĉi tiun oston, Jipo?”

“Tie en Neniujo”, diris Jipo. “Estas multaj ostoj tie”.

“Kaj kie estas Neniujo?” diris Johano Dolittle.

“Neniujo estas tiu ronda insulo tuj ekster la haveno”, diris Jipo — “tiu aspektanta prunpudingo”.

“Ho, jes”, diris la Doktoro. “Mi rekonas la insulon kiun vi priparolas. Ĝi ne estas tre distanca de la ĉeftero. Sed mi ne aŭdis ke ĝi nomiĝas tiel. Humf! Se vi pruntedonos al mi ĉi tiun oston provizore, Jipo, mi volas konsulti la Reĝon pri ĝi”.

Do, preninte la oston, Johano Dolittle iris viziti Reĝon Koko, kaj Jipo petis kunveni. Ili trovis la Reĝon sidanta ĉe la pordo de la palace, suĉanta stangobombonon — ĉar li, same kiel ĉiuj fantipanoj, tre ŝatis frandaĵojn.

“Bonan matenon, Via Moŝto”, diris la Doktoro. “Ĉu hazarde vi scias de kiu speco de besto ĉi tiu osto venis?”

La Reĝo ekzamenis ĝin, kaj kapneis. Li sciis malmulton pri ostoj.

“Eble de bovino”, diris li.

“Ho, certe ne”, diris Johano Dolittle. “Neniu bovino iam havis tian oston. Tio estas makzelo — sed ne makzelo de bovino. Aŭskultu, Via Moŝto, ĉu vi bonvolos pruntedoni al mi kanuon kaj kelkajn pagajistojn? Mi volas transiri viziti Nenujojn”.

Mirige al la Doktoro la Reĝo sufokiĝis pro sia stangobombono kaj preskaŭ retrofalis sur sia seĝo. Post tio li kuris en la palacon kaj fermis la pordon.

“Eksterordinarege!” diris Johano Dolittle, tute konfuzita. “Kio ĝenas tiun ulon?”

“Nu, estas ia blagaĵo”, grumblis Jipo. “Ĉi tiuj indiĝenoj estas tre superstiĉaj. Ni iru al la haveno, Doktoro, kaj provu lui kanuon por transporti nin”.

Do ili iris al la rando de la akvo kaj petis plurajn el la kanuistoj transporti ilin al Neniujo. Sed ĉiu kiun ili petis ege ektimis kaj rifuzis paroli kiam la Doktoro diris al ili kien li volas ili. Ili eĉ rifuzis luigi al li siajn kanuojn por iri tien sola.

Fine ili trovis unu tre maljunan boatiston kiu tiom amis babiladi ke, kvankam li ege timis kiam Johano Dolittle menciis Nenujojn, li fine diris al la Doktoro la kialon de tiu eksterordinara konduto.

“Tiu insulo”, diris li — “ni eĉ ne mencias ĝian nomon se ne neprege necesas — estas la tero de Malbona Magio. Ĝi nomiĝas (la maljunulo flustris ĝin tiom mallaŭte ke la Doktoro apenaŭ povis aŭdi lin) Nenujo, ĉar neniu loĝas tie. Neniu eĉ iam iras tien”.

“Sed kial?” demandis la Doktoro.

“**Drakoj loĝas tie!**” diris la maljuna boatisto, kun siaj okuloj larĝe malfermitaj kaj gapantaj — “enormaj kornohavaj drakoj, kiuj kraĉas fajron kaj manĝas homojn. Se vi valorigas vian vivon neniam iru proksime al tiu terura insulo”.

“Sed kiel vi scias ĉion ĉi”, demandis la Doktoro, “se neniu iam iris tien por trovi ĉu aŭ ne ĝi veras?”

“Antaŭ mil jaroj”, diris la Maljunulo, “kiam Reĝo Kakabuĉi regis ĉi tiun landon, li metis sian bopatrino sur tiun insulon por loĝi tie, ĉar ŝi tiom parolemegis ke li ne povis toleri ŝin en la palaco. Estis aranĝite ke oni portos manĝaĵojn al ŝi ĉiusemajne. Sed la unuan semajnon kiam la viroj iris tien en kanuoj ili trovis nenian spuron ŝian. Dum ili serĉis ŝin ĉie en la insulo, drako subite muĝegis el inter la arbustoj kaj atakis lin. Ili nur apenaŭ eskapis vivaj, kaj reiris al Fantipo kaj informis Reĝon Kakabuĉi. Oni konsultis faman sorĉiston, kaj li diris ke sendube la bopatrino mem de la Reĝo ŝanĝiĝis en drakon per ia magio. De tiam ŝi naskis multajn infanojn, kaj la insulon loĝas drakoj — **kies manĝaĵo estas homoj!** Ĉar kiam ajn kanuo proksimiĝas, la drakoj venas al la bordo, spirante flamojn kaj detruon. Sed jam de multaj centoj da jaroj neniu homo surteriĝas tie. Tial ĝi nomiĝas — nu, vi scias”.

Dirinte tiun historion la maljunulo forturnis sin kaj okupis sin per sia kanuo, kvazaŭ timante ke la Doktoro denove petos lin pagi lin al la insulo.

“Atentu, Jipo”, diris Johano Dolittle, “vi diris ke vi akiris tiun oston ĉe Neniujo. Ĉu vi vidis drakojn tie?”

“Ne”, diris Jipo. “Mi naĝis tien hieraŭ — nur por malvarmetigi min. Estis varmega tago hieraŭ. Kaj tie mi ne iris multe internen de la insulo. Mi trovis multajn ostojn sur la strando. Kaj ĉar ĉi tiu odoris bone al mi, mi prenis ĝin kaj renaĝis ĉi tien kun ĝi. Min pli interesis la osto kaj la naĝo ol la insulo, verdure”.

“Estas eksterordinarege”, murmuris la Doktoro — “tiu legendo pri la insulo. Ĝi des pli fervorigas min iri tien. Ankaŭ tiu osto interesas min, ege. Mi nur unufoje vidis alian similan — tio estis en muzeo de naturhistorio. Ĉu ĝenus vin se mi konservus ĝin, Jipo? Al mi plaĉus meti ĝin en mian propran muzeon post la reveno al Puddleby”.

“Tute ne”, diris Jipo. “Atentu, Doktoro, se ni ne povos havigi kanuon, vi kaj mi naĝu al la insulo. Ĝi ne estas pli ol du kaj duonan kilometrojn for, kaj ni ambaŭ estas bonaj naĝantoj”.

“Ne malbona ideo, Jipo”, diris la Doktoro. “Ni promenu laŭ la bordo ĝis ni estos rekte kontraŭ la insulo, tiel ke ni bezonos nur plej mallonge naĝi”.

Do ili formarŝis. Kaj kiam ili atingis la plej bonan lokon sur la bordo la Doktoro demetis ĉiujn siajn vestojn kaj, kunliginte ilin kvazaŭ pakon, li ligis ilin al sia kapo, kun la karega alta ĉapelo ĉe la plejsupro. Post tio li vadis en la akvon kaj, kun Jipo apude, li komencis naĝi cele la insulon.

Nu tiu specifa parto de la akvo kiun ili provis transiri estis tre malbona loko por naĝado. Kaj post proksimume kvarono de horo Jipo kaj la Doktoro trovis sin trenataj en la maron fare de potenca fluo. Ili plejpenegis atingi la insulon, sed tute sen sukceso.

“Lasu vin drivi, Doktoro”, anhelis Jipo. “Ne malŝparu vian forton penante kontraŭbatali la fluon. Lasu vin drivi. Eĉ se ni portiĝos preter la insulon en la maron ni povos surteriĝi sur la ĉeftero ĉe alia parto de la bordo, kie la fluo ne estas tiom forta”.

Sed la Doktoro ne respondis. Kaj Jipo povis vidi per lia vizaĝo ke liaj forto kaj spiro preskaŭ elĉerpiĝis.

Tiam Jipo kiel eble plej laŭte bojis, esperante ke eble Dab-Dabo aŭdos lin sur la ĉeftero kaj elflugos kaj alvenigos helpantojn. Sed, kompreneble, ili estis multe tro malproksimaj de la vilaĝo por ke iu aŭdu.

“Retroturru vin, Jipo”, anhelis la Doktoro. “Ne vin ĝenu pri mi. Mi sukcesos sufiĉe. Retroturru vin kaj penu atingi la bordon”.

Sed Jipo tute ne intencis retroturri sin kaj lasi la Doktoron droni — kvankam li ne povis elpensi ian ajn eblon savi lin.

Baldaŭ la buŝo de Johano Dolittle pleniĝis per akvo, kaj li komencis ŝprucadi kaj glugli

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

kaj Jipo multe timis. Sed ĝuste kiam la okuloj de la Doktoro komencis sin fermi kaj li ŝajnis tro malforta por naĝi eĉ iomete pli, io kurioza okazis. Jipo sentis ion suprenveni sub la akvo, ĝuste sub liaj piedoj, kaj levi lin kaj la Doktoron malrapide el la maro, kvazaŭ la leviĝanta ferdeko de submarŝipo. Supren kaj pli supren ili leviĝis, nun jam tute super la akvo. Kaj anhelante kaj sterniĝinte flank-al-



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

flanke, ili rigardis unu la alian tute miregante.

“Kio ĝi estas, Doktoro?” diris Jipo, rigardante malsupren al la strangaĵo, kiu nun ĉesis supreniĝi kaj portas ilin kvazaŭ ŝipo, rekte trans la potencan fluon, direkte al la insulo.

“Mi tute ne — ha — neniel — ha — konceptas kio ĝi estas”, anhelis Johano Dolittle. “Ĉu eble ĝi estas baleno? Ne, ĉar la haŭto ne estas balena. Ĉi tio estas felo”, li diris, pluke tirante la aĵon sur kiu li sidas.

“Nu, ĝi estas ia speco de besto, ĉu ne?” diris Jipo. “Sed kie estas ĝia kapo?” kaj li rigardis laŭ la longa kurba dorso kiu etendiĝis laŭ plata kurbo antaŭ ili almenaŭ tridek metrojn.

“Ĝia kapo estas sub la akvo”, diris la Doktoro. “Sed jen ĝia vosto, vidu, malantaŭ ni”.

Kaj turninte sin Jipo vidis la plej longan voston kiuniam havis vivanta besto, batantan la akvon kaj pelantan ilin cele la insulon.

“Mi scias!” kriis Jipo. “Ĝi estas la drako! Ni sidas sur la bopatrino de Reĝo Kakabuĉi!”

“Nu, ĉiukaze, dankende ŝi akurate leviĝis!” diris la Doktoro, skuante la akvon el siaj oreloj. “Neniam en mia ĝisnuna vivo mi estis tiom proksima al droniĝo. Mi supozas ke mi devas iom pli elegantigi min antaŭ ol ŝi levos sian kapon el la akvo”.

Kaj, preninte siajn vestojn de sia propra kapo, la Doktoro pliĝustigis la aspekton de la alta ĉapelo kaj vestis sin, dum la strangaĵo kiu estis savinta iliajn vivojn portis ilin senpaŭze kaj firme cele la misteran insulon.

Fine la eksterordinara besto kiu estis veninta savi ilin atingis la insulon, kaj kun Jipo kaj la Doktoro

ankoraŭ kroĉantaj sin al lia dorso, li rampis el la akvo kaj sur la strandon.

Kaj tiam Johano Dolittle, vidante la unuan fojon ĝian kapon, elkriis ege ekscitite:

“Jipo, je mia vivo, ĝi estas kvifenodoĥo!”

“Kvifenodo-ki-o?” demandis Jipo.

“Kvifenodoĥo”, diris la Doktoro — antaŭhistoria besto. Naturosciencistoj kredis ilin formortintaj — ke neniu plu vivas ie en la mondo. Estas granda tago, Jipo. “Min ĝojigas ke mi venis ĉi tien”.

La giganta besto nomata drako de la fantipanoj estis tute grimpinta sur la strandon kaj staris kun sia plena strangeeco tute rigardebla. Unue li aspektis kurioza miksaĵo de krokodilo kaj ĝirafo. Li havis nelongajn, apartigitajn krurojn, sed longegajn voston kaj kolon. Sur lia kapo estis du dikaj malgrandaj kornoj.

Tuj kiam la Doktoro kaj Jipo malgrimpis lian dorson li turnis sian kapon ĉe la finaĵo de tiu enorma kolo kaj diris al la Doktoro:

“Ĉu vi bone statas nun?”

“Jes, dankon”, diris Johano Dolittle.

“Mi timis”, diris la besto, “ke mi ne akurate atingis vin por savi vian vivon. Mia frato estis la unua kiu vidis vin. Ni supozis ke temas pri indiĝeno, kaj ni pretis fari por li nian kutiman teruran saluton. Sed dum ni rigardis de malantaŭ la arboj mia frato ekkriis ‘Jadi! Tiu estas Doktoro Dolittle — kaj li dronas. Vidu, kiel li svingas siajn brakojn! Li estas savenda je kia ajn kosto. Homo kia li ne naskiĝas en milo da jaroj! Ni atingu lin, hastu!’ Tiam ĝenerale disvastiĝis tra la insulo ke Johano Dolittle, la granda doktoro, dronas en la markolo. Kompreneble, ni ĉiuj jam antaŭe aŭdis pri vi. Kaj, rapidinte al sekreta kreko, kiun ni havas ĉe la ekstremaĵo de la insulo, ni plonĝis en la maron kaj naĝis al vi subakve. Mi plej bone naĝis kaj la unua atingis vin. Mi ege ĝojas ke mi atingis vin bontempe. Ĉu vi certas ke vi statas bone?”

“Ho, tute”, diris la Doktoro, “dankon. Sed kial vi naĝis subakve?”

“Ni volis ke la indiĝenoj ne vidu nin”, diris la stranga besto. “Ili kredas ke ni estas drakoj — kaj ni lasas ilin plu kredi tion. Ĉar pro tio ili ne proksimiĝas al la insulo, kaj ni havas nian landon por ni mem”.

La besto etendis sian longan kolon eĉ pli kaj flustris en orelon de la Doktoro:

“Ili kredas ke homoj estas nia manĝaĵo kaj ke ni elspiras fajron! Sed kion ni vere manĝas estas nur bananoj. Kaj kiam ajn iu provas veni ĉi tien ni iras al kava spaco en la mezo de la insulo kaj enspiras la nebulon, kiu ĉiam troviĝas tie. Post tio ni revenas al la strando kaj muĝas kaj freneze ĉirkaŭkuras. Kaj ni elspiras la nebulon tra niajn nazojn, kaj ili kredas ke ĝi estas fumo. Tiel ni tenas ĉi tiun insulon por ni mem jam de mil jaroj. Kaj nur ĉi tie en la mondo ni plu vivas — kie ni povas vivi en paco”.


“Kiom interese!” diris la Doktoro. “La naturosciencistoj ĝis nun kredis ke via speco de bestoj ne plu vivas, sciu. Vi estas kvifenodoĥoj, ĉu ne?”

“Ho ne”, diris la besto. “La kvifenodoĥoj formortis antaŭ longe. Ni estas la pifilosaŭroj. Ni havas po ses piedfingroj sur la malantaŭaj piedoj, kaj la kvifenodoĥoj havis nur kvin. Ili formortis antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj”.

“Sed kie estas la aliaj el via popolo?” demandis la Doktoro. “Ĉu vi ne diris ke multaj naĝis por savi nin?”

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Jes”, diris la pifilosaŭro; “sed ili restis kaŝite sub la akvo, por ke la indiĝenoj sur la ĉeftero ne vidu kaj eksciu ke la mal-



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

nova rakonto pri la bopatrino de la drako estas malvera. Dum mi alportis vin ĉi tien, ili naĝadis tute ĉirkaŭ vi subakve, pretaj helpi se mi bezonos ilin. Ili nun ĉirkaŭnaĝis al la sekreta kreko tiel ke ili povos surteriĝi nevidate. Ankaŭ ni devus tre baldaŭ foriri de ĉi tie. Neprege ni ne estu videblaj de sur la ĉeftero, por ke la indiĝenoj ne venu ĉi tien. Ni pereus se tio okazus, ĉar — mi diras sekreton — kvankam ili kredas nin tiom timigaj, verdire ni estas pli maldanĝeraj ol ŝafoj”.

“Ĉu ankaŭ aliaj bestoj loĝas ĉi tie?” demandis la Doktoro.

“Ho, jes, ja”, diris la pifilosaŭro. “Sur ĉi tiu insulo loĝas nur maldanĝeraj vegetalmangantaj bestoj. Se ni havus la aliajn kompreneble, ni ne longe daŭrus. Sed venu, mi gvidos vin tra la insulo. Ni kviete iru laŭ tiu valo, por ke ni ne estus videblaj antaŭ ol atingi la arbaron”.

Tiam Johano Dolittle kaj Jipo estis gviditaj de la pifilosaŭro tra la tuta insulo Neniujo.

La Doktoro poste diris ke neniam li spertis pli agrablan kaj instruplenan tagon. La bordo de la tuta insulo estis alta kaj kruta, kio donis al ĝi la aspekton menciitan de Jipo — de prunpudingo. Sed en la centro, supre, estis profunda plaĉa kava regiono, nevidebla de la maro kaj protektata kontraŭ la vento. En tiu granda bovlo, almenaŭ kvindek kilometrojn larĝa, vivas la pifilosaŭroj pace jam de mil jaroj, manĝante maturajn bananojn kaj ludante en la sunlumo.

Apud la bordoj de la riveretoj al la Doktoro montriĝis grandaj gregoj da hipopotamoj, manĝantaj la bongustajn fragmitojn kreskantajn ĉe la rando de la akvo. En la larĝaj gresaj kampoj paŝtis sin elefantoj kaj rinoceroj. Sur la deklivaĵoj kie la arbaroj maldensis li rimarkis longakolajn ĝirafojn, manĝantajn arbofoliojn. Simioj kaj ĉiaj cervoj abundis. Kaj birdoj svarmis ĉie. Efektive, ĉia besto kiu ne manĝas viandon estis tie, vivante pace kaj feliĉe kun la aliaj en ĉi tiu lando kie abundas vegetaloj kaj la ĝena tretado de homoj neniam aŭdiĝas.

Starante ĉe la supro de la monteto kun Jipo kaj la pifilosaŭro apud si, la Doktoro rigardis la larĝan bovlon plenan de kontentaj bestoj kaj suspiris.

“Ĉi tiu bela lando ankaŭ povus nomiĝi la ‘Paradizo por Bestoj’”, li murmuris. “Longe nur ili ĝuu ĝin! Ĉi tio estu, tutvere, **Neniujo** por ĉiam!”

“Vi, Doktoro”, diris la basa voĉo de la pifilosaŭro apud lia kubuto, “estas de mil jaroj la sola homo staranta ĉi tie. La lasta estis la bopatrino de Reĝo Kakabuĉi”.

“Krome, kio efektive okazis al ŝi?” demandis la Doktoro. “La indiĝenoj kredas ke ŝi ŝanĝiĝis en drakon, sciu”.

“Ni edzinigis ŝin”, diris la granda besto, pigre manĝetante lilitrunketon. “Ni ne povis toleri ŝin, ne pli ol la Reĝo. Dum via tuta vivo vi neniam aŭdis iun tiom senĉese paroli. Jes, unu senluman nokton ni portis ŝin permare longe laŭ la bordo de Afriko kaj lasis ŝin ĉe la palacpordo de surda reĝo, kiu regis malgrandan landon sude de Rivero Kongo. Li edzinigis ŝin. Kompreneble, ĉar li estis surda, lin tute ne ĝenis ŝia konstanta babilado”.

Kaj nun dum pluraj tagoj la Doktoro plene forgesis sian poŝtolaboron kaj Reĝon Koko kaj sian ankritan ŝipon, kaj ĉion alian. Ĉar lin plene okupadis, de la mateno ĝis la nokto, la multegaj bestoj kiuj volis konsulti lin pri diversaj aferoj.

Multaj el la ĝirafoj suferis pro doloraj piedoj, kaj li montris al ili kie trovi specialan radikon kiu metebblas en piedbanon kaj tuj sendolorigas. La kornoj de la rinoceroj kreskadis tro longaj, kaj Johano Dolittle klarigis al ili ke frotante la kornojn kontraŭ certa speco de ŝtono kaj manĝante malpli da herboj kaj pli da beroj, ili povos malgrandigi la kornokreskon. Speciala speco de nuksarbo kiun amis la cervoj estis maloftiĝinta kaj preskaŭ pereis pro konstanta manĝiĝo. Kaj la Doktoro montris al la ĉefaj vircervoj ke, se ili prenos kelkajn nuksojn kaj puŝos ilin en la molan teron per siaj piedoj antaŭ la komenco de la pluvsezono, ili kreskigos novajn arbojn kaj tiel pliigos ilin. Unu tagon dum li eltiris malfiksan denton por beba hi-

popotamo per sia horloĝĉeno, Rapidulo-la-Tanĝema ekvenis, aspektante iom ĉagrenita.

“Nu”, diris la bela birdeto, stariĝanta sur la tero ĉe liaj piedoj, “Fine mi trovis vin, Doktoro. Mi traserĉis

“Ho, saluton, Rapidulo”, diris la Doktoro. “Plezurigas min revidi vin. Ĉu vi volis min por io speciala?”

“Nu, kompreneble jes”, diris Rapidulo. “Ni finis la nestosezonon antaŭ du tagoj, kaj vi diris ke vi volas paroli kun mi pri speciala afero tuj post ĝia finiĝo. Mi iris al via domo, sed Dab-Dabo tute ne sciis kie vi eble estas. Fine mi aŭdis kelkajn klaĉantajn boatistojn ĉe la haveno diri ke vi venis al ĉi tiu insulo antaŭ kvin tagoj kaj neniam revenis. Ĉiuj fantipanoj kredas vin pereinta. Ili diris ke nepre vin manĝis la drakoj kiuj loĝas ĉi tie. Mi ektimegis — kvankam, kompreneble, mi ne plene kredis la rakonton pri drakoj. Tamen, vi forestis tiom longe ke mi ne sciis kion kredi. La poŝtoŭicejo, kiel vi povas imagi, estas eĉ pli malorda ol antaŭe”.

“Humf!” diris la Doktoro, kiu nun estis eltirinta la malfiksan denton kaj montris al la beba hipopotamo kiel tralavi la buŝon en la rivero. “Mi bedaŭras. Mi supozas ke mi devus esti sendinta mesaĝon al vi. Sed mi estis tiom ege okupata. Ni iru en la ombron de tiuj palmoj kaj sidiĝu. Pri la poŝto mi volis paroli kun vi”.



Do la Doktoro kaj Jipo kaj Rapidulo-la-Tanĝema sidiĝis en la ombro de la palmoj, kaj unu-afoje la planoj estis diskutataj pri tiu granda servo kiu koniĝos kiel la Hirunda Poŝto.

“Nu, mia ideo, Rapidulo, estas ĉi tio:” diris la Doktoro. “Regula eksterlanden iranta poŝto estas malfacila por la Poŝto de Fantipo, ĉar treege malmultaj boatoj haltas tie por alporti aŭ forpreni la poŝtaĵojn. Nu, supozu ke vi, la hirundoj, portus la leterojn?”

“Nu”, diris Rapidulo, “tio ja estus ebla. Sed, kompreneble, ni povus fari ĝin nur dum certaj monatoj de la jaro dum ni estas en Afriko. Kaj tiam ni povus porti leterojn nur al la mildaj kaj varmetaj landoj. Ni frostiĝus se ni devus porti poŝtaĵojn al lokoj kie okazas severaj vintroj”.

“Ho, kompreneble”, diris la Doktoro. “Mi ne atendus ke vi faru tion. Sed mi pensis ke eble nin povus helpi la aliaj birdoj — malvarm-klimataj birdoj, varmeg-klimataj kaj mild-klimataj birdoj. Kaj se iuj el la veturoj estus tro longaj aŭ malagrablaj por unu speco de birdoj, ni povus sendi la poŝtaĵojn stafete. Ekzemple, leteron irantan de ĉi tie al Norda Poluso la hirundoj povus porti ĝis la nordo de Afriko. De tie ĝin prenos turdoj ĝis la nordo de Skotlando. De tie mevoj prenos ĝin de la turdoj kaj portus ĝin ĝis Groenlando. Kaj de tie pingvenoj portus ĝin al Norda Poluso. Kion vi opinias?”

“Mi kredas ke tio sukcesus”, diris Rapidulo, kondiĉe ke ni povus akceptigi la ideon al la aliaj birdoj”.

“Nu, sciu”, diris Johano Dolittle, mi kredas ke ni povus, ĉar ni povus uzi la poŝtoservon por la birdoj mem, kaj ankaŭ la bestoj, kaj ne nur la fantipanoj, por sendi iliajn leterojn”.

“Sed, Doktoro, birdoj kaj bestoj ne sendas leterojn”, diris Rapidulo.

“Ne”, diris la Doktoro. “Sed ili ja povus komenci. Iam an-



kaŭ homoj nek skribis nek sendis leterojn. Sed tuj kiam ili komencis ili trovis ĝin tre utila. Ankaŭ la birdoj kaj bestoj trovas tion. La ĉefoficejo povus esti ĉi tie sur ĉi tiu bela insulo — en ĉi tiu Paradizo por Bestoj. Sciu, mia ideo estas, unue, poŝta sistemo por la eduko kaj plibonigo de la Besta Regno, kaj, due, bona eksterlandeca poŝto por la fantipanoj. Ĉu vi kredas ke ni iel povus elpensi metodon per kiu birdoj povus skribi leterojn?”

“Ho, jes, tion mi kredas”, diris Rapidulo. “Ni hirundoj, ekzemple, ĉiam lasas signojn sur domoj kie ni nestis, la signoj estas mesaĝoj por hirundoj kiuj eble sekvos nin. Vidu:” Rapidulo gratis kelkajn krucojn kaj signojn en la sablo ĉe la piedoj de la Doktoro — “tio signifas **‘Ne konstruu vian neston en ĉi tiu domo. Kato loĝas ĉi tie!’** Kaj ĉi tio:” la Rapidulo faris kvar pliajn signojn en la sablo — “tio signifas **‘Bona domo. Muŝoj abundas. Homoj kvietaj. Konstrukoto troveblas malantaŭ la stalo.’**”

“Bonege”, kriis la Doktoro. “Estas ia stenografio. Vi diras plenan frazon per kvar signoj”.

“Kaj, plue”, Rapidulo daŭrigis, “preskaŭ ĉiuj aliaj specoj de birdoj havas propran signolingvon. Ekzemple, la alcedoj uzas metodon signi la arboj laŭlonge de rivero por indiki kie estas bona fiŝkaptado. Kaj la turdoj ankaŭ havas signojn; mi ofte vidas signon sur ŝtonoj signifantan **‘Krevigu viajn helikkonkojn ĉi tie’**. Estas por ke la turdoj ne disĵetu siajn helikkonkojn ĉie kaj tiel devigi la vivajn helikojn sin kaŝi pro timo”.

“Jen, do”, diris la Doktoro. “Mi ĉiam kredis ke vi birdoj havas almenaŭ la komencon de skriba lingvo—ĉar vi estas tiom lertaj. Nun ni nur bezonas prepari norman sistemon de birdo-skribo surbaze de tiuj signoj. Kaj mi tute ne dubas ke ni povos same agi rilate al la bestoj. Poste, ni funkcigos la Hirundan Poŝton, kaj la bestoj kaj birdoj en la tuta mondo sendos leterojn inter si—kaj ankaŭ al homoj, se ili deziras”.

“Mi suspektas”, diris Rapidulo, “ke plejparte la leteroj es-



estos por vi, Doktoro. “Ĉie en la mondo mi renkontis birdojn kiuj volas scii kiel vi aspektas, kion vi manĝas matene, kaj ĉiajn stultaĵojn pri vi”.

“Nu”, diris la Doktoro. “Tio ne ĝenos min. Sed mia ideo unuavice estas por eduki. Pro bona poŝta sistemo propra, mi kredas ke la kondiĉo de la birdoj kaj bestoj multe pliboniĝos. Hodiaŭ mem, ekzemple, kelkaj cervoj sur ĉi tiu insulo demandis al mi kion fari pri siaj nuksoj kiuj preskaŭ elmanĝiĝis. Mi tuj montris al ili kiel planti semojn kaj kreskigi pli da arboj. Ĵadi, kiom longe al ili mankis nuksoj? Se ili nur povus skribi al mi, mi povus jam antaŭ longe informi ilin—per Hirunda Poŝto”.

Poste la Doktoro kaj Jipo reiris al Fantipo, portate de la pifilosaŭro, kiu surbordigis ilin dumnokte, por ke neniu vidu ilin. Kaj en la mateno Johano Dolittle denove vizitis la Reĝon.

“Via Moŝto”, diris la Doktoro, “mi nun havas planon provizi al via lando bonegan alilanden poŝtoservon, si vi akceptos mian sugeston”.

“Bone”, diris la Reĝo. “Mia Moŝto aŭskultas. Parolu. Bonvolu preni stangobombonon”.

La Doktoro prenis ĝin—verdan—el la skatolo kiun la Reĝo etendis al li. Reĝo Koko multe fieris pro la kvalito de siaj stangobombonoj—fabrikataj en la Reĝa Frandaĵo-Kuirejo. Neniam mankis al li tiaĵo, li ĉiam portis ĝin ĉirkaŭ sia kolo ligitan al rubando. Kaj kiam li ne suĉis ĝin, li kutimis meti ĝin antaŭ sian okulon por rigardi siajn korteganojn. Li vidis blankulojn uzi monoklojn, kaj li postulis ke la stangobombonoj estu maldikaj kaj travideblaj, tiel ke li povis uzi ilin elegante tiel. Sed konstanta suĉado de stangobombonoj ruinigis lian aspekton ke ege dikigis lin. Tamen, ĉar dikeco opiniigis indiko de graveco, en Fantipo, tio ne ĝenis lin.

“Mia plano”, diris la Doktoro, “estas jena: la enlandan poŝton de Fantipo, post iom pli da mia instruado al la poŝtistoj, povas prizorgi via popolo mem. Sed prizorgi la alilandan kiel ankaŭ la enlandan poŝton estas tro malfacile por ili. Kaj krome, tro malmultaj boatoj haltas ĉe via haveno. Do mi proponas konstrui flosantan poŝtoficejon por la alilanda poŝto, ankritan proksime al la insulo nomata”—(la Doktoro preskaŭ haltigis sian mencion de la terura nomo)—“e-, a- proksime al la insulo pri kiu mi parolis al vi antaŭe”.

“Tio ne plaĉas al mi”, diris la Reĝo, fruntosulkante.

“Via Moŝto ne bezonas timi”, la Doktoro rapide diris. “Neniam necesos ke regnano via suriru la insulon. La alilanda poŝtoficejo estos flosanta domo ankrita for de la bordo. Kaj mi tute ne bezonos fantipajn poŝtistojn por ĝi. Male, mi insistas ke laŭ via dekreto, tiu—e-,—la insulo pri kiu ni parolas, estu nevizitita por ĉiam. Mi funkciigos la alilandan poŝtoficejon laŭ mia propra metodo—uzante specialajn poŝtistojn miajn. Kiam fantipanoj volos sendi leterojn al aliaj landoj, ili devos veni per kanuoj kaj porti ilin al la flosanta poŝtoficejo. Sed envenintaj leteroj adresitaj al la homoj en Fantipo liveriĝos al la pordoj de iliaj domoj laŭ la normala metodo. Kion vi pensas pri tio?”

“Mi akceptas”, diris la Reĝo. “Sed la poŝtmarkoj senescepte devos montri mian belan vizaĝon, neniun alian”.

“Tre bone”, diris la Doktoro. “Tio fareblos. Sed nepre estu klare komprenate ke ekde nun la alilandan poŝtoservon prizorgos miaj propraj poŝtistoj—laŭ mia metodo. Kaj kiam mi estos ĝuste funkciiginta la enlandan poŝton en Fantipo, vi devos certigi ke ĝi plu funkcios ĝuste. Se vi faros tion, mi kredas ke mi povas promesi ke post kelkaj semajnoj via regno havos la plej bonan poŝtoservon en la mondo”.

Poste la Doktoro petis Rapidulon dissendi mesaĝojn per la birdoj ĉien sur la tero. Kaj peti ĉiujn ĉefojn de la mevoj, paruoj, pigoj, turdoj, petreloj, fringoj, pingvenoj, vulturoj, neĝemberizoj, sovaĝaj anseroj, kaj la ceteraj veni al Neniujo, ĉar Johano Dolittle deziras paroli kun ili.

Kaj intertempe li reiris kaj daŭrigis la laboron bonordigi la enlandan poŝtoservon ĉe la

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

poŝtoŝticejo ĉe Fantipo.

Do bona Rapidulo dissendis mesaĝistojn; kaj tute ĉirkaŭ la mondo kaj reĉirkaŭ informo transdoniĝis de birdo al birdo de Johano Dolittle, la fama kuracisto de bestoj, volas renkonti ĉiujn ĉefojn de ĉiuj specoj de birdoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

Kaj baldaŭ en la granda kavaĵo en la centro de Neniujo ili komencis alveni. Post tri tagoj Rapidulo venis al la Doktoro kaj diris:

“Tute bone, Doktoro, ili pretas por vi nun”.

Bonan fortikan kanuon jam disponigis al la Doktoro la Reĝo, kiu ankaŭ konstruigadis la poŝtoŝticejan flosantan domon laŭ la ordonoj de la Doktoro.

Do Johano Dolittle eniris sian kanuon kaj fine atingis la saman monteton de kiu li antaŭe rigardadis trans la plaĉan kavaĵon de la Paradizo de Bestoj. Kaj kun la Tanĝemulo surŝultre, li rigardis grandan maron da birdaj vizaĝoj — ĉiuj estis ĉefoj — ĉiu speco, de kolibro ĝis albatrosoj — kaj preninte palman folion kaj farinte el ĝi trumpeton, por aŭdigu sin, li komencis sian grandan inaŭguran paroladon al la ĉefoj kiu ekfunkciigos la faman Hirundan Poŝtoservon.

Kiam la Doktoro estis fininta sian paroladon kaj dirinta al la ĉefoj kion li celas fari, la birdoj de la mondo aplaŭdis per fajfado kaj kriĉado kaj flugila batado, tiel ke la bruoj estis terura. Kaj en la stratoj de Fantipo la indiĝenoj disflustris ke la drakoj interbatalas en Neniujo.

Post tio la Doktoro marŝis inter la birdoj kaj, preninte notlibron, li parolis vice al ĉiu ĉefo, demandante al li pri la signoj kaj signolingvo kiun lia propra speco de birdo kutimas uzi. Kaj la Doktoro skribis ĉion en la notlibro kaj prenis ĝin hejmen kun si kaj prilaboradis ĝin tutnokte — promesinte rerenkonti la ĉefojn la sekvan tagon.

Kaj sekvatage, retransirinte al la insulo, li daŭrigis la diskutadon kaj planadon kaj aranĝadon. Estis interkonsentite ke la Hirunda Poŝtoservo havos sian ĉefan oficejon en Neniujo. Kaj ke estos fakoficejoj ĉe Kabo Horna, Groenlando, Kristnaskinsulo, Tahitio, Kaŝmiro, Tibeto, kaj Puddleby-sur-la-Marĉo. Plejparte la poŝto estis tiel aranĝita ke la birdoj kiuj migras aŭ iras al aliaj landoj vintre kaj revenas somere portos la leterojn dum siaj regulaj jarveturoj. Kaj ĉar iu speco de birdoj transiras inter landoj dum preskaŭ ĉiu semajno de la jaro, tio sen malfacilo sufiĉis por la plej multaj poŝtaĵoj.

Kompreneble estis multaj specoj de birdoj kiuj ne foriras el siaj hejmlandoj vintre, sed restas en sia lando tutjare. Iliaj ĉefoj venis speciale gvidate de aliaj birdoj por komplezi la Doktoron per ĉeesto ĉe la granda kunveno. Ili promesis ke iliaj anoj tutjare prizorgos leterojn alportitajn al iliaj landoj por livero. Do per diversaj aranĝoj, plejparte la servo estis aranĝita dum tiuj unuaj du kunvenoj.

Kaj la Doktoro kaj la ĉefoj interkonsentis pri norma speco de facila skribado por ĉiuj birdoj, tiel ke la adresoj sur la kovertoj estos komprenataj kaj legataj de la poŝtobirdoj. Kaj fine Johano Dolittle resendis ilin hejmen, por instrui ĉi tiun novan metodon skribi kaj legi al siaj parencoj, kaj klarigi al la birdoj de la tuta mondo kiel funkcios la poŝto, kaj kiom da helpo, laŭ lia espero, ĝi donos al la edukado kaj plibonigo de la Besta Regno. Post tio li hejmeniris kaj bone dormis.

La sekvan matenon li trovis ke Reĝo Koko estis finpretiginta lian poŝtoŝticejan flosantan domon, kaj ĝi aspektis tre bela. Ĝi estis pagajita kaj ankrita proksime al la bordo de la insulo. Tiam Dab-Dabo, Jipo, Tu-Tuo, Gub-Gubo, la puŝumi-tiruvio kaj la blanka muso estis alvenigitaj, kaj la Doktoro forlasis sian domon sur la ĉefa strato de Fantipo kaj loĝigis sin ĉe la alilanda poŝtoservo por sia cetera loĝado.

Kaj nun Johano Dolittle kaj liaj bestoj okupegis sin per aranĝado de la poŝtejo ĝia meblaro, la poŝtmarko-tirkesto, la poŝtkarto-tirkesto, la pesiloj, la klasifikaj sakoj, kaj ĉia

alia ekipaĵo. Dab-Dabo, kompreneble, estis mastrumisto, kiel kutime, kaj ŝi certigis ke ĉiumatene la poŝtoŭicejo estis ĝuste balaita. Jipo estis la gardisto kaj prizorgis la ŝlosadon je noktiĝo kaj



malŝlosadon je mateniĝo. Tu-Tuo, pro sia matematika lerto, estis la librotenisto, kaj li kontrolis kiom da poŝtmarkoj estis venditaj kaj kiom da mono estis ricevita. La Doktoro ofi-
cis ĉe la informo-giĉeto kaj respondis al la sennombraj demandoj kiujn oni ĉiam faras ĉe
poŝtoŝtupoj. Kaj bona fidela Rapidulo estis tie, ĉi tie, kaj ĉie.

Kaj ĉi tiel la unua letero estis elsendita per Hirunda Poŝto: Reĝo Koko mem venis unu
matenon kaj prezentinte sian grandan vizaĝon ĉe la informo-giĉeto, demandis:

“Kiu estas la plej rapida alilanda poŝta liverservo iam ajn farita poŝtejo ie en la
mondo?”

“La brita poŝto nun fanfaronas”, diris la Doktoro, “ke ĝi povas porti leteron el Londono
al Kanado dum dek kvar tagoj”.

“Bone”, diris la Reĝo. “Jen letero al amiko mia, kiu estras ŝupolurejon en Alabamo. Mi
trovu kiom rapide vi povos venigi respondon al mi”.

Nu, efektive la Doktoro ne estis plene pretiginta la ĝustan funkciadon de la alilanda po-
ŝto, kaj li estis eksplikonta tion al la Reĝo, sed Rapido eksaltis sur la labortablon kaj flustris:

“Donu al mi tiun leteron, Doktoro. Ni montros al li”.

Kaj elirinte, li alvokis Kvipo la Portiston.

“Kvipo”, diris Rapidulo, “portu kiel eble plej rapide ĉio tiun leteron al Azoroj. Tie vi aku-
rate atingos la Blankavostajn Karolinajn Hipolaojn kiuj estas farontaj sian someran transiron
al Usono. Donu ĝin al ili kaj ordonu ke ili sendu la respondon ĉi tien tiom rapide kiom eble”.

Fulmorapide Kvipo foriris maren.

Estis la kvara posttagmeze kiam la Reĝo portis tiun leteron al la Doktoro. Kaj kiam Lia
Moŝto vekiĝis la sekvan matenon kaj iris matenmanĝi, jen la respondo kuŝanta apud lia
telero.


PARTO II

Neniu kredis, eĉ ne Johano Dolittle mem, kiam la Hirunda Poŝto komenciĝis, kiom enorma sistemo ĝi fine fariĝos, kaj kiom da eventoj kaj ideoj rezultos pro ĝi.

Kompreneble tiom tute nova afero necesigis multajn lernadon kaj senfuŝigadon antaŭ ol ĝi povis funkciadi glate. Io nova, iu freŝa problemo, ekaperis ĉiutage, sed kvankam la Doktoro, kiu ĉiam estis okupegigata, estis preskaŭ ĝismorte lacigita, li trovis la tuton tiom interesa ke tio ne ĝenis lin. Sed la patrineca Dab-Dabo multege maltrankviliĝis pro li; ĉar vere, je la komenco, li ŝajnis tute neniom dormi.

Certe en la tuta historio de la mondo neniam estis alia poŝtejo simila al tiu de la Doktoro. Unue, ĝi estis poŝtoŝtanco en flosanta domo; due, teo estis preparata por ĉiu venanto — inkluzive de la servistoj kaj de la klientoj — ĉiun posttagmezon je la kvara, kun kukumaj sandviĉoj ĉiudimanĉe. Pagajado por teo posttagmeze al la poŝtoŝtanco por alilanda poŝto fariĝis tute laŭmoda por la pli modernamodaj fantipanoj. Granda markezo estis konstruita super la malantaŭa enirejo, tiel ke estis plaĉa verando de kiu oni povis bele vidi la oceanon kaj la golfon. Kaj se oni alvenis por aĉeti poŝtmarkon je ĉirkaŭ la kvara, plej verŝajne oni renkontis la Reĝon tie, kaj ĉiujn aliajn gravajn nobelojn de Fantipo, trinkantajn teon.

Alia nekutimaĵo pri la poŝtoŝtanco de la Doktoro estis ĝiaj skriboplumoj. La plej multaj poŝtoŝtancoj, laŭ la sperto de la Doktoro, ĉiam havis abomeninde aĉajn skriboplumojn kiuj disŝutetas inkon, gratas, kaj ne skribas. Efektive, eĉ nun tre multaj poŝtoŝtancoj ŝajnas fieri pro siaj malbonaj plumoj. Sed la Doktoro certigis ke **liaj** plumoj estas plej bonkvalitaj. Kompreneble en tiu epoko ne ekzistis ŝtalaj skriboplumoj. Nur birdoplumoj estis uzataj. Kaj Johano Dolittle persvadis la albatrosojn kaj la mevojn konservi por li siajn vostoplumojn kiuj elfalas dum la



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

plumŝanĝa sezono. Kaj kompreneble, ĉar eblis elekti inter multegaj plumoj, estis facile havi la plej bonajn plumojn en la poŝtoŝtanco.

Ankoraŭ alia kontrasto de la poŝtoŝtanco de la Doktoro kontraŭ ĉiuj aliaj estis la gluo uzata sur la poŝtmarkoj. La provizo de gluo kiun la Reĝo uzadis por siaj poŝtmarkoj komencis elĉerpiĝi, kaj la Doktoro devis entrepreni eltrovi kaj fabrikigi novan specon. Kaj post tre multa eksperimentado li inventis gluan el glicirizo, kiu rapide sekiĝis kaj funkciis tre bone. Sed, kiel mi jam diris, la fantipanoj multe amis frandaĵojn. Kaj baldaŭ post la ekuzo de la nova gluo, la poŝtoŝtanco estis plenplena de homoj aĉetantaj poŝtmarkojn centope.

Unue la Doktoro ne komprenis la kaŭzon de tiu subita nova aĉetemo — kiu superlaborigis Tu-Tuon, la kasiston, ĉiunokte, kiam li kalkulis la ricevitan monon. La sekurkesto de la poŝtoŝtanco apenaŭ povis enteni tiom da mono, kaj la superflua mono estis metenda en vazon sur la kamenbreto de la kuirejo.

Sed baldaŭ la Doktoro rimarkis ke lekinte la gluan de la poŝtmarkoj, la aĉetintoj reportis ilin kaj petis redonon de la mono. Nu, estas regulo ke ĉiuj poŝtoŝtancoj devas reaĉeti siajn proprajn poŝtmarkojn, laŭpete, je la sama prezo kiu estis pagita. Kondiĉe ke ili ne estis ŝiritaj aŭ surmarkitaj, ne gravas ĉu aŭ ne la gluo estis delekita. Do la Doktoro komprenis ke li devos ŝanĝi sian specon de gluo se li volas ke la poŝtmarkoj surgluiĝu.

Kaj unu tagon la frato de la Reĝo venis al la poŝtoŝtanco terure tusante kaj petis lin per unusama spiro (aŭ spirego) doni al li kvin duonpencajn poŝtmarkojn kaj tusmedikamenton. Tio inspiris ideon en la Doktoro. Kaj la sekvan gluan kiun li inventis por siaj poŝtmarkoj li nomis **kokluŝogluo**. Li faris ĝin el speciala speco de dolĉa glueca tusmedikamento. Li ankaŭ inventis **bronkitogluon**, **mumpsogluon**, kaj plurajn aliajn. Kaj kiam ajn estis infekta malsano en la vilaĝo, la Doktoro certigis ke la ĝusta gluo por kuraci ĝin estis sur la poŝtmarkoj. Tio multe faciligis lian laboron, ĉar oni konstante interrompis lin petante lin kuraci malvarmumojn kaj gorĝinfektojn kc. Kaj li estis la unua Ĉefpoŝtisto kiu uzis tiun metodon nuligi malsanojn — per meto de plaĉa medikamento sur la dorsoj de poŝtmarkoj. Li nomis ĝin **senepidemiigo**.

Unu vesperon je la sesa Jipo, laŭ sia kutimo, fermis la pordojn de la poŝtoŝtanco, pendigis la afiŝon **“Fermita”** kion li ĉiam faris je tiu horo. La Doktoro aŭdis la riglilojn fermiĝi, kaj li ĉesis kalkuli poŝtkartojn kaj elprenis sian pipon por fumi.

Nun estis finita la unua laborego plene funkciigi la poŝton. Kaj tiunokte Johano Dolittle sentis, aŭdante la fermonde la pordoj ke fine li povas pli regule labori kaj ne bezoni konstante laboradi. Kaj kiam Jipo eniris la budon por registritaj poŝtaĵoj, li trovis la Doktoron klininta sin malantaŭen en seĝo kun siaj piedoj sur la labortablo, kaj ĉirkaŭrigardanta tre kontente.

“Nu, Jipo”, diris li suspire, “nun la poŝto vere funkcias”.

“Jes”, diris Jipo, demetante sian gardistan lanternon, “kaj vere bonega ĝi estas. Ekzistas neniu simila, ie ajn”.

“Pensu”, diris Johano Dolittle, “kvankam ni komencis jam antaŭ semajno, mi mem ankoraŭ tute ne verkis leteron. Imagu, vivi en poŝtoŝtanco dum semajno kaj tute neniun leteron verki! Rigardu tiun tirkeston. Normale, vidi tiom da poŝtmarkoj instigus min verki dekojn da leteroj. Dum mia tuta vivo ni neniam havis poŝtmarko kiam mi vere volis verki leteron. Kaj — kuriozege! — nun mi loĝas kaj dormas en poŝtoŝtanco, kaj ne povas eltrovi iun ajn personon al kiu mi volas sendi leteron”.

“Domaĝe”, diris Jipo, “kaj vi ja tiom bele manskribas — kaj havas tirkeston da poŝtmarkoj! Ne gravas; pensu, tiom da bestoj atendas ricevi leteron de vi”.

“Nu, kompreneble Sarao”, la doktoro daŭrigis, fumante sian pipon reveme. “Povra

kara Sarao! Al kiu ŝi edziniĝis? Sed, tamen, mi ne scias ŝian adreson. Do mi ne povas skribi al Sarao. Kaj mi supozas ke neniu el miaj iamaj pacientoj volus leteron de mi”.

“Mi scias!” kriis Jipo. “La Porkata Viandisto”.

“Li ne scipovas legi”, diris la Doktoro moroze.

“Prave, sed li edzino ja”, diris Jipo.

“Jes”, murmuris la Doktoro. “Sed kion mi skribu al li?”

Ĝuste tiam Rapidulo-la-tanĝema envenis kaj diris:

“Doktoro, ni devas iel ĝustigi la urban poŝtoliveradon en Fantipo. Miaj poŝtobirdoj malfacile trovas la ĝustajn domojn al kiuj liveri la leterojn. Komprenu, ni hirundoj, kvankam ni nestas en domoj, ne estas urbo-birdoj. Ni selektas solecajn domojn, kutime — en la kamparo. En urbostratoj hirundoj malfacile orientiĝas. Kelkaj el la poŝtobirdoj reportis la leterojn kiujn ili celis liveri ĉimatene, dirante ke ili ne povas trovi la domojn al kiuj ili estis adresitaj”.

“Humf!” diris la Doktoro. “Domaĝe. Mi pripensu. Ho, mi scias! Mi venigos Ĉipsajdon”.

“Kiu estas Ĉipsajdo?” demandis Rapidulo.

“Ĉipsajdo estas londona pasero”, diris la Doktoro, “li vizitas min ĉiusomere en Puddleby. La ceteron de la jaro li loĝas apud la Katedralo Sankta Paŭlo. Li konstruas sian neston en la maldekstra orelo de Sankta Edmundo”.

“**Kie?**” kriis Jipo.

“En la maldekstra orelo de statuo de Sankta Edmundo ekster la ĥorejo — de la katedralo”, klarigis la Doktoro. “Ĝuste Ĉipsajdon ni bezonas por liverado en urboj. Nenion li ne scias pri domoj kaj urboj. Mi venigos lin tuj”.

“Mi timas”, diris Rapidulo, “ke poŝtobirdo — se li mem ne estas urbobirdo — malfacilege trovas paseron en Londono. Ĝi ja estas urbego, ĉu ne?”

“Jes, vi pravas”, diris Johano Dolittle.

“Aŭskultu, Doktoro”, diris Jipo. “Vi ĵus demandis pri kion skribi al la Porkata Viandisto. Rapidulo skribu la leteron al Ĉipsajdo per birdoskribo, kaj vi enmetu ĝin en leteron al la Porkata Viandisto. Tiel, kiam la pasero venos al Puddleby por sia somera vizito, la Porkata Viandisto. povos transdoni ĝin al li”.

“Bonege!” kriis la Doktoro. Kaj li kaptis paperfolion de la labortablo kaj komencis skribi.

“Kaj ankaŭ petu lin”, diris Dab-Dabo, kiu estis aŭskultanta, “rigardi la malantaŭajn fenestrojn de la domo por certiĝi ke nenioj rompiĝis. Ni malvolas ke la pluvo malsekigu la litojn”.

“Bone”, diris la Doktoro. “Mi mencios tion”.

Do la letero de la Doktoro estis skribita kaj adresita al **S-ro Mateo Mugg, Vendisto de Viando por Katoj, Puddleby-sur-la-Marĉo, Slopshire, Anglujo**. Kaj ĝi estis sendita per Kvipo-la-Portisto.

La Doktoro ne anticipis tujan respondon, ĉar la edzino de la Porkata Viandisto tre malrapide legis kaj eĉ pli malrapide skribis. Krome, Ĉipsajdo nur post semajno vizitos Puddlebyn. Li ĉiam restis en Londono ĝis post la paska feritago. Lia edzino rifuzis lasi lin foriri al la kamparo antaŭ ol li instruis la printempan familion trovi domojn el kie homoj ĵetas panerojn; preni avenon de sub la nazsako de la fiakraj ĉevaloj sen esti surtretita de la ĉevaloj; kiel navigi en la trafikoplenaj stratoj de Londono, kaj multon alian kiun junaj urbobirdoj devas scii.

Intertempe, dum Kvipo estis for, la vivo progresis vige kaj feliĉe ĉe la poŝtofiĉejo de la Doktoro. La bestoj, Tu-Tuo, Dab-Dabo, Gub-Gubo, la puŝumi-tiruvio, la blanka muso kaj Jipo ĉiuj konkordis ke loĝo en flosanta poŝtofiĉejo estas plezuriga. Kiam ajn ilin tedis la flosantaj hejmo, ili piknikis sur la Insulo Neniujo, kiun ili nun plie ofte nomis, kiel Johano Dolittle.

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

tle, “La Paradizo de Bestoj”.


Ankaŭ dum tiuj ekskursoj la Doktoro kelkafoje akompanis ilin. Tio plezurigis lin, ĉar tiel li havis oportunon paroli kun la multaj diversaj specoj de bestoj tie pri la signoj kiujn ili kutime uzas. Kaj surbaze de tiuj signoj, kiujn li zorge desegnis en notlibroj, li konstruis ian skriban lingvon uzeblan de bestoj — li nomis ĝin **bestosignaro** — simile kiel por la birdoj.

Kiam li havis liberan tempon li instruis posttagmezajn klasojn por la bestoj en a Granda Kavaĵo, por la bestoj. Kaj la klasoj estis tre popularaj. Kompreneble, li trovis ke la simioj estas plej facile instrueblaj, pro sia granda lerteco, kaj li nomumus kelkajn el ili asististoj. Sed ankaŭ la zebroj estis tre inteligentaj. La Doktoro trovis ke tiuj lertaj bestoj uzis signojn kaj tordis la herbojn speciale, por indiki kie ili flaris leonojn — kvankam, feliĉe, ili ne bezonis uzi tiun artifikon en la Paradizo de Bestoj, sed kunportis ĝin kiam ili naĝis tien de la ĉeftero afrika.

La dorlotbestojn de la Doktoro multe ĝuigis trarigardi la poŝtaĵojn venintajn ĉiutage por trovi ĉu estas leteroj por ili. Komence, kompreneble, ne estis multaj. Sed unu tagon Kvipo revenis de Puddleby kun respondo al la letero de la Doktoro al la Porkata Viandisto. S-ro Mateo Mugg skribis (per sia edzino) ke li pendigis la leteron por Ĉipsajdo sur pomarbo en la ĝardeno kie la pasero certe vidos ĝin reveninte. La fenestroj de la domo estas bonstataj, li skribis, sed la malantaŭa pordo bezonas refarbiĝon.

Kaj dum Kvipo atendis la verkiĝon de tiu letero li uzis sian tempon ĉe Puddleby per klacado kun la sturnoj kaj la merloj en la ĝardeno de la Doktoro pri la mirinda nova poŝtoŝticejo sur Insulo Neniujo. Kaj baldaŭ ĉiu besto en kaj proksime al Puddleby sciigis pri ĝi.

Post tio, kompreneble, leteroj komencis alveni ĉe la flosanta domo por la dorlotbestoj de la Doktoro. Kaj unu matenon, dum oni klasifikadis la poŝtaĵojn, estis letero por Dab-Dabo de ŝia fratino; letero por la blanka muso sendita de kuzo loĝanta en tirkesto de la Doktoro; letero por Jipo de la ŝafhundo najbara en Puddleby, kaj letero por Tu-Tuo informanta lin ke li havas novan familion de ses idoj en la ĉevronoj de la stalo.



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Sed estis nenio por Gub-Gubo. La povra porko preskaŭ ploris pro soleco. Kaj kiam la Doktoro iris en la vilaĝon tiun posttagmezon Gub-Gubo petis kuniri.

La sekvan tagon la birdoj plendis pro la tropeza poŝtaro. Kaj kiam oni trarigardis ĝin, oni trovis dek dikajn leterojn por Gub-Gubo sed neniun por la aliaj. Jipo eksuspektemis pri tio, kaj transrigardis la ŝultron de Gub-Gubo dum li malfermis ilin. En ĉiu koŭerto estis bananŝelo.

“Kiu sendis tiujn al vi?” demandis Jipo.

“Mi mem sendis ilin al mi”, diris Gub-Gubo, “el Fantipo hieraŭ. Kial nur vi uloj ricevas leterojn? Neniu skribas al mi, do mi skribas al mi mem”.

Estis granda tago ĉe la poŝtoŝtanco de la Doktoro kiam Ĉipsajdo, la londona pasero, alvenis de Puddleby por prizorgi la enurbajn liverojn en Fantipo.

La Doktoro manĝadis sian lunĉon de sandviĉoj ĉe la informotablo, kiam la birdeto puŝis sian kapon tra la fenestron kaj diris per sia impertinenta londona voĉo:

“Saluton, Doĉjo, denove ni kunas! Ho-o! La malnova firmao! Kiu kredus ke vi faras ĉi tion?”

Ĉipsajdo estis unikulo. Verŝajne ĉiu vidante lin la unuan fojon divenus ke li pasigas sian vivon sur la urbaj stratoj. Lia tuta mieno estis alia ol tiu de aliaj birdoj. En la okuloj de Rapidulo, ekzemple — kvankam neniu ial ajn supozus lin stulta — estis preskaŭ nobla aspekto de kampara honesto. Sed en la okuloj de Ĉipsajdo, la londona pasero, estis impertinenta friponeca maniero kiu kvazaŭ diras “Ne supozu eĉ dum momento ke vi povus trompi min. Mi estas londona birdo”.


“Ho, Ĉipsajdo!” kriis Johano Dolittle. “Fine vi venis. Vere estas bone vidi vin! Ĉu vi ĝuis la veturon?”

“Sufiĉe — ja sufiĉe” diris Ĉipsajdo, rigardante kelkajn panerojn el la lunĉo de la Doktoro kuŝantaj sur la labortablo. “Neniuj ŝtormoj. Sufiĉe bona veturado. Varme? Nu, mi ja diras ke varmege. Sufiĉe varme por forno! ... Kurioza loĝejo ĉi tie — ia ŝarĝboato?”

Kiam ĉiuj bestoj jam aŭdis Ĉipsajdon alveni, ili hastis renkonti la veturinton kaj aŭdi pri Puddleby kaj aŭdi la novaĵojn de Puddleby kaj Anglujo.

“Kiel staras la maljuna ĉevalo en la stalo?” demandis Johano Dolittle.

“Sufiĉe vigla”, diris Ĉipsajdo. “Kompreneble li ne estas tiom juna kiom iam. Sed sufiĉe vigla por oldulo. Petis min porti al vi aron da karmezinaj floroj — nun florantaj super la stalpordo, jes ja. Sed mi diras al li, mi diras: “Ĉu vi kredas min omnibuso? Maturulo kia mi portanta rozojn trans tutan Atlan-



tikon! Oni kredus min gasto iranta al geedziĝo ĉe Suda Poluso”.

“Jadi, Ĉipsajdo!” diris la Doktoro, ridante. “Vere nostalgiigas min pri Anglujo aŭdi vian londonan pepadon”.

“Ankaŭ min”, suspiris Jipo. “Ĉu estis multaj ratoj en la ŝtipejo, Ĉipsajdo?”

“Centoj da”, diris la pasero. Grandaj kiel kunikloj. Kaj tiom arogantaj ke ili kredigus posedi la lokon!”

“Mi baldaŭ korektos ilin, kiam mi revenos”, diris Jipo. “Espereble ni reiros baldaŭ”.

“Kia aspektas la ĝardeno, Ĉipsajdo?” demandis la Doktoro.

“Belega”, diris la pasero. “Fiherboj en la padoj, kompreneble. Sed la iridoj sub la kuir-eja fenestro vere belas, jes ja”.

“Ĉu io nova en Londono?” demandis la blanka muso, kiu ankaŭ estis urbano.

“Jes”, diris Ĉipsajdo. “Ĉiam estas io nova en Londono. Oni havas novan specon de fiakro kiu uzas du radojn anstataŭ kvar. Viro nomita Hansom inventis ĝin. Multe pli rapida ol la malnovaj fiakroj. Ili troveblas ĉie. Kaj estas nova legombutiko proksime al la Reĝa Borso”.

“Mi posedos propran legombutikon kiam mi plenkreskos”, murmuris Gub-Gubo, — “en Anglujo kie oni kultivas bonajn legomojn — min plene tedas Afriko — kaj tiam mi rigardos la novajn legomojn maturiĝi dum la tuta jaro”.

“Li ĉiam parolas pri tio”, diris Tu-Tuo. “Kia viv-ambicio! Estri legombutikon!”

“Ha, Anglujo!” kriis Gub-Gubo sentimentale. “Kio pli belas en la vivo ol la koro de juna laktuko en la printempo?”

“Aŭdu lin!” diris Ĉipsajdo, levante siajn brovojn. “Praktika porko, ĉu ne? Kial vi ne verkas sonetaron pri la Mefite-Kisitaj-Brasikoj-de-Luiziano, S-ro Lardo?”

Tamen, jen, Ĉipsajdo”, diris la Doktoro. “Ni volas ke vi reĝustigu por ni la enurbajn liveradojn en la vilaĝo Fantipo. Niaj poŝtobirdoj malfacilege trovas la ĝustajn domojn al kiuj porti leterojn. Vi estas urbo-birdo, laŭnaske kaj laŭloĝe. Ĉu vi kredas povi helpi nin?”

“Mi provos helpi vin, Doĉjo ”, diris la Pasero, “post ĉirkaŭrigardado en ĉi tiu pagana urbeto via. Sed unue mi volas banon. Mi tute malnetiĝis, flugante sub la bruleganta suno. Ĉu vi ne havas flakojn ĉi tie, en kiuj birdo povas bani sin?”

“Ne, ĉi klimato ne estas flakema”, diris la Doktoro. “Vi ne estas en Anglujo, sciu. Sed mi alportos al vi mian raz-tason, kaj vi povos bani vin en ĝi”.

“Atentu ellavi la sapon unue, Doĉjo ”, pepis la pasero, “ĝi iritas miajn okulojn”.

La sekvan tagon Ĉipsajdo profunde dormadis, ripozante post sia longa veturo; kaj post tio, la Doktoro gvidis la londonan paseron tra la vilaĝo Fantipo.

“Nu, Doĉjo”, diris Ĉipsajdo, rigardinte la vidindaĵojn, “kiel urbon, mi ne alte estimas ĝin — vere, ne. Granda, jes ja. Mi tute ne sciis ke oni havas tiom grandajn urbojn en Afriko. Sed la stratoj estos tiom mallarĝaj! Mi komprenas kial oni ne havas fiakrojn ĉi tie — apenaŭ sufiĉa spaco por kapra promeno, neniel kvarrada veturilo. Kaj la domoj, ili ŝajnas fabrikitaĵoj el la interno de malnovaj matracoj. Nia unua ago devos esti ordono al olda Reĝo Kokonuso ke liaj regatoj metu pordofrapilojn sur siajn pordojn. Kia hejmo ne havas pordofrapilon? Kompreneble viaj poŝtistoj ne povas liveri la leterojn, ili ne povas frapi sen pordofrapiloj”.

“Mi prizorgos tion”, diris la Doktoro. “Mi parolos al la Reĝo pri ĝi jam ĉi-posttagmeze”.

“Krome, ne estas leterkestoj en la pordoj”, diris Ĉipsajdo. “Devus esti foldoj por trapuŝi la leterojn. La sola loko kiun ĉi paganaĉoj havas en kiun poŝtisto povus meti leteron estas la kamentubo”.

“Bone”, diris la Doktoro. “Mi prizorgos ankaŭ tion. Ĉu la leterkestoj estu en la mezo de la pordo, aŭ ĉu vi preferas ke ili estu ĉe la flanko?”

“Ambaŭflanke de la pordoj — du por ĉiu domo”, diris Ĉipsajdo.

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Kial?” demandis la Doktoro.

“Ideeto mia”, diris la pasero. “Unu por la fakturoj kaj unu por veraj leteroj. Onin tiom ĉagrenas aŭdi la frapon de poŝtisto kaj veni al la pordo, anticipante trovi belan leteron de amiko aŭ informon ke oni testamentis monon al oni, kaj oni trovas nur fakturon de la tajloro. Sed se ni havos du kestojn sur ĉiu pordo, unu por **Fakturoj** kaj unu por **Leteroj**, la poŝtisto povos meti ĉiujn fakturojn en unu keston kaj la honestajn leterojn en la alian. Kiel mi diris, estas mia propra ideeto. Ni estu avangardaj. Kion vi pensas?”

“Ĝi estas bonega notico”, diris la Doktoro. “Tiel oni bezonos ĉagreniĝi nur unufoje — kiam oni malplenigas la fakturkeston je la pagotago”.


“Ĝuste tiel”, diris Ĉipsajdo. “Kaj diru al la poŝtobirdoj — tuj kiam la frapiloj estos surmetitaj — ke ili frapu nur unufoje kiam estas fakturo kaj dufoje kiam estas letero, tiel ke oni en la domo scios ĉu aŭ ne veni preni la poŝtaĵojn. Ho jes, ni instruos ĉi paganulojn! Ni havos tute veran poŝton en Fantazipo. Kaj krome, kiom pri la kristnaskokestoj, Doktoro? Poŝtistoj ĉiam atendas belan donacon je la kristnasko, sciu”.

“Nu, mi iom timas”, diris la Doktoro dubeme, “ke ĉi tiuj homoj ne festas kristnaskon”.

“**Ne festas kristnaskon!**” kriis Ĉipsajdo ŝokite. “Kia skandalaĉo! Nu, jen, Doktoro. Vi simple diru al Reĝo Kakaobutero ke se li kaj lia popolo ne festos tiun sezonon per kristnakaj donacoj al ni poŝtobirdoj, neniuj poŝtaĵoj liveriĝos en Fantazipo inter la Novjaro kaj Pas-ko. Kaj diru al li ke mi mem ordonis tion. Necesas tuj instrui Lian Sencimoŝton”.

“Bone”, diris la Doktoro. “Mi prizorgos tion”.

“Diru al li”, diris Ĉipsajdo, “ke ni volas du sukerkubojn



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

sur ĉiu pordoŝtupo por la poŝtobirdoj, ĉiun kristnaskan matenon. Neniu sukero — neniu leteroj!”

Tiun posttagmezon la Doktoro vizitis la Reĝon kaj klarigis al li la diversaĵojn postulatajn de Ĉipsajdo. Kaj Lia Moŝto komplezis pri ĉio. Belaj latunaj frapiloj estis ŝraŭbe fiksitaj sur ĉiu pordo — malpezaj, kiajn la birdoj povos facile levi. Kaj tre elegantaj ili aspektis — nepre la plej avangarda parto de la kadukaj loĝejoj. Ankaŭ la duoblaj kestoj estis surmetitaj, unu por fakturoj kaj unu por leteroj.

Johano Dolittle instruis Reĝon Koko ankaŭ pri la signifo de la kristnaska sezono, la tempo por donacoj. Kaj inter la fantipa popolo la kutimo donacadi je kristnasko fariĝis tute kutima — ne nur donacoj al poŝtistoj sed ankaŭ al amikoj kaj parencoj.

Tial, plurajn jarojn post la foriro de la Doktoro el tiu lando, kiam kelkaj misiistoj vizitis tiun parton de Afriko, ili miregante trovis ke oni festas kristnaskon tie, kvankam la popolo estas pagana. Sed ili neniam sciigis ke la kutimon fondis Ĉipsajdo, la impertinenta londona pasero.

Kaj nun tre baldaŭ Ĉipsajdo plene regis la enurban liveradon de poŝtaĵoj en Fantipo. Kompreneble, tuj kiam la poŝtaĵoj komencis abundi, kiam la popolo kutimiĝis ofte sendi leterojn al siaj amikoj kaj parencoj, Ĉipsajdo ne povis sola prizorgi ĉion. Do li sendis mesaĝon per hirundo ke kvindek paseroj el la stratoj de Londono (kiuj mem, kiel li, bone konis urbajn kutimojn) helpu lin pri la liverado de leteroj. Kaj je la indiĝenaj ferisezonoj, la Rikolta Luno kaj la Alveno de la Pluvoj, li devis venigi ankoraŭ kvindek pli por prizorgi la ekstrajn poŝtaĵojn.

Kaj se vi hazarde promenus laŭ la ĉefa strato de Fantipo je la naŭa matene aŭ la kvara posttagmeze, vi aŭdus la poŝtopaserojn frapetadi la pordojn — **tat-tat** se temis pri vera letero, kaj nur **rat!** se fakturo.

Kompreneble, ili ne povis porti po pli ol unu aŭ du leteroj ĉar ili estis tre malgrandaj birdoj. Sed ili bezonis nur momenton por reflugi al la flosanta domo por plia ŝarĝo, kie Tu-Tuo atendis ilin ĉe la “urbo”-giĉeto kun aroj da poŝtaĵoj, dividitaj en kestojn signitajn **“Centra”**, **“Okcident-Centra”**, **“Sudokcidenta”**, k.c. por la diversaj partoj de la vilaĝo. Jen alia ideo de Ĉipsajdo, dividi la vilaĝon en distriktojn, simile al Londono, tiel ke eblis rapide liveri la poŝtaĵojn sen multe serĉi stratojn.

La helpo de Ĉipsajdo estis, envere, ege valora por la Doktoro. La Reĝo mem diris ke la poŝto estas bonege prizorgata. La leteroj liveriĝis regule, kaj neniam al la malĝustaj domoj.

Nur unu misecon havis Ĉipsajdo. Kaj tio estis lia impertinento. Kiam ajn li kverelis lia londona sakrado estis terura. Kaj kvankam la Doktoro plurfoje ordonis ke liaj poŝtoficistoj kaj poŝtobirdoj estu ĉiam ĝentilaj al la publiko, Ĉipsajdo konstante kvereladis — kutime laŭ sia propra instigo.

Unu tagon kiam la dorlotata blanka pavo de la Reĝo venis al la Doktoro, kaj plendis ke la londona pasero fimienis al li trans la muro de la palaco, la Doktoro multe koleriĝis kaj severe riproĉis la Urbo-prizorgiston.


Sekve Ĉipsajdo kunigis grupon de siaj gangsteraj londonaj paseramikoj, kaj unu nokton ili flugis en la palacan ĝardenon kaj atakis la blankan pavon kaj tiris tri plumojn el lia bela vosto.

Tiu plejlasta gangstera ago estis tro malakceptebla por la Doktoro, kaj, alvokinte Ĉipsajdon, li tuj maldungis lin — kvankam li tre bedaŭris fari tion.

Sed kiam la pasero foriris, ĉiuj liaj londonaj amikoj foriris kun li, kaj la poŝtofiĉejo ne plu havis urbobirdojn por prizorgi la enurban liveradon. La hirundoj kaj aliaj bildoj strebegis ĝuste disliveri la poŝtaĵojn. Sed ili malsukcesis. Kaj baldaŭ plendoj de la vilaĝanoj komencis

aŭdiĝi.

Tiam la Doktoro bedaŭris, kaj volis ne esti maldunginta Ĉipsajdon, kiu ŝajne estis la sola ulo kapabla prizorgi tiun par-



ton de la poŝto ĝuste. Sed unu tagon, tre ĝojige al la Doktoro — kvankam li klopodegis aspekti kolera — Ĉipsajdo promenis en la poŝtoŝtacion kun pajlero en angulo de sia buŝo, aspektante tute kvazaŭ nenio estis okazinta.

Johano Dolittle estis supozinta ke li kaj liaj amikoj estis reirintaj hejmen al Londono. Sed ne. Ili sciis ke la Doktoro bezonas ilin, kaj ili nur ripozadis ekster la vilaĝo. Kaj tiam la Doktoro, denove admoninte Ĉipsajdon pri ĝentileco, redungis lin.

Sed la sekvan tagon la kverlema pasereto ĵetis botelon da poŝtoŝtaca inko sur la reĝan blankan pavon kiam li venis al la flosanta domo kun la Reĝo por trinki teon. Tiam la Doktoro maldungis Ĉipsajdon.

Efektive, la Doktoro ekkutimis maldungi lin pro malĝentileco preskaŭ regule ĉiun monaton. Kaj la poŝtaĵoj de la vilaĝo ĉiam refuŝiĝis tre baldaŭ. Sed, tre malĉagrene al la Doktoro, la Urbo-prizorgisto ĉiam revenis precize kiam la poŝtopaneo estis plej severa kaj reĝustigis ĉion.

Ĉipsajdo estis mirinda birdo. Sed ŝajne li ne kapablis pasigi plenan monaton sen insulti iun. La Doktoro diris ke tia estas lia naturo.

Sendinte al la Porkata Viandisto sian unuan leteron per Hirunda Poŝto, la Doktoro komencis pensi pri ĉiuj aliaj personojn al kiuj pro neglekto li ne skribis dum multaj jaroj. Kaj tre baldaŭ ĉiu libera momento estis plenigita per verkado de leteroj al amikoj kaj konatoj ĉie.

Kaj, kompreneble, ankaŭ estis leteroj kiujn de sendis al kaj ricevis de birdoj kaj bestoj en la tuta mondo. Unue, li skribis al la diversaj ĉefbirdoj kiuj estris la fakoficejojn ĉe Kabo Horna, Tibeto, Tahitio, Kaŝmiro, Kristnaskinsulo, Groenlando, kaj Puddleby-sur-la-Marĉo. Al ili li zorge instrukciis pri kiel la fakaj poŝtoŝefoj devas esti prizorgataj — ĉiam insistante je severa ĝentileco de la poŝtoŝefoj; kaj li respondis ĉiujn demandojn kiujn skribis la fakpoŝtejestroj petante gvidon.

Kaj li sendis leterojn al diversaj kolegaj naturosciencistoj kiujn li konis en diversaj landoj, kaj donis al ili grandegan kvanton da informo pri la ĉiujaraj flugoj a ŭ migradoj de birdoj. Ĉar, kompreneble, per la birda poŝto, li lernis multon pri tiu temo kiun neniam sciis antaŭe la naturosciencistoj.

Ekster la poŝtoŝefo li starigis afiŝojn sur kiu estis metitaj informoj pri la elirontaj kaj alvenontaj poŝtaĵoj. La afiŝoj tekstis iom simile al ĉi tio:

Merkrede, la 18an de julio, la Ruĝflugilaj Pluvioj eliros el ĉi tiu oficejo cele Danlandon kaj lokojn ĉe Skagerrako. Bonvolu frue enpoŝtigi viajn leterojn. Ĉiuj leteroj surhavi kvarpencan markon. Malgrandaj pakaĵoj ankaŭ estos portataj cele Marokon, Portugalujon, kaj la Manikajn Insulojn.

Kiam ajn nova grego da birdoj estis atendata ĉe Neniujo, la Doktoro ĉiam havis jam pretan grandan provizon de manĝaĵoj por tiu birdospeco. Je la granda renkontiĝo kun la ĉefoj li estis skribinta en sian notlibron la datojn de ĉiuj jaraj flugoj de la diversaj specoj de birdoj, el kie ili flugas, kaj al kie ili flugas. Kaj tiu notlibro estis tre zorge gardata.

Unu tagon Rapidulo sidis sur la pesilo dum la Doktoro klasifikis grandan amason da elirontaj leteroj. Subite la Tanĝemulo elkriis:

“Jadi, Doktoro, mi pezas tridek gramojn pli! Neniam mi povos denove konkursi. Vidu, ĝi diras 127 gramojn!”

“Ne, Rapidulo”, diris la Doktoro. “Vidu estas tridek-grama pezilo sur la pladeto kun vi. Do vi pezas nur 97 gramojn”.

“Ho”, diris la Tanĝemulo, “Do jen la kialo. Mi neniam havis aritmetikan talenton. Tre malĉagrene! Mi efektive do ne plipeziĝis!”

“Aŭskultu, Rapidulo”, diris la Doktoro, “en ĉi tiu poŝtaĵaro ni havas multajn leterojn irontajn al Panamo. Kiaj poŝtobirdoj eliros morgaŭ?”

“Mi ne certas”, diris Rapidulo. “Mi rigardos la afiŝojn. Mi kredas ke la oraj garoloj. ... Jes”, li diris, reveninte post momento, mi pravis. La oraj garoloj morgaŭ, mardo, la 15an, se la vetero permesos”.

“Kien ili iros, Rapidulo?” demandis la Doktoro. “Mia notlibro estas en la sekurŝranko”.

De Dahomeo al Venezuelo”, diris Rapidulo, levante sian dekstran piedon por kaŝi oscedon.


“Bone”, diris Johano Dolittle. “Do ili povos porti la panamajn leterojn por mi. Ili ne bezonos multe devigi. Kion manĝas oraj garoloj?”

“Ili tre ŝatas glanojn”, diris Rapidulo.

“Bone”, diris la Doktoro. “Bonvolu peti Gub-Gubon en mia nomo transiri al la insulo kaj peti la aprojn kolekti kelkajn sakojn da glanoj. Mi volas ke ĉiuj birdoj laborantaj por ni bone manĝu antaŭ ol ili forflugas de la ĉefoficejo”.

La sekvan matenon kiam la Doktoro vekiĝis li aŭdis laŭtegan pepadon tute ĉirkaŭ la

poŝtoŝtancelo, kaj li sciis ke la oraj garoloj alvenis dum la nokto. Kaj kiam li estis vestinta sin kaj irinta sur la verandon, jen, tute vere, ili estis — miriadoj da tre belaj, oraj-kaj-nigraj birdoj, svarmantaj ĉie, interklaĉante ra-



pidege kaj manĝegante la glanojn elmetitajn pobarele por ili.

La ĉefo, kiu, kompreneble, jam konis la Doktoron, antaŭen venis por ricevi ordonojn kaj trovi kiom da poŝtaĵoj estas portotaj.

Kiam ĉio estis aranĝita, kaj la ĉefo decidis ke li ne bezonas anticipi trombojn aŭ mal-bonan veteron dum la sekvaj dudek kvar horoj, li faris ordonon. Ĉiuj birdoj enaeriĝis, por forflugi — fajfe adiaŭante Ĉefpoŝtiston Dolittle kaj la ĉefpoŝtoŝticejon.

"Ho, hazarde, Doktoro", diris la ĉefo, reveninte por momento, "ĉu iam vi aŭdis pri viro nomita Kristoforo Kolumbo?"

"Ho, certe jes", diris la Doktoro. "Li trovis Amerikon en 1492".

"Nu, mi nur volis informi vin", diris la garolo, "ke sen la helpo de praparenco mia, li ne estus trovinta ĝin en 1492 — eble poste, sed ne en 1492".

"Ho, ĉu vere?" diris Johano Dolittle. "Rakontu al mi pri tio". Kaj li tiris notlibron el poŝto por skribadi.

"Nu", diris la garolo, "la historion transdiris al mi mia patrino, al kiu ĝin rakontis mia avino, al kiu ĝin rakontis mia praavino, kaj cetere, ĝis praparenco nia kiu loĝis en Ameriko en la dekkvina jarcento. Nia speco de birdoj tiuepoke ne transvenis al ĉi tiu flanko de Atlantiko, nek somere nek vintre. Ni kutimis resti de marto ĝis septembro en Bermudoj, kaj la ceteron de la jaro en Venezuelo. Kaj kiam ni aŭtune veturis suden, ni kutimis halti por iom ripozi ĉe Bahamoj.

"La aŭtuno de la jaro 1492 estis ŝtormoplena. Ventegoj kaj skualoj blovadis senĉese, kaj nur en la dua semajno de oktobro ni sukcesis komenci nian veturon. Mia praparenco estis ĉefo de la grego dumlonge. Sed li fariĝis iom maljuna kaj febla, kaj pli juna birdo estis elektita anstataŭ li por gvidi la orajn garolojn al Venezuelo tiujare. La nova ĉefo estis aroganta junulo, kaj ĉar li estis elektita li kredis scii ĉion pri navigado kaj vetero kaj transiroj de la maro.

"Baldaŭ post la ekflugo de la birdoj ili vidis, tre mirige al ili, aron da boatoj velantaj okcidenten. Estis proksimume duonvoje inter Bermudoj kaj Bahamoj. La ŝipoj estas multe pli grandaj ol ĉio antaŭe vidita de ili. Ĝis tiam ili konis nur kanuetojn, pagajatajn de indianoj.

"La nova ĉefo tuj ektimis kaj ordonis ke la garoloj flugu pli proksime al la tero, por ke ilin ne vidu la viroj kiuj plenigis tiujn grandajn boatojn. Li estis superstiĉa ĉefo, kaj kiam li ne konis ion, li tenis sin tre for de ĝi. Sed mia praparenco ne iris kun la grego, li flugis rekte al la ŝipoj.

"Li estis for dum ĉirkaŭ dudek minutoj, kaj baldaŭ li flugis al la aliaj birdoj kaj diris al la nova ĉefo: 'Tie en tiuj ŝipoj kuraĝa viro estas en granda danĝero. Ili venis el Eŭropo, serĉante teron. La velistoj, ne sciante kiom proksimaj ili estas al ĝi, ribelis kontraŭ sia admiralo. Mi estas maljuna birdo, kaj mi konas tiun kuraĝan mariston. Foje dum mi transflugis — la unuan fojon en mia vivo — ventego ekiĝis kaj min apartigis de miaj kolegoj. Dum tri tagoj mi devis flugi laŭ la batanta vento. Kaj fine mi estis blovita orienten proksime al la Malnova Mondo. Kaj ĝuste kiam mi estos falonta en la maron pro trolaciĝo, mi ekvidis ŝipon. Nu, mi devegis ripozi. Do mi flugis cele la boaton, kaj falis, duone morta, sur la ferdekon. La velistoj volis meti min en kaĝon. Sed la kapitano de la ŝipo — tiu sama navigisto kies vivon atencas lia ribelanta velistaro en tiu ŝipo tie — donis al mi panerojn por manĝi kaj vartis min por ke mi pluvivu. Post tio li liberigis min, por ke mi flugu al Venezuelo kiam la vetero estis favora. Ni estas terbirdoj. Ni nun savu la vivon de tiu bona viro per flugo al lia ŝipo por montri nin al liaj velistoj. Tiam ili ekscios ke tero estas proksima, kaj ili obeos sian kapitanon".

"Jes, jes", diris la Doktoro. "Daŭrigu. Mi memoras ke Kolumbo skribis en sia taglibro

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

pri terbirdoj. Daŭrigu”.

“Do”, diris la garolo, “la tuta grego turnis sin kaj flugis al la ŝiparo de Kolumbo. Ili nur lastamomente atingis lin. Ĉar la velistoj estis pretaj mortigi sian admiralon, kiu, ili diris, fuŝgvidis ilin por trovi teron kie tero ne ekzistas. Li devos aŭ turni la ŝiparon kaj revelu al Hispanujo, aŭ esti mortigita.


“Sed kiam la velistoj vidis grandan gregon da terbirdoj flugantaj trans la ŝipon sudokcidenten anstataŭ okcidenten, ili rekuraĝiĝis, ĉar ili certis ke tero devas troviĝi ne tre malproksime sudokcidente.

“Do ni gvidis ilin al Bahamoj. Kaj la sepan tagon, tre frue en la mateno, la ŝipanaro, kriante ‘Tero! Tero’, surgenuiĝinte dankis la ĉielon. Insulo Watling, unu el la malpli grandaj Bahamoj, estis antaŭ ili, ridetante en la muro.

“Tiam la velistaro grupiĝis ĉirkaŭ la admiralon, Kristoforo Kolumbo, kiun antaŭ nelonge ili intencis mortigi, kaj hurais kaj nomumis lin la plej granda navigisto en la mondo — kaj, envere, tio li ja estis.

“Sed eĉ Kolumbo mem neniam sciis, eĉ je sia morto, ke tiu veterbatita birdo kiu estis falinta sur lian amikan ferdekon antaŭ pluraj jaroj, estis tiu kiu gvidis lin laŭ la plej mallonga vojo al la tero de la Nova Mondo.

“Do vi komprenas, Doktoro”, la garolo finis, prenante siajn leterojn kaj pretigante sin flugi, “ke sen mia praparenco Kristoforo Kolumbo devus returni por plaĉi siajn velistojn, aŭ esti mortigita. Sen li, Ameriko ne estus trovita en 1492 — poste, eble, sed ne en 1492. Ĝis la! Mi devas foriri. Dankon pro la glanoj”.



En la bordo de Okcidenta Afriko, ĉirkaŭ tridek kilometrojn norde de Fantipo, estis kabo eniranta la maron, sur kiu estis lumturo nomata la Lumturo de Kabo Stefano. Tiun lumon zorge tenis brulanta la Registaro kiu regis tiun parton de Afriko, por ke ŝipoj vidu ĝin de la maro kaj sciu kie ili estas. Tie estis danĝera parto de la bordo. Estis multaj rokoj kaj malprofundaĵoj ĉe la finaĵo de Kabo Stefano. Kaj se la lumo iam estingiĝus dum la nokto, ŝipoj veturantaj tiun parton de la maro riskus grandan danĝeron kolizii kun la longa kabo kaj averii.


Nu, unu vesperon ne longe post la flugo de la Oraj Garoloj okcidenten, la Doktoro estis verkanta leterojn en la poŝtoŝtupo per la lumo de kandelo. Estis malfrue kaj ĉiuj bestoj jam delonge dormas. Baldaŭ dum li skribis li aŭdis tre malproksiman sonon, venantan tra la malfermita fenestron ĉe lia kubuto. Li demetis sian plumon kaj aŭskultis.

Estis la sono de marbirdo, vokanta tre malproksime super la maro. Nu, marbirdoj, kutime, ne multe vokas krom se ili estas en amaso. Ĉi tiu voko sonis de unu birdo. La Doktoro metis sian kapon tra la fenestrejon kaj elrigardis.

Estis senluma nokto, nigra kiel peĉo, kaj li povis vidi tute nenion — precipe ĉar liaj okuloj estis agorditaj al la lumo de la kandelo. La mistera voko ripetiĝis multfoje, kvazaŭ helpokrio el la maro. La Doktoro ne sciis kion pensi pri ĝi. Sed baldaŭ li pensis ke ĝi ŝajnas pliproksimiĝadi. Kaj, kaptinte sian ĉapelon, li elkuris sur la verandon. “Kio estas? Kio okazas?” li kriis en la mallumon super la maro.

Estis neniua respondo. Sed baldaŭ per batado de flugiloj kiu preskaŭ estingis la kandelon, granda mevo flugis sur la balustradon de la flosanta domo.

“Doktoro”, anhelis la mevo, “la lumo de Kabo Stefano estas estingita. Mi ne scias la kialon. Ĝi neniam estingiĝis antaŭ nun. Ni uzas ĝin kiel direktilon, sciu, kiam ni flugas post



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

la mallumiĝo. La nokto estas nigra kiel inko. Mi timas ke iu ŝipo nepre kolizios kun la kabo. Mi decidis veni informi vin”.

“Jadil!” kriis la Doktoro. “Kio povus esti okazinta? Lumturisto loĝas tie por prizorgi ĝin. Ĉu ĝi brilis pli frue en la vespero?”

“Mi ne scias”, diris la mevo. “Mi estis revenanta kaptinte haringojn — ili abundas, ĝuste nun, sciu, iom norde. Kaj, anticipante vidi la lumon, mi misvojis kaj flugis kilometrojn tro suden. Kiam mi konsciis pri mia eraro, mi reiris, flugante malalte laŭ la bordo. Kaj mi venis al Kabo Stefano, sed ne estis lumo. Estis kiel eble plej senlume. Kaj mi mem estus koliziinta kontraŭ la rokoj se mi ne atentegus”.

“Kiom for ĝi estas?” demandis Johano Dolittle.

“Nu, surtere 40 kilometroj ĝis kie la lumturo staras”, diris la mezo. “Sed surakve, nur 20, mi kredas”.

“Bone”, diris la Doktoro, rapide surtirante sian mantelon. “Atendu momenton dum mi vekos Dab-Dabon”.

La Doktoro kuris en la kuirejon de la poŝtoŝicejo kaj vekis la povran mastrumiston, kiu profunde dormis apud la kuireja forno.

“Aŭskultu, Dab-Dabo!” diris la Doktoro, skuante ŝin. “Vekiĝu! La lumilo de Kabo Stefano estingiĝis!”

“Kiiiĵĵo?” diris Dab-Dab, dormeme malfermante siajn okulojn. “Fajro estingiĝis?”

“Ne, la lumturo sur Kabo Stefano”, diris la Doktoro. “Mevo ĵus venis por informi min. La ŝiparo estas en danĝero. Averioj, sciu, ktp. Vekiĝu kaj aspektu sencoplana, mi petegas!”

Fine povra Dab-Dabo, plene veka, komprenis la situacion. Kaj post momento ŝi estis preta agi.

“Mi scias kie ĝi estas, Doktoro. Mi tuj flugos tien. — Ne, ne necesas ke la mevo gvidu min. Li restu kun vi por gvidi vin. Sekvu min tuj en la kanuo. Se mi povos eltrovi ion, mi revenos kaj renkontos vin survoje. Alie, mi atendos vin ĉe la lumturo, Bonfortune estas kvieta nokto — eĉ kvankam senluma!”

Per flugilbato Dab-Dabo flugis rekte tra la malferman fenestron kaj malaperis en la nokto, dum la Doktoro ekprenis sian malgrandan nigran medikamentosakon kaj, vokinte al la mevo sekvi lin, kuris al la alia finaĵo de la flosanta domo, malligis la kanuon kaj ensaltis. Post tio li depuŝis sin, cele ĉirkaŭ la insulon Neniujon kaj pagajis kiel eble plej forte direkte al la marfinaĵo de Kabo Stefano.

Proksimume duonvoje al la longa terkolo kiu etendiĝis en la mornan oceanon, Dab-Dabo renkontis la kanuon de la Doktoro — kvankam kiel ŝi trovis ĝin en la mallumo, gvidate nur de la sono de la pagajo, kiu scias?

“Doktoro”, diris ŝi, “se la gardisto de la lumturo estas en ĝi, nepre li malsanas aŭ suferas. Mi bategis sur la fenestrojn, sed neniu respondis”.

“Jadil!” murmuris la Doktoro, pagajante des pli forte, “kio do okazis?”

“Eĉ pli malbone”, diris Dab-Dabo, “ĉe la fora flanko de la kabo — ĝi ne videblas ĉi tie — estas la lumilo de granda velŝipo iranta suden, rekte cele la rokojn. Ili ne povas vidi la lumturon kaj ne scias pri la danĝero”.

“Jadiege!” ĝemis la Doktoro, kaj li preskaŭ rompis la pagajon dum li batadis la akvon malantaŭ si por plirapidigi la kanuon.

“Kiom malproksima estas la ŝipo nun?” demandis la mevo.

“Eble du kilometrojn”, diris Dab-dabo. “Sed ĝi estas grandega — se taksi per la alto de la mastolumo — kaj ne longe daŭros antaŭ ol ĝi kontraŭbatos la kabon”.

“Pluiradu, Doktoro”, diris la mevo. “Mi alvenigos kelkajn amikojn miajn”.

Kaj la mevo etendis siajnflugilojn kaj forflugis cele la teron, farante la saman krion kiun la Doktoro aŭdis tra la fenestro de la poŝtoŭicejo.

Johano Dolittle tute ne konis lian celon. La mevo mem ne certis ke li povos akurate sukcesigi sian planon. Sed baldaŭ, ĝojige al li, la marbirdo aŭdis respondon al sia voko el la rokoplana bordo kaŝita de mallumo. Kaj baldaŭ centoj da kolegaj mevoj cirkladis ĉirkaŭ li en la nokto.

Li gvidis ilin al la granda ŝipo, kiu trankvile velas direkte al la rokoj kaj averio. Kaj tie, antaŭen irinte al kie la stiristo tenis la spokojn de la rado rigardante la kompason balanciĝantan antaŭ li, laŭ la lumo de eta, ne tre brila lampo, la mevoj komencis fluge bati la vizaĝon de la stiristo kaj kovri la vitron de la kompaso, tiel ke li ne povis stiri la ŝipon.

La stiristo elkriegis petante helpon, dirante ke li ne povas vidi por stiri la boaton. Tiam la oficistoj kaj velistoj hastis helpi lin kaj penis forpeli la birdojn.

Intertempe, la Doktoro en sia kanuo atingis la Kabon Stefano kaj, saltinte sur la teron, li grimpis la rokojn al la lumturo, kies granda turo etendiĝis supren super la nigra senluma maro. Fuŝpalpante li fine trovis la pordon kaj bategis ĝin, kriegante ke oni enlasu lin. Sed neniun respondis. Kaj Dab-Dabo flustris per raŭka voĉo ke la lumo de la ŝipo estas nun pli proksime — apenaŭ kilometron for de la rokoj.

Tiam la Doktoro retrotiris sin por kuri kaj ĵetis sin plenpeze kontraŭ la pordon. Sed la ĉarniroj kaj seruro estis fabrikitaj por toleri la bategadon faratan de la maro kaj ili ne cedis pli ol se li estus muŝo.

Fine, kolerege muĝante, la Doktoro kaptis rokon grandan kiel seĝo de la tero kaj bategis kiel eble plej forte kontraŭ la seruron de la lumtura pordo. Bruegante la pordo ekmalfermiĝis kaj la Doktoro ensaltis.

Sur la ŝipo la maristoj ankoraŭ bataladis kontraŭ la mevoj. La kapitano, vidante ke neniu navigisto povus stiri la boaton ĝuste dum miloj da flugiloj flirtas antaŭ liaj okuloj, donis haltigi la ŝipon provizore kaj elpreni la flekseblajn akvotubojn. Kaj forta akvofluo estis verŝata sur la mevojn ĉirkaŭ la navigis-



to, tiel ke ili ne plu povis proksimiĝi al li. Tiam la ŝipo rekomencis veli kaj denove moviĝis direkte al la kabo.

En la lumturo la Doktoro trovis la mallumon eĉ pli nigra. Kun siaj manoj etenditaj antaŭ si, li rapidis antaŭe kaj lia unua ago estis stumbli pro viro kuŝanta sur la planko tuj post la pordo. Sed atendi kontroli kio okazis al li, la Doktoro transsaltis lian korpon kaj komencis palpi sian vojon laŭ la kurbiĝanta ŝtuparo de la turo kondukanta al la granda lumilo ĉe la supro.

Intertempe Dab-Dabo restis malsupre ĉe la pordo, rigardante trans la maron al la mastolumo de la ŝipo — kiu, post nelonga paŭzo, nun plu venas cele la rokojn. Ĉiumomente ŝi anticipis ekflagron de la granda lumilo de la lumtura lampo, tuj kiam la Doktoro bruligos ĝin, por averti la velistojn pri ilia danĝero. Sed, anstataŭe, ŝi baldaŭ aŭdis la doloroplenan voĉon de la Doktoro vokanta ĉe la supro de la ŝtuparo:

“Dab-Dabo! Dab-Dabo! Mi ne povas bruligi ĝin. Ni forgesis kunporti alumetojn!”

“Nu, kien vi metis la alumetojn, Doktoro?” vokis Dab-Dabo. “Vi ĉiam portas ilin en via mantelo”.

“Li lasis ilin apud mia pipo sur la informotablo”, sonis la voĉo de la Doktoro ĉe la supro de la ŝtuparo. “Sed devas esti alumetoj en la lumturo ie. Ni devas trovi ilin”.

“Kian eblon fari tion” kriis Dab-Dabo. “Estas nigrege senlume ĉi tie. Kaj la ŝipo pliproksimiĝas konstante”.

“Palpu en la poŝoj de la viro” vokis Johano Dolittle. “Rapidu!”

Post momento Dab-Dabo traserĉis la poŝojn de la viro kuŝanta senmove sur la planko.

“Li ne havas alumetojn sur si”, ŝi kriegis. “Tute neniun”.

“Kial misfortunaĉo!” murmuris Johano Dolittle.

Kaj sekvis solena silento en la lumturo dum la Doktoro supre kaj Dab-Dabo sube pensis morne pri tiu granda ŝipo velanta averien ĉar ili ne havis alumetojn.

Sed subite el la nigra kvieto sonis malgranda dolĉa voĉo kantanta ie proksime.

“Dab-Dabo!” kriis la Doktoro flustre. “Ĉu vi aŭdas tion? Kanario! Kanario kantas ie — verŝajne en kaĝo en la kuirejo de la lumturo!”

Post momento li brue malsupreniris la ŝtuparon. “Venu!” li kriis. “Ni trovu la kuirejon. Tiu kanario scios kie estas alumetoj. Trovu la kuirejon!”

Tiam ili ambaŭ stumbladis en la mallumo, palpante la murojn, kaj baldaŭ ili trovis nealtan pordon, malfermis ĝin kaj falis kapantaŭe laŭ nelonga ŝtuparo kondukanta al la kuirejo de la lumturo. Ĝi estis malgranda subtera ĉambro, kia kelo, ĉizita en la roko sur kiu staris la lumturo. Se ja estis fajro aŭ kuirilo en ĝi, ĝi jam antaŭ longe estingiĝis, ĉar la mallumo tie estis egale nigra kiel ĉie aliloke. Sed tuj kiam la pordo malfermiĝis, la kantado de la birdo plilaŭtiĝis.

“Diru” vokis Johano Dolittle per la kanaria lingvo, “kie estas la alumetoj? Hastu!”

“Ho, fine vi venis”, diris alta malgranda ĝentila voĉo el la mallumo. “Ĉu vi bonvolos meti kovrilon sur mian kaĝon? Estas ventoblovo kaj mi ne povas dormi. Neniu venis al mi ekde la tagmezo. Mi ne scias kio eble okazis al la gardisto. Li ĉiam kovras mian kaĝon je la horo de vespermanĝo. Sed ĉinokte mi tute ne estis kovrita, do mi plu kantadis. Vi trovos mian kovrilon sur la —”

“Alumetoj! Alumetoj! Kie estas la alumetoj?” kriegis Dab-Dabo. “La lumo estingiĝis kaj ŝipo estas en danĝero. Kie troviĝas la alumetoj?”

“Sur la kamenobreto, apud la piprujo”, diris la kanario. “Venu al mia kaĝo kaj palpu maldekstre — alte — kaj via mano tuj trafos ilin”.

La Doktoro transsaltis la ĉambron, renversante seĝon, kaj palpatis la muron. Lia mano

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

tuŝis angulon de ŝtona breto kaj post momento Dab-Dabo suspiris senŝarĝiĝe, ĉar ŝi aŭdis la gajan sonon de skuiĝanta skatolo da alumetoj dum la Doktoro penis lumigi.

“Vi trovos kandelon sur la tablo — tie — rigardu malantaŭ vi”, diris la kanario kiam la alumetlumo iomete lumigis la kuirejon.


Per tremantaj fingroj la Doktoro flamigis la kandelon. Tiam, ŝirmante la flamon per sia mano, li rapidegis el la ĉambron kaj supren laŭ la ŝtuparo.

“Fine!” li murmuris. “Espereble mi ne tro malfruos!”

Ĉe la supro de la kuireja ŝtuparo li renkontis la mevon enirantan la lumturon kun du kompanoj.

“Doktoro”, kriis la mevo, “ni detenis la ŝipon laŭpove. Sed la stultaj velistoj ne komprenis ke ni penas savi ilin, verŝegis akvon sur nin, kaj ni devis cedi. La ŝipo estas nun proksimega”.

Senvorte la Doktoro rapide grimpis la kurbiĝan ŝtuparon de la turo. Ĉirkaŭe-ĉirkaŭe li iris supren, ĝis li pretis fali pro kapturniĝo.



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Fine, atinginte la grandan vitran lampoĉambron ĉe la supro, li demetis sian kandelon, kaj, flamiginte samtempe du alumetojn, li tenis ilin po unu en ĉiu mano kaj flamigis la grandan meĉon en du lokoj.

Dab-Dabo jam estis reelirinta kaj rigardadis laŭ la maro por vidi la alvenantan ŝipon. Kaj fine kiam la granda lumo de la granda lampo ĉe la supro de la turo ekflagris super la maron, jen la antaŭaĵo de la ŝipo, apenaŭ cent metrojn for de la rokoplana bordo de la kabo!

Eksonis kriego de la gvatisto, ordonoj de la kapitano sonegis, estis multa blovado de fajfiloj kaj sonigado de sonoriloj. Kaj nur lastamomente povante savi sin kontraŭ subakviĝo, la granda ŝipo turnis sian nazon cele la maron kaj pretervelis sekure.

La matena suno rigardanta tra la fenestron de la lumturo trovis la Doktoron ankoraŭ atentantan la gardiston kie li kuŝis ĉe la malsupro de la ŝtuparo de la turo.

“Li rekonsciiĝas”, diris Dab-Dabo. “Rigardu, liaj okuloj komencas palpebrumi”.

“Portu al mi pli da pura akvo el la kuirejo” diris la Doktoro, kiu banadis grandan ŝvelaĵon sur la flanko de la kapo de la viro.

Baldaŭ la gardisto larĝe malfermis siajn okulojn kaj gapis la vizaĝon de la Doktoro.

“Kiu? — Kio? — ” li murmuris senkomprene. “La lumilo! — Mi devas priatenti la lumilon!” kaj li penis stariĝi, malforte.

“Estas bone”, diris la Doktoro. “La lampo estas bruligita. Kaj jam estas preskaŭ taglumo. Jen, trinku ĉi tion. Ĝi pli bonsentigos vin”.


Kaj la Doktoro tenis iom da medikamento apud liaj lipoj, kiun li prenis el la malgranda nigra sako.

Post nelonge la viro fariĝis sufiĉe forta por stari surpiede. Tiam, helpate de la Doktoro, li marŝis al la kuirejo, kie Johano Dolittle kaj Dab-Dabo komfortigis lin en brakseĝo kaj kuiris matenmanĝon por li.

“Mi multe dankemas al vi, nekonato, kiu ajn vi estas”, diris la viro. “Kutime ni estas du, mi kaj mia helpisto Fredo. Sed hieraŭ matene mi lasis Fredon foriri en la boato por akiri ostr-ojn. Tial mi estas sola. Ĉirkaŭ la tagmezo mi estis malsupreniranta la ŝtuparon, metinte novajn meĉojn en la lampon, kaj mia piedo ekglitis kaj mi falis al la malsupro. Mia kapo batis la muron kaj mi tute senkonsciiĝis. Kiom longe mi kuŝis tie antaŭ ol vi trovis min, tion mi ne scias”.

“Nu, ĉio bonas kiu finiĝas bone”, diris la Doktoro. “Prenu ĉi tion; nepre vi mortemalsatas”.

Kaj li transdonis al la gardisto grandan tason da varmega



kafo.

Ĉirkaŭ la deka matene Fredo, la kunlaboranto, revenis per la malgranda velboato post sia ostrokolekta ekskurso. Lin multe maltrankviligis sciigi pri la akcidento okazis kiam li estis nedeĵoranta. Fredo, same kiel la alia gardisto, estis londonano kaj maristo. Li estis afablulo, kaj li kaj lia kunhelpisto (kiu nun preskaŭ plene resaniĝis post sia akcidento) multe ĝuis la viziton de la Doktoro, kiu interrompis la tedan enuon de ilia soleca vivo.

Ili gvidis la Doktoro tra la tuta lumturo por ke li vidu ĝian funkciadon. Kaj ekstere ili tre fiere montris al li la malgrandan ĝardenon de tomatoj kaj tropeoloj kiun ili estis plantintaj apud la malsupro de la turo.

Ili rajtis feriadi nur unufoje en la jaro, ili diris al Johano Dolittle, kiam ŝipo de la registaro haltas apud Kabo Stefano kaj portas ilin al Anglujo por sesmonata liberperiodo. Tiam du aliaj virtoj restas anstataŭ ili por priatenti la lumilon dum ilia foresto.

Ili demandis al la Doktoro ĉu li povas diri al ili novaĵojn pri ilia amata Londono. Sed li devis konfesi ke ankaŭ li estis for de tiu urbo jam delonge. Tamen, dum ili konversaciis Ĉipsajdo venis en la kuirejon de la lumturo, serĉante la Doktoron. La urba pasero ĝojis trovi ke la gardistoj ankaŭ estas londonanoj. Kaj li diris al ili, per la Doktoro, la plej freŝajn klaĉaĵojn el Wapping, Limehouse, la Orientindiaj doko, kaj la varfoj kaj la ŝipirado sur Rivero Londona.

La du gardistoj kredis la Doktoron nepre freneza kiam li komencis ĉirpe konversacii kun Ĉipsajdo. Sed per la respondoj kiujn ili ricevis al siaj demandoj ili konstatis ke neniel falsita estas la novaĵoj pri la urbo donitaj de la pasero.

Ĉipsajdo diris ke la vizaĝoj de tiuj du londonaj maristoj estis la plej bela pejzaĝo kiun li vidis ekde sia veno al Afriko. Kaj post tiu unua vizito li konstante flugis dum sia libertempo al la lumturo por vidi siajn novajn amikojn. Kompreneble, li ne povis paroli kun ili, ĉar neniu el ili scipovis la paseran lingvon — eĉ ne la londonan paseran lingvon. Sed Ĉipsajdo amis esti kun ili, malgraŭ tio.

“Ili estas tiom plaĉaj kaj konindaj”, li diris, “post tiuj paganaj idoloj ĉi tie. Kaj nur aŭskultu Fredon kanti ‘Zorgu ke mia tombo restu verda!’”

La gardistoj de la lumturo bedaŭris la foriron de la Doktoro, kaj rifuzis lasi lin foriri antaŭ ol promesi veni tagmanĝi kun ili la sekvan dimanĉon.

Kiam ŝarĝintis lian kanuon per bareto da rozkoloraj tomatoj kaj bukedo de tropeoloj, la Doktoro, kun Dab-Dabo kaj Ĉipsajdo, forpagajis cele Fantipon, dum la gardistoj “ĝis-revidon” signis el la pordejo de la lumturo.

La Doktoro ne multe pagajis dum sia reiro al la poŝtoŝeĵo antaŭ ol la mevo kiu estis informinta pri la lumilo devancis lin.

“Ĉu ĉio bona, nun, Doktoro?” li demandis, gracie cirklande ĉirkaŭ la kanuon.

“Jes”, diris Johano Dolittle, maĉante tomaton. “La kapo de tiu viro vundegiĝis per tiu falo. Sed li tute resaniĝos baldaŭ. Tamen, sen la helpo de la kanario informanta nin pri kie estas la alumetoj — kaj ankaŭ vi, fortenta la maristojn — ni neniel savus la ŝipon”.

La Doktoro ĵetis tomatan ŝelon el la kanuo kaj la mevo kaptis ĝin eksperte en la aero antaŭ ol ĝi tuŝis la akvon.

Nu, mi ĝojas ke ni alvenis akurate”, diris la birdo.

“Diru al mi”, petis la Doktoro, penseme rigardante lin ŝvebi kaj balanciĝi kaj ĉirkaŭflugi la boaton, “kial vi venis informi min pri la lumo? Mevoj kutime ne multe ĝenas sin pri homoj aŭ la fato de ŝipoj, ĉu?”

“Vi eraras, Doktoro”, diris la mevo, kaptante alian ŝelon precizege. Ŝipoj kaj la homoj en ili tre gravas al ni — ne tiom ĉi tie en la sudo. Sed en la nordo, nu, sen la ŝipoj en la

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

vintro ni mevoj ofte malfacile trovas sufiĉajn manĝaĵojn. Komprenu, post la alveno de malvarmo, fiŝoj kaj aliaj marbestoj iom maloftiĝas. Kelkafoje ni transvivas sekvante la riverojn al la urboj por resti apud la artefaritaj lagoj en parkoj kie ekzotikaj akvobirdoj estas tenataj. Homoj venas al la parkoj kaj ĵetas biskvitojn en la lagojn por la akvobirdoj. Sed se ni proksimas, ni kaptas la biskvitojn antaŭ ol ili trafas la lagon — tiel”, kaj la mevo ekkaptis trian tomatan ŝelon per fulme rapida impeto dum ĝi flugis.

“Sed vi parolis pri ŝipoj”, diris la Doktoro.

“Jes”, daŭrigis la mevo — iom neklare, ĉar lia buŝo estis plena de tomata ŝelo — ni trovas ŝipojn multe pli bonaj por vintra manĝado. Komprenu, estas vere maljuste, kiam ni iras kapti ĉiujn manĝaĵojn intencitajn por la ekzotikaj akvobirdoj en parkoj. Do ni tute ne faras tion se ne nepre necesas. Kutime dumvintro ni restas kun la ŝipoj. Ho, antaŭ du jaroj mi kaj kuzo mia vivis dum la tuta jaro sekvante ŝipojn por la manĝaĵeroj kiujn la servistoj ĵetas en la maron. Ju pli malkvieta la vetero, des pli da manĝaĵoj ni ricevas, ĉar tiam la pasaĝeroj ne emas manĝi kaj la plejparto de la manĝaĵoj elĵetiĝas. Jes, mi kaj mia kuzo kvazaŭ kroĉis nin al Transatlantika Ŝiplinio, kies ŝipoj veturas inter Glasgovo kaj Filadelfio, kaj kunveturis tien kaj reen multfoje trans la oceanon. Sed poste ni transiris al la Kompasinga Linio — Tilburio al Bostono.

“Kial?” demandis la Doktoro.

“Ni trovis ke ili pli bone manĝigas la pasaĝerojn. Kun la **Kompasinga**, kiu elĵetis por ni matenbiskvitojn, posttagmezajn frandaĵojn kaj sandviĉojn nokte — kaj ankaŭ tri grandajn manĝojn ĉiutage — ni vivis tiom lukse kiel batalokoj. Ĝi preskaŭ maristigis nin por ĉiam. La vivo estas luksa — oni manĝas senĝene. Jes ja, mevoj interesiĝas pri homoj kaj ŝipoj, Doktoro — multege. Ho, nepre mi malvolus akcidenton por ŝipo — precipe por pasaĝerŝipo”.

“Humf! Tre interese”, murmuris la Doktoro. “Ĉu vi vidis multajn akcidentojn — ŝipojn en danĝero?”



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Ho, oftege”, diris la mevo — “ŝtormoj, dumnoktaj kolizioj, ŝipoj serteriĝintaj pro nebulo, kc. Ho jes, mi vidis multajn endanĝerigitajn ŝipojn sur la maro”.

“Ha!” diris a Doktoro, suprenrigardante de sia pagajado. “Vidu, ni jam reatingis la poŝtoŝticejon. Kaj jen la puŝumi-tiruvio sonorigas por lunĉo. Ni akurate alvenis. Mi flaras hepaton kaj lardon — ĉi tomatoj bonege akompanos ĝin. Ĉu vi bonvolos enveni kaj manĝi kun ni?” li demandis la mevon. “Volonte mi aŭdus pli pri via vivo kun ŝipoj. Vi donis al mi ideon”.

“Dankon”, diris la mevo. “Mi ja iom manĝemas. Vi estas tre afabla. La unuan fojon mi manĝos ŝipmanĝaĵojn **en** ŝipo”.

Kaj kiam la kanuo estis ligita ili eniris la flosantan domon kaj sidiĝis ĉe la kuireja tablo por lunĉi.

“Nu”, diris la Doktoro al la mevo tuj post ilia sidiĝo, “vi parolis pri nebuloj. Kion vi mem faras en tia vetero — vi ja ne povas pli bone vidi en nebulo ol la maristoj, ĉu?”

“Ne”, diris la mevo, “vi pravas, ni ne povas pli bone **vidi**. Sed jadi! Se ni estus tiom senhelpaj en nebulo kiel la maristoj, ni ĉiam estus perditaj. Nu ni, se ni iras al specifa loko kaj ni renkontas nebulon, flugas super ĝi — multe supre, kie la aero estas klara. Tie ni povas trovi nian vojon tute facile”.

“Mi komprenas”, diris la Doktoro. “Sed la ŝtormoj, kion vi faras por sekurigi vin dum ŝtormoj?”

“Nu, kompreneble, en ŝtormoj — grandaj ŝtormoj — eĉ marbirdoj ne ĉiam povas flugi laŭvole. Ni mevoj neniam klopodas trabati vojon en ŝtormego. La petreloj penas kelkafoje, sed ne ni. Estas tro lacige, kaj eĉ kiam oni malsupreniras por naĝi sur la akvo, foj-foje, estas danĝere. Ni flugas kun la ŝtormo — lasas ĝin porti nin kien ajn. Kaj post la malseveriĝo de la vento ni revenas kaj plu veturas”.

“Sed tio necesigas multan tempon, ĉu ne?” demandis la Doktoro.

“Ho jes”, diris la mevo, “ĝi malŝparigas iom da tempo. Sed, sciu, ni tre malofte estas kaptitaj de ŝtormo”.

“Sed kiel?” demandis Johano Dolittle.

“Ni scias kie ĝi estas, antaŭ ol atingi ĝin. Kaj ni ĉirkaŭiras ĝin. Neniu sperta marbirdo lasas sin flugi en grandan ŝtormon”.


“Sed kiel vi scias kie estas la ŝtormoj?” demandis la Doktoro.

“Nu, diris la mevo, “mi supozas ke niaj du ĉefaj avantaĝoj kompare kun maristoj pri scii kiam kaj kie anticipi malbonan veteron estas nia bona vidkapablo kaj nia sperto. Unue, ni povas ĉiam altiĝi en la aero kaj transrigardi la maron eble cent kilometrojn. Kaj se ni vidas tempeston venanta ni povas nin turni kaj forflugi. Kaj ni povas rapidi pli ol la plej rapida tempesto. Kaj due, nia sperto estas multege pli granda ol tiu de la maristoj. Maristoj, povruloj, kredas koni la maron — ke ili vivas sur ĝi. Sed estas malvere — kredu min, malvere. Multan tempon ili estas en la kajuto, multan tempon ili estas surtere kaj multan tempon ili dormas. Kaj eĉ kiam surferdeke, ili ne konstante rigardas la maron. Ili umas per ŝnuroj kaj brosoj kaj ŝvabriloj kaj siteloj. Tre malofte oni vidas mariston **rigardadi** la maron”.

“Supozeble ĝi tedas ilin, povruloj!” murmuris la Doktoro.

“Eble. Sed vere, se oni volas esti bona maristo, la maro plej gravas, ĉu ne? Tion oni devas rigardi — studi. Nu, ni marbirdoj pasigas preskaŭ la tutan vivon, nokte kaj tage, printempe, somere, aŭtune kaj vintre, **rigardante la maron**. Kaj la rezulto?” demandis la mevo, prenante novan toastopecon el la rako kiun Dab-Dabo transdonis al li. “La rezulto estas ĉi tiu: ni **konas** la maron. Ho, Doktoro, se vi enŝlosus min en skatoleton senfenestran kaj portus min al la mezo de kiu ajn oceano kaj malfermus la skatolon kaj lasus min rigardi

la maron — eĉ se ne estus videbla ereto da tero — mi povus diri al vi kiu estas la oceano
kaj preskaŭ precize je kilometro ĉe



kiu parto ĝia ni estas. Sed, kompreneble, mi devus koni la daton.”

“Mirinde!” kriis la Doktoro. “Kiel vi faras tion?”

“Per ĝia koloro; per la eretoj flosantaj en ĝi; per la specoj de fiŝoj kaj marbestoj naĝantaj en ĝi; per la detaloj de la ondetoj kaj ondegoj; per ĝiaodoro; per ĝia gusto, ĝia saleco kaj kelkcent aliaĵoj. Sed sciu, plej ofte — ne ĉiam, sed plej ofte — mi povus diri al vi kie ni estas dum miaj okuloj estas fermitaj, tuj kiam mi eliras el la skatolo, nur per la blovo de la vento sur miajn plumojn.”

“Jadi!” la Doktoro kriis. “Ĉu vere?”

“Jen la plej granda problemo rilate al maristoj, Doktoro. Ili ne ĝuste konas ventojn. Ili povas distingi inter nordorienta vento kaj okcidenta vento. Kaj inter forta kaj malforta. Kaj jen preskaŭ ĉio. Sed pasiginte la plejparton de la vivo kiel ni, flugante inter la ventoj, uzante ilin por grimpi, subirante kaj ŝvebante per ili, oni rekonas ke multo plia estas scienda pri vento ol nur ĝiaj direkto kaj forto. Kiom ofte ĝi blovetas supren aŭ malsupren, kiom ofte ĝi febliĝas aŭ fortiĝas, tio informas vin multege, se vi scias la sciencon de la ventoj.

Kiam la lunĉo estis finita, la Doktoro tiris fotelon apud la fornon kaj bruligis sian pipon. Mi pripensas”, li diris al la mevo, “komenci novan fakon en mia poŝtoŝicejo. Plejparte la birdoj kiuj helpas min en ĉi tiu poŝta afero ŝajnas rimarkinde bonaj veteroprognostoj. Kaj kion vi ĵus diris al mi pri via scio rilate al la maro kaj ŝtormoj donis al mi la ideon malfermi centralon de vetero-prognozo.”

“Kio estas tio?” demandis Jipo, kiu kunbrosadis la panerojn poste elmetotajn por la birdoj sur la ferdeko de la flosanta domo.


“Centralo de vetero-prognozo”, diris la Doktoro, “estas io tre grava — precipe por ŝipoj kaj kultivistoj. Ĝi estas centralo kiu informas pri kia la vetero estos.”

“Kiel oni faras tion?” demandis Gub-Gubo.

“Fiaske”, diris la Doktoro — “almenaŭ, ofte. Egale ofte ili malsukcesas kiom sukcesas. Oni uzas ilojn — termometrojn, barometrojn, higrometrojn kaj vento-mezurilojn ktp. Sed plejparte la centraloj de vetero-prognozo ĝis nun estas ne tre fidindaj. Mi kredas povi multe pli sukcesis per miaj birdoj. Ili tre malofte eraras prognozante la veteron.”

“Nu, pri kiuj partoj de la mondo vi volas koni la veteron, Doktoro?” demandis la mevo. “Se nur pri Fantipo aŭ Okcidenta Afriko, estos facilege. Ĉi tie estas nur tornadoj. Dum la cetero de la jaro estas nur frite varmege. Sed se vi volas prognozi la veterojn de Magelana Markolo aŭ Nova Zemblo aŭ tiuj landoj kie estas ĉiaj ekzotikaj veteroj, estas malsame. Eĉ prognozi la veteron de Anglujo plene okupadus vin. Mi mem neniam kredis ke la vetero mem scias kia ĝi tuj poste estos, en Anglujo.”

“La angla klimato estas tute bona”, interrompis Ĉipsajdo, kaj liaj plumoj ektaŭziĝis kvazaŭ por batalo. “Ne malestimaĉu Anglujon, knabo. Kion vi nomas la veteron ĉi tie? Klimaton, ĉu? Nu, mi nomus ĝin vaporbano. En Anglujo ni ŝatas variadon



adon de la klimato. Kaj tion ni ricevas. Tial angloj havas tiom sanajn ruĝetajn vizaĝojn. Ĉi tie la povruloj nigriĝas.”

“Mi deziras”, diris la Doktoro, “povi prognozi la veteron ĉie en la mondo. Mi vere ne komprenas kial neeblus. Ĉi tiu oficejo, kun miaj filioj, komunikas kun birdoj irantaj ĉien en la mondo. Mi povus plibonigi la kultivadon kaj agrikulturon de la tuta homaro. Sed ankaŭ, kaj precipe, mi volas centralon por la oceana vetero, por helpi la ŝipojn.”

“Ha”, diris la mevo, “pri la surtera vetero mi ne povus multe helpi vin. Sed rilate al la oceanoj, mi konas birdon kiu scias pli pri la marvetero ol iam sciis iu ajn centralo.”

“Ho”, diris la Doktoro, “kiu estas?”

“Ni nomas lin Unokulo”, diris la mevo. “Li estas maljunega albatroso. Neniu scias lian aĝon. Li perdis okulon batalante fiŝaglon por fleso. Sed li estas la plej mirinda vetero-prognozisto kiu iam vivis. Ĉiuj marbirdoj ege respektas liajn opiniojn. Ŝajnas ke li neniam faris eraron.”

“Ĉu vere?” diris la Doktoro. “Tre volonte mi renkontus lin.”

“Mi venigos lin al vi”, diris la Mevo. “Li longas ne tre malproksime — sur roko apud la bordo de Angolo. Li loĝas tie ĉar la moluskoj tiom abundas sur la roko, kaj li estas tro febla — pro sia malforta viv-kapablo — por kapti aliajn specojn de pli viglaj fiŝoj. Estas iom teda vivo por tia maljunulo, post tiom da veturado. Li vere plene ĝojos scii ke vi volas lian helpon. Mi iros venigi lin jam tuj.”

“Bonege”, diris la Doktoro. “Mi kredas ke via amiko povos multe helpi nin.”

Do la mevo, dankinte la Doktoron, kaj Dab-Dabon pro vere bona lunĉo, prenis kelkajn poŝtkartojn irontajn al Angolo kaj forflugis por venigi Unokulon, la albatrosan.

Poste dum tiu posttagmezo la mevo revenis kaj kun li venis la granda Unokulo, la plej maljuna birda vetero-prognozisto.

La Doktoro poste diris ke li neniam antaŭe vidis birdon kiu tiom memorigis lin pri maristo. Lin karakterizis la ruliĝema, disstarema marŝmaniero de maristo; li forte odoris je fiŝoj; kaj kiam ajn li parolis pri la vetero li same strabrigardis al la ĉielo per sia unu okulo, kiel ofte faras maljunaj maristoj.

Li akordis kun la Doktoro ke birda vetero-prognoza centralo estas tute ebla kaj estigos multe pli bonajn veterraportojn ol eblis ĝis tiam. Post tio, dum tutaj horo kaj duono li lekciis al la Doktoro pri ventoj. Ĉiun vorton lian Johano Dolittle skribis en notlibro.

Nu, la vento estas la ĉefa kaŭzo de veterŝanĝoj. Kaj se, ekzemple, oni scias ke pluvas en la Maniko-Insuloj je la horo de la ĉefmanĝo ĵaŭde — kaj nordorienta vento blovas — oni povas esti tre certa ke la pluvo atingos Anglujon iam dum la nokto de ĵaŭdo.

Tujsekve la Doktoro sendis leteron al ĉiuj estroj de la poŝtofilioj, petante ilin fiksi kun la diversaj specoj de birdoj tempon je kiu ili komencos sian ĉiujarajn migrojn — ne nur dum la dua semajno de novembro, aŭ simile malprecize — sed la ekzaktajn tagon kaj horon. Tiel, sciante kiom rapide ĉiu speco de birdo flugas, li povis kalkuli preskaŭ je la ekzakta minuto kiam ili atingos sian celokon. Kaj se ili malfruos, li scios ke malbona vetero malrapidigis ilin dumvoje aŭ ke ili prokrastis ekflugi antaŭ ol ŝtormoj ĉesis.

La Doktoro, la mevo, Unokulo, Dab-Dabo, Ĉipajdo, Rapidulo-la-Tanĝema kaj Tu-Tuo la matematikisto kunlaboris kaj diskutis ĝis malfrue dum la nokto, kalkulante multajn pliajn aranĝojn kaj detalojn por funkciigi bonan vetero-centralon. Kaj post kelkaj semajnoj dua tute nova afiŝejo aperis sur la muroj de la poŝtofiĉejo de la Doktoro, apud tiu kies afiŝoj parolis pri la elirontaj kaj envenontaj poŝtaĵoj.

La nova afiŝejo havis la titolon **Veterraportoj**, kaj tekstis iom tiel:

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

La Verdaj Ardeoj malfruis je unu tago, tri horoj, kaj naŭ minutoj kiam ili atingis Kabon Hornan veninte el la Sandviĉaj Insuloj. Vento sud-sud-orienta. Tempestan veteron anticipu laŭlonge de la okcidenta bordo de Ĉilio, kaj tempestetojn en Maro Antarktika.

Kaj ankaŭ la terbirdoj, precipe la bermanĝantoj, tre helpis la Doktoron informante lin per leteroj pri ĉu aŭ ne la vintro estos severa en ilia propra lando. Kaj li kutimis skribi al kultivistoj ĉie en la mondo, avizante ilin ĉu anticipi akran froston, malsekan printempon, aŭ sekan someron — kio, kompreneble ege helpis ilin kultivadi.

Kaj ankaŭ la fantipanoj, kiuj antaŭ tiam multe timis veli longan distancon sur la maro, pro la ŝtormoj, nun havante bonan vetero-centralon, do sciante kian veteron anticipi, komencis konstrui pli grandajn velboatojn anstataŭ siajn malgrandajn malfortikajn kanuojn. Kaj ili fariĝis kion oni nomas komercista nacio, komercante laŭlonge de la bordoj de Okcidenta Afriko, kaj eĉ iris tiom suden kiel Kabo Bonespera kaj eniris Hindian Oceanon por komerci per varoj kun homoj de fremdaj landoj.

Tio multe pliriĉigis kaj pligravigis la Regnon Fantipo, kompreneble. Kaj la Reĝo donis al la Alilanda Poŝtoŝticejo grandan kvanton da mono, kiun la Doktoro uzis por plibonigi kaj pligrandigi la flosantan domon.

Kaj baldaŭ la Neniuja Vetero-Centralo komencis koniĝi eksterlande. La kultivistoj en Anglujo, kiuj ricevis tiom bonajn veterraportojn de la Doktoro, iris al Londono kaj informis la Registaron ke ĝiaj propraj raportoj estas senvaloroj, ke certa Johano Dolittle, M.D., sendas al ili multe pli bonajn raportojn el iu loko en Afriko.

Kaj la Registaro multe ekscitiĝis pro tio. Kaj ili sendis la Reĝan Meteorologon, maljunan grizharan vetero-prognoziston, al Fantipo por trovi kiel la Doktoro tiel sukcesas.



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

Johano Dolittle vidis lin, unu tagon, vagadi tra la poŝtoŝtacio, rigardadi la afiŝojn, kaj peni akiri informojn. Sed li trovis nenion. Kaj reirinte al Anglujo li iris al la Registaro:

“Li tute ne havas novajn ilojn. Tiu viro estas ĉarlatano. Li havas tie nur malnovan ŝipaĉon kaj grandan aron da malpuraj birdoj ĉirkaŭflugantaj.”

La eduka flanko de la poŝtoŝtancelo de la Doktoro estis tre grava kaj ĝi konstante kreskis. Kiel li diris al la Tanĝemulo, je la komenco, tuj kiam la birdoj kaj bestoj komprenis la utilon de propra poŝto, ili uzis ĝin konstante pli ofte.

Kaj, kompreneble, kiel antaŭdiris Rapidulo, ili sendis la plejparton de siaj leteroj al la Doktoro. Baldaŭ la povrulon inundis poŝtaĵoj petantaj medicinan konsilon. La eskimaj sledhundoj skribis el malproksima Arktiko por informiĝi pri kion ili faru pri la elfalado de iliaj haroj. La hararo — la sola varmo-konservilo kiun la povruloj havis por protekti sin kontraŭ la polusaj ventoj — estis, kompreneble, tre grava por ili. Kaj Johano Dolittle pasigis plenajn sabaton kaj dimanĉon eksperimentante je Jipo per harmedikamentoj, por trovi metodon kuraci ilian problemon. Jipo estis tre pacienca pri tio, sciante ke la Doktoro faras ĝin por helpi la hundarojn. Kaj li ne grumblis — kvankam li ja menciis al Dab-Dabo ke li sentas sin kvazaŭ apotekon pro la multaj diversaj haroŝmiraĵoj kiujn la Doktoro provuzis sur li. Li diris ke ili tute ruinigis lian flarkapablon por du semajnoj, tiel ke li ne povis ĝuste flari.

Kaj krom la leterojn petantajn medicinan konsilon, la Doktoro ricevis ĉiajn petojn de bestoj tra la tuta mondo kiuj volas informon pri manĝaĵoj por siaj beboj, nestomaterialoj kaj mil aliaj aferoj. Soifante edukon la bestoj faris ĉiajn demandojn, kies respondojn kelkafoje nek la Doktoro nek iu alia povis trovi: El kio konsistas la steloj. Kial la tajdo flusas kaj mal-flusas — kaj ĉu eblas ĉesigi tion?

Do, por plenumi tiun grandan postulon informiĝi, kiun instigis lia poŝto, Johano Dolittle komencis, la unuan fojon en la historio, korespondado-kursojn por la bestoj.

Kaj li presigis foliojn titolitajn “Kion bezonas scii juna kuniklo”, “Kiel prizorgi la piedojn dum frosta vetero”, kc. kc.



Tiujn li elsendis pomile per la poŝto.

Kaj poste, ĉar oni sendis al li tiom da leteroj pri bona konduto en la socio, li verkis **Libro de Etiketo por Bestoj**. Ĝi ankoraŭ estas tre fama verko, kvankam ekzempleroj de ĝi estas nun raraj. Sed kiam li verkis ĝin, la Doktoro presigis unuan eldonon de kvindek mil ekzempleroj kaj elsendis ilin ĉiujn per la poŝto en unu semajno. Ankaŭ tiutempe li verkis kaj dissendis alian tre bone konatan libron sian, titolitan **Unuaktaj teatraĵoj por pingvenoj**.

Sed, ve! anstataŭ malpliigi la nombron de leteroj respondendaj, la Doktoro trovis ke per dissendo de informolibroj li centobligis la jam enorman poŝtaĵaron kiun li devis priatenti.

Jen letero kiun sendis al li porkino en Patagonio:

“Kara doktoro — mi legis vian **Libro de Etiketo por Bestoj** kaj multe ŝatas ĝin. Mi baldaŭ edziĝos. Ĉu estus dece ke mi petu la gastojn alporti napojn al la ceremonio anstataŭ florojn?

“Konigante unu dece edukitan porkon al alia, ĉu oni diru ‘F-ino Virginia Ŝinko, mi kun-prenas al vi S-ron Kolo Baso’, aŭ ‘Konu’?

Kun granda respekto,

Berta Lardo

PS. — Mi ĉiam portas mian fianĉinringon en mia nazo. Ĉu tio estas ĝusta?”

Kaj la doktoro respondis:

“kara berta — Koniganta unu porkon al alia porko, mi konsilas eviti la vorton **‘kun-prenas’**. ‘Konu’ estas tute deca. Memoru ke la celo de etiketo devas esti la instigo de komforta sento — ne de malkomforta.

“Mi opinias ke napoj ĉe nuptoceremonio estas tute konvenaj. Eble petu la gastojn ne depreni la foliojn. Tiel ili aspektos pli bukede.

Kun granda respekto,

Johano dolittle

PARTO III

Nun mi devas paroli al vi pri la Premi-rakonta Konkurso. La famo de la apudkamena rondo dePuddleby, kie la Doktoro amuzis siajn dorlotbestojn per tiom da interesaj rakontoj, fariĝis vere fama. Tu-Tuo klaĉintis pri ĝi; Gub-Gubo, Jipo kaj la blanka muso fanfaronadis pri ĝi. (Komprenu ke ili ĉiam fieris povi diri ke ili estas anoj de la domo de la granda viro.) Kaj post nelonge, per tiu nova poŝtoservo propra, bestoj tra la tuta mondo parolis pri ĝi kaj diskutis ĝin perletere. Preskaŭ tuj la Doktoro komencis ricevi petojn sendi rakontojn perpoŝte. Li fariĝintis egale fama kiel kuracisto por bestoj, edukisto de bestoj, kaj aŭtoro por bestoj.

De la Malproksima Nordo leteroj alvenis dekoje, de polusaj ursoj kaj rosmaroj kaj vulpoj, petante ke li sendu al ili iom da distra legaĵo apud liaj medicinaj pamfletoj kaj libroj pri etiketo. La vintraj noktoj (kiuj daŭris multajn semajnojn en la nordo) estis ege tedaj, ili diris, post la elĉerpiĝo de iliaj propraj rakontoj — ĉar ja ne eblas dormi la **tutan** vintron, kaj kelkafoje necesas fari ion por sin distri sur la solecaj glaciaj blokoj kaj en la loĝlokoj sub la blizarde origina neĝo. Dum iom longa tempo la Doktoro estis tiom okupata de aliaj aferoj ke li ne povis priatenti tion. Sed li konservis ĝin en sia memoro por momento kiam li povos elpensi la plej bonan metodon pritrakti la problemon.

Nu, liaj dorlotbestoj, post la reguliĝo de la poŝtofacejo, ofte trovis ke estas tre tede en la vesperoj. Unu nokton ili ĉiuj estis sidantaj sur la verando de la flosanta domo, demandante inter si kian ludon ili povus fari, kiam Jipo subite diris:

“Mi scias kion ni povos fari — ni instigu la Doktoron rakonti al ni.”

“Ho, vi jam aŭdis ĉiujn miajn rakontojn”, diris la Doktoro. “Kial ne ludi **Serĉu la pantoflon?**”

“La flosanta domo estas tro malgranda”, diris Dab-Dabo.

“Kiam ni lastafoje ludis ĝin, Gub-Gubo estis pikita de la kornoj de la Puŝumi-Tiruvio. Vi havas multajn rakontojn. Rakontu al ni, Doktoro — ne nepre longe.”

“Nu, sed pri kio mi rakontu?” demandis Johano Dolittle.

“Pri kampo de napoj”, diris Gub-Gubo.

“Ne, tio ne taŭgas”, diris Jipo. “Doktoro, kial ne agis kiel vi kelkafoje agis en Puddleby — metu aĵojn el viaj poŝoj sur la tablon, ĝis trovi ion kio memorigos al vi rakonton — ĉu vi memoras?”

“Bone”, diris la Doktoro. “Sed — ”

Kaj tiam lin frapis ideo.

“Aŭskultu”, li diris: “Vi scias ke oni petas min per la poŝto sendi rakontojn. La bestoj ĉirkaŭ Norda Poluso volas distrajn legaĵojn por la longaj vintraj noktoj. Mi komencos porbestan magazinon por ili. Mi nomos ĝin **La arkta monato**. Ĝi estos dissendata per la poŝto kaj distribuata de la filio en Nova Zemblo. Ĝis tiom, sufiĉe bone. Sed la granda problemo estas kiel akiri sufiĉajn rakontojn kaj bildojn kaj artikolojn kc. por plenigi monatan revuon — ne facilas. Nu, aŭskultu, se mi rakontos al vi bestoj ĉi-nokte, vi devos iel helpi min pri mia nova magazino. Ĉiunokte kiam vi volos distri vin, ni laŭvice rakontos. Tiel ni tuj ekhavas sep rakontojn. Nur unu rakonto presiĝos ĉiumonate — la cetero en la magazino estos novaĵoj, medicina konsilo, paĝo por beboj kaj patrinoj, kaj diversaĵoj. Kaj ni havos Premi-rakontan Konkurson. La legantoj juĝos kiu estas plej bona; kaj kiam ili skribos al ni ĉi tie kaj informos nin, ni donos premion al la venkinto. Kion vi pensas?”

“Bonega ideo!” kriis Gub-Gubo. “Mi rakontos morgaŭ nokte. Mi konas bonan rakonton. Nun rakontu vi, Doktoro.”

Do Johano Dolittle komencis meti sur la tablon la enhavon de siaj pantalonpoŝoj, provante trovi ion kio memorigis al li rakonton. Certe li elpoŝigis mirindan kolekton de objektoj. Estis ŝnurpecoj kaj dratpecoj, finaĵoj de krajonoj, poŝtranĉiloj kun rompita klingoj, mantelbutonoj, botbutonoj, lupeo, kompasoj kaj korkotirilo. “Ŝajne nenio esperiga tie”, diris la Doktoro.

“Provu en viaj veŝtaj poŝtoj”, diris Tu-Tuo. “Ili ĉiam estis plej interesaj. Vi ne traserĉis ilin post via foriro el Puddleby. Devas esti multo en ili.”

Do la Doktoro malplenigis la poŝojn de sia veŝto. Ili aperigis du poŝhorloĝojn (unu funkciantan, unu nefunkciantan), mezurbendon, pecon de ŝufarista vakso, moneron en kiu estis truo, kaj kuracistan termometron.

“Kio estas tio?” demandis Gub-gubo, indikante la termometron. “Oni uzas ĝin por mezuri la temperaturon de homoj”, diris la Doktoro. “Ho, tio memorigas al mi —”

“Rakonton?” kriis Tu-Tuo.

“Mi antaŭvidis tion”, diris Jipo. “Tia objekto devas havi kunligitan rakonton. Kiel la rakonto nomiĝas, Doktoro?”

“Nu”, diris la Doktoro, komfortigante sin en sia seĝo. “Mi deziras nomi ĉi tiun rakonton ‘La striko de la invalidoj’.”

“Kio estas striko?” demandis Gub-Gubo.

“Kaj je la ĉielo, kio estas invalido?” kriis la Puŝumi-Tiruvio.


“Striko”, diris la Doktoro, “estas kiam homoj ĉesas fari sian propran laboron por devigi alian personon doni al ili tio kion ili volas. Kaj invalido — nu, invalido estas persono kiu ĉiam — e..., pli-malpli — estas malsana.”

“Sed kia laboro estas la laboro de invalidoj?” demandis la blanka muso.

“Ilia laboro estas — e..., resti malsanaj”, diris la Doktoro. “Ĉesu fari demandojn, alie mi neniam povos komenci la rakonton.”

“Atendu minuton”, diris Gub-Gubo. “Mia piedo ekdormis.”

“Ho, ne gravas viaj piedoj!” kriis Dab-Dabo. La Doktoro komencu sian rakonton.”



“Ĉu ĝi estas bona rakonto?” demandis Gub-Gubo.

“Nu”, diris la Doktoro “vi rakontos kaj poste vi povos decidi por vi mem. Ĉesu barakteti nun, kaj lasu min komenci. Ekmalfruas.”

Tuj kiam la Doktoro flamigis sian pipon kaj bone funkciigis ĝin, li komencis: “Antaŭ multaj jaroj, kiam mi aĉetis ĉi tiun termometron, mi estis tre juna kuracisto, plena de espero, nur komencanta labori. Mi opiniis min tre bona kuracisto, sed mi trovis ke la cetera mondo ne akordas pri tio. Kaj dum multaj monatoj post mia komenco mi trovis eĉ ne unu pacienton. Mi havis neniun pacienton per kiu provi mian novan termometron. Mi tre ofte provis ĝin per mi mem. Sed ĉiam mi estis tiom bonfarta ke mi neniam havis febron. Mi penis malvarmumiĝi. Komprenu ke mi ne vere volis malvarmumon, mi nur volis certi ke mia nova termometro ĝuste funkcias. Sed mi ne povis eĉ malvarmumiĝi. Mi estis tre trista — sana sed trista.

“Nu, proksimume je la sama tempo mi renkontis alian junan kuraciston kiu havis la saman problemon kiel mi — havis neniun pacienton. Diris li al mi: “Mi scias kion ni faru, ni establu sanatorion.”

“Kio estas sanatorio?” demandis Gub-Gubo.

“Sanatorio”, diris la Doktoro, “estas kvazaŭ miksaĵo de hospitalo kaj hotelo — kie loĝas invalidoj ... Do mi kaj mia juna amiko — nomita Fips, D-ro Kornelio K. Fips — luis tre belan ejon en la kamparo, kaj ni provizis al ĝi radseĝojn kaj varmakvajn botelojn kaj orelo-trumpetojn kaj ĉion amatan de invalidoj. Kaj tre baldaŭ pacientoj venis al ni centope, kaj nia sanatorio estis plenplena kaj mia nova termometro estis multe uzata. Kompreneble ni gajnis multan monon ĉar oni tre bone pagis nin. Kaj Fips estis tre feliĉa.

“Sed mi ne estis egale feliĉa. Mi rimarkis kuriozaĵon: neniun invalido ŝajnis resaniĝi kaj foriri. Kaj fine mi parolis pri tio al Fips.

“Mia kara Dolittle”, li respondis, “**foriri?** — kompreneble ne! Ni ne deziras ke ili foriru. Ni volas ke ili restu ĉi tie, por plu pagadi nin.”

“Fips”, mi diris, “mi kredas tion malhonesta. Mi kuracistiĝis por resanigi homojn — ne por dorloti ilin.”


“Nu pri tio ni intermalkonsentis kaj kverelis. Mi mute koleriĝis kaj diris al li ke mi ne plu estos lia partnero — ke mi pakos miajn valizojn kaj morgaŭ mi foriros. Dum mi foriris el lia ĉambro, ankoraŭ tre kolera, mi preterpasis invalidon en sia rulseĝo. Estis S-ro Timoteo Kvisbi, nia plej grava kaj multekosta paciento. Li petis min, dum mi pasis, provi lian temperaturon, ĉar li kredis esti febra. Nu, neniam mi povis trovi malsanon en S-ro Timoteo kaj mi decidintis ke esti invalido estas kvazaŭ hobio lia. Do, ĉar mi restis tre kolera, anstataŭ mezuri lian temperaturon, mi tre malĝentile diris: ‘Ho, iru inferen vi!’”

“S-ro Timoteo ekfuriozis. Kaj, alvokinte D-ron Fips, li postulis ke mi pardonpetu. Mi rifuzis. Sekve, S-ro Timoteo diris al Fips ke se mi ne pardonpetos, li komencos invalidan strikon. Fips ege maltrankviliĝis kaj petegis min pardonpeti al ĉi tiu tre speciala paciento. Mi ankoraŭ rifuzis.”

“Kaj ekkazis io tre kurioza. S-ro Timoteo, kiu ĉiam ŝajnis tro febla por marŝi, stariĝis el sia rulseĝo kaj, sovaĝe svingante sian orelotrubeton, trakuris la sanatorion, parolante al la aliaj invalidoj, dirante kiom hontinde li estis traktita kaj petante ilin striki por akiri siajn rajtojn.”

“Kaj jes ja ili strikis — ne dubu pri tio. Tiunokte je la vespermanĝo ili rifuzis sian medikamenton — kaj antaŭ kaj post la manĝo. D-ro Fips penis persvadi ilin, petis ilin, petegis ilin kondukti kiel decaj invalidoj kaj plenumi la ordonojn de la kuracisto. Sed ili rifuzis obei lin. Ili manĝis ĉion malpermesitan al ili, kaj post la vespermanĝo ĉiuj kiujn li ordonintis promeni restis ĉehejme, kaj tiuj ordonitaj ripozi eliris kaj kuradis laŭlonge de la strato. Ili finis la vesperon interbatalante per siaj malvarmakvaj boteloj, kiam ili devus jam esti en la lito. La sekvan matenon ili ĉiuj pakis la proprajn kofrojn kaj foriris. Kaj tiel finiĝis **nia** sanatorio.

Sed plej kurioza estis ĉi tio: mi poste trovis ke **ĉiu** el ti-



iaj pacientoj estis resaniĝintaj! Ekstaro el siaj rulseĝoj kaj strikado tiom kuracis ilin ke ili tute ĉesis esti invalidoj. Kiel sanatoria kuracisto, mi supozas ke mi ne estis sukcesa — tamen, mi iomete dubas. Certe mi resanigis multe pli da pacientoj per mia **foriro** de la sanatoria afero ol Fips sukcesis resanigi per sia partopreno en ĝi.”

La **sekvan** nokton, kiam ili denove sidis sur la verando post la manĝo, la Doktoro demandis: “Nu, kiu rakontos al ni ĉi-nokte? Gub-Gubo diris ke li havas rakonton por ni, ĉu ne?”

“Ho, ne lasu lin rakonti, Doktoro”, diris Jipo. “Nepre lia rakonto estus stultaĵo.”

“Li estas tro juna por diri bonan rakonton”, diris Dab-Dabo. “Li havas nenian sperton de la vivo.”

“Li nur interesiĝas pri manĝaĵoj, vere”, diris Tu-Tuo. “Iu alia rakontu.”

“Ne, atendu”, kriis la Doktoro. “Ne subpremu lin vi ĉiuj. Ĉiu el ni iam estis juna. Lasu lin rakonti. Eble li gajnos la premion. Kiu scias. “Parolu, Gub-Gubo. Diru al ni vian rakonton. Kiel ĝi nomiĝas?”

Gub-Gubo malkviete movetadis siajn piedojn, ruĝiĝis ĝis la oreloj, kaj fine diris:

“Ĝi estas iom frenezŝajna rakonto. Sed bona. Ĝi estas — e... — e... — Porkeca Ferakonto. Ĝi nomiĝas ‘La magia kukumo’.”

“Ĉu tiel!” grumbliis Jipo.

“Ankoraŭ manĝaĵoj” murmuris Tu-Tuo. “Mi ja antaŭdiris al vi!”

“He-he-he” ridis la blanka muso.

“Rakontu, Gub-Gubo. “Malatentu ilin. Mi aŭskultas.”

“Foje,” komencis Gub-Gubo, “malgranda porko eniris la arbaron kun sia patro por elfosi trufojn. La patro-porko estis tre lerta truf-elfosisto, kaj per nura flaro je la tero li sukcesis scii kie troviĝas trufoj. Nu, ĉi-tage ili trovis lokon sub kelkaj grandaj kverkoj kaj ili komencis fosi. Post kelka tempo, kiam la patro-porko estis elfosinta enorman trufon kaj dum ili ambaŭ manĝadis ĝin, ili aŭdis, mirige al ili, la sonojn de voĉoj venantaj el la truo el kiu ili fosis la trufon.

“La patro-porko forrapidis kun sia infano ĉar al li ne plaĉis magio. Sed tiunokte la beba porko, dum liaj gepatroj profunde dormis, rampis el sia loĝejo kaj foriris en la arbaron. Li volis koni la misteron de tiuj voĉoj venintaj el sub la tero.

“Do, atinginte la truon kie lia patro elfosintis la trufon, li mem ekfosis. Li ne longe fosis antaŭ ol la tero tute kaviĝis sub li kaj li sentis sin faladi kaj faladi kaj faladi. Fine li ĉesis fali, renversite sur la mezo de manĝotablo. La tablo estis tute preta por la manĝo — kaj li falintis en la supon. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis sidantajn ĉirkaŭ la tablo multajn viretojn, el kiuj neniuj estis pli ol duone tiom granda kiom li mem, kaj ĉiuj estis malhele verdaj.

“Kie mi estas?” demandis la beba porko.

“Vi estas en la supo”, diris la viretoj.


Unue la beba porko timegis. Sed kiam li vidis kiom malgrandaj estas la viroj ĉirkaŭ li, lia timo ĉesis. Kaj antaŭ ol grimpi el la supo sur la tablo li eltrinkis la supon. Post tio li demandis al la viroj: kiuj ili estas? Kaj ili diris:

“Ni estas **La Kuiristaj Koboldoj**. Ni loĝas subtere kaj ni pasigas duonon de nia tempo per inventado de novaj manĝaĵoj, kaj la alian duonon per ilia manĝado. La bruo kiun vi aŭdis veni el la truo estis nia kantado de niaj manĝohimnoj. Ni ĉiam kantas manĝohimnojn kiam ni pretigas vere bonegajn manĝaĵojn.”

“Bone!” diris la porko. “Mi venis al la ĝusta loko. Ni daŭrigu la manĝadon.”

“Sed tuj kiam ili estos komencontaj manĝi la fiŝojn (la supo jam estis tute manĝita) ekestis granda bruo ekster la manĝejo kaj enkuris alia aro da etuloj, brile ruĝkoloraj. Ili estis **La Venenfungaj Koboldoj**, delonge malamikoj de la Kuiristaj Koboldoj. Grandega batalo komenciĝis, unu grupo uzis dentopikilojn kiel lancojn kaj la alia grupo uzis nukserompilojn kiel batilojn. La porko subtenis siajn amikojn la Kuiristajn Koboldojn, kaj, ĉar li estis egale granda kiel du malamikoj kunaj, li baldaŭ forfuĝis la Venenfungajn Koboldojn.

“Post la fino de la batalo kaj la netigo de la manĝejo, la



Kuiristaj Koboldoj estis tre dankemaj al la beba porko pro lia valora helpo. Ili nomis lin venkinta heroo kaj, kroninte lin per krono el petroselo, ili invitis lin sidi sur la honorseĝo ĉe la manĝotablo kaj ili daŭrigis la manĝadon.

“Neniam antaŭe dum sia vivo la beba porko tiom ĝuis manĝon kion ĉi-foje. Li trovis ke la Kuiristaj Koboldoj ne nur inventis novajn kaj bongustegajn manĝaĵojn, sed ankaŭ elpensis multajn novajn tablo-meblaĵojn. Ekzemple, ili donis pikilkusenojn kun la fiŝaĵo. Ili estis por enpuŝi la fiŝostojn, anstataŭ lasi ilin plenigi la teleron. Pudingobloviĵoj estis alia novaĵo — bloviĵoj por malvarmetigi la pudingon, anstataŭ devi perbuŝe blovi sur ĝin. Ili ankaŭ havis ŝnurojn sur kiujn oni povas pendigi la kakao-*haŭtaĵojn*. (Vi scias kiom aĉe malnete estas kiam ĝi pendas sur la rando de via taso.) Kaj kiam oni havigis fruktojn, oni disdonis ankaŭ tenisrakedojn. Kaj se iu ĉe la alia finaĵo de la tablo petis de vi pomon, anstataŭ entrepreni la penan taskon transdonigi pezan bovlon da fruktoj, vi nur prenas pomon kaj batas ĝin al li simile kiel tenispilkon, kaj li kaptas ĝin ĉe la alia finaĵo de la tablo per pikilo de sia forko.

“Tiuĵ iloj aldonis multan gajecon al la manĝo kaj kelkaj el ili estis tre lertaj inventaĵoj. Ho, ili eĉ havis paroltubon por aferoj kiujn ne decas mencii ĉetable.”

“Paroltubon!” la blanka muso interrompis. “Kiel oni uzis tion? Mi ne komprenas.”

“Nu”, diris Gub-Gubo, “vi scias ke oni konstante admonas ‘Nenial diskutu tiaĵojn ĉetable!’ Nu, la Kuiristaj Koboldoj havis paroltubon en la muro kiu kondukis, ĉe sia alia finaĵo, al la ekstero. Kaj kiam oni volis paroli pri iu el la aferoj pri kiuj estis malpermesate paroli ĉetable, oni foriris de la tablo kaj diris ĝin en la paroltubon; poste oni reiris al sia sidloko. Ĝi estis grandioza inventaĵo. ... Nu, kiel mi diris, la beba porko ĝuegis la eventon enorme. Kaj post la fino de la manĝo li diris ke li devas reiri hejmen ĉar li volas reesti en sia loĝejo antaŭ ol liaj gepatroj estos vekaj.

“La Kuiristaj Koboldoj bedaŭris lian foriron. Kaj kiel adiaŭan donacon pro la helpo kiun li donis al ili kontraŭ iliaj malamikoj, ili donis al li la Magian Kukumon. Nu, tiu kukumo, se oni detranĉas eĉ ereton da ĝi kaj plantas ĝin, tuj kreskas kaj fariĝas tuta kampo da kiu ajn frukto aŭ legomo dezirata. Oni nur devis diri la nomon de la legomo dezirata. La beba porko dankis la Kuiristajn Koboldojn, adiaŭe kisis ilin ĉiujn, kaj hejmeniris.

“Li trovis siajn ĝepatrojn ankoraŭ dormantaj kiam li revenis. Do zorge kaŝinte sian Magian Kukumon sub la planko de la bovinostalo, li rampis en la loĝejon kaj profunde endormiĝis.

“Nu, okazis ke kelkajn tagojn poste najbara reĝo ekmilitis kontraŭ la reĝon kiu posedas la landon kie la porka familio loĝas. La milito tre malfavoris la reĝon de la porkoj, kaj, vidinte ke la malamikoj estas tre proksimaj, li ordonis ke ĉiuj brutoj kaj kultivejaj bestoj kaj homoj estu venigitaj interne de la kastelmuroj. La porka familio ankaŭ estis pelita en la kastelan terenon. Sed ankaŭ ol foriri, la beba porko mordis peceton de sia Magia Kukumo kaj kunprenis ĝin.


“Nelonge post tio, la malamika armeo ekcirkaŭis la kastelon, kaj penis superforti ĝin. Dum multaj semajnoj ili restis tie, sciante ke post pli-malpli nelonga tempo al la reĝo kaj la homoj en la kastelo mankos manĝaĵoj kaj ke ili do devos cedi.

“Nu, hazarde la reĝino estis rimarkinta la beban porkon en la kastelloko, kaj, ĉar si estis irlanda princino, si multe ekŝatis lin kaj ligigis verdan rubandon ĉirkaŭ lian kolon kaj ege dorlotis lin, multe malplaĉante sian edzon, la reĝon.

“Nu, la kvaran semajnon post la alveno de la malamikoj, la tuta manĝaĵaro en la kastelo estis elĉerpita kaj la reĝo ordonis manĝi la porkojn. La reĝino laŭte protestis kaj petegis ne inkluzivi ŝian dorlotan porkon. Sed la reĝo firme malakceptis:

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Miaj soldatoj bezonegas manĝi,” diris li. “Via dorlotato, Sinjorino, devas fariĝi kolbasoj.”



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“La beba porko komprenis ke nun necesas uzi la magian donacon de la koboldoj. Do, kurinte en la ĝardenon de la kastelo, li fosis truon kaj plantis sian pecon de kukubo ĝuste en la centro de la plej bona rozbedo de la reĝo.

“Pastikanoj!” li gruntis, plenigante la truon. Hektaroj da ili kresku!”

“Kaj ja, efektive, apenaŭ li diris la vortojn, pastikanoj komencis kreski sur la tuta reĝa ĝardeno, dense kaj rapide. Eĉ laрузaj vojetoj kovriĝis per ili.

“Tiel la reĝo kaj lia armeo havis multan manĝaĵon, kaj fortiĝinte per la nutraj pastikanoj, ili eliris el la kastelo, batis la malamikojn tutkorpe, kaj forpelis ilin.

“Kaj la reĝino estis permesite plu teni sian dorlotan porkon, kio multe ĝojigis ŝian am-eman koron — ja ŝi estis irlanda reĝidino. Kaj li fariĝis granda heroo ĉe la kortego kaj oni donis al li porkejon ornamitan per juveloj en la centro de la ĝardeno de la kastelo — precize sur la loko kie li estis plantinta la Magian Kukumon. Kaj ili ĉiuj feliĉe vivis la ceteron de sia vivo. Kaj jen la fino de la Porka Ferakonto.”

La bestoj nun komencis fervore anticipi la vesperan rakontadon — kiel okazas, kiam oni ĝuas regulan eventon. Kaj por la sekva nokto ili antaŭaranĝis inter si ke estas la vico de Dab-Dabo rakonti.

Kiam ĉiuj jam sidiĝis sur la verando, la mastrumistino glatigis siajn plumojn kaj per tre digna voĉo komencis:

“Proksime de Puddleby-sur-la-Marĉo loĝas kultivisto kiu eĉ ankoraŭ nun insistas ke lia kato komprenas ĉiun vorton kiun li diras. Tio estas nevera, sed kaj la kultivisto kaj lia edzino kredas ĝin. Kaj nun mi rakontos al vi pri kiel ilin trafis tiu kredo.

“Foje dum la Doktoro forestis en Skotlando, serĉante fosiliojn, li lasis min prizorgi la domon. La maljuna ĉevalo en la stalo plendis al mi unu nokton ke la ratoj elmanĝas lian tutan tritikaron. Dum mi ĉirkaŭmarŝadis en la ĉevalejo, penante elpensi kion fari pri la problemo, mi rimarkis enorman blankan persan katon kaŝe traserĉi la lokon. Nu, mi mem neniom amas katojn. Unue, ili manĝas anasidojn, kaj due, ili ŝajnas al mi ĉiam iom kaŝiraj uloj. Do mi ordonis al tiu kato foriri de la parcelo de la Doktoro. Surprize al mi, ŝi tre ĝentile kondutis — diris ke ŝi ne sciis ke ŝi entrudas sin, kaj turnis sin por foriri. Pro tio mi eksentis ian kulpon, ĉar mi sciis kiom la Doktoro volas esti gastama al ĉia besto, kaj ja efektive la kato neniel miskondukas tie. Do mi kuris atingi ŝin kaj diris al ŝi ke se ŝi nenion mortigos en la loko, do ŝi rajtas promenadi tie laŭdezire.

“Nu, ni komencis babiladi, kiel oni ofte faras, kaj mi sciigis ke la kato loĝas ĉe la domo de kultivisto kvarcent metrojn for ĉe la vojo Oxenthorpe. Post tio mi akompanis ŝin dum parto de la retiro al ŝia hejmo, ankoraŭ babilante, kaj mi trovis ŝin efektive tre agrabla individuo. Mi parolis al ŝi pri la ratoj en la ĉevalejo kaj kiom malfacilas devigi ilin bone konduti, ĉar la Doktoro plene malpermesas mortigi ilin. Kaj ŝi diris ke, se mi volas, ŝi dormos en la ĉevalejo dum kelkaj noktoj kaj verŝajne la ratoj foriros flarinte ŝin.

“Tion ŝi faris, kaj la rezultoj estis bonegaj. La ratoj grupe foriris kaj la tritikujo de la maljuna ĉevalo ne plu estis mistraktata. Post tio ŝi malaperis kaj dum pluraj noktoj mi tute ne vidis ŝin. Do unu vesperon mi ekpensis ke decus ke mi iru al ŝia kultivejo ĉe la vojo Oxenthorpe por danki ŝin.

“Mi iris al ŝia kultivejo kaj trovis ŝin en la kampo. Mi dankis ŝin pro ŝia helpo kaj demandis kial ŝi lastatempe ne vizitis min.

“‘Mi ĵus naskis ses katidojn,’ ŝi diris. ‘Ses — kaj mi ne povis forlasi ilin eĉ momente. Ili estas en la salono de la kultivisto nun. Venu kaj mi montros ilin al vi.’

“Do ni eniris. Kaj sur la planko de la salono, en ronda korbo, estis ses plej belaj katidoj iam ajn viditaj. Dum ni rigardis ilin ni aŭdis la kultiviston kaj lian edzinon descendi al tiu etaĝo. Do, supozante ke eble ili ne volos ke anaso estu en la salono (kelkaj homoj estas ege orgojlaj kaj riproĉemaj — malsimile al la Doktoro), mi kaŝis min malantaŭ pordo de ŝranko ĝuste kiam la kultivisto kaj lia edzino venis en la ĉambron.

“Ili klinis sin super la korbo da katidoj, karesis la blankan katon, kaj komencis paroli. Nu, kompreneble la kato ne komprenis kion ili diris. Sed mi, estinte tiom kun la Doktoro kaj diskutinte kun li la diferencojn inter la anasa kaj la homa gramatikoj, komprenis ĉiun vorton kiun ili diris.

“Kaj tion mi aŭdis la kultiviston diri al sia edzino: ‘Ni konservos la nigra-blankan katidon, Lizo. Mi dronigos la aliajn je la kvina horo morgaŭ matene. Ne eblas toleri tiom da katoj diskuradi ĉi tie.’ Lia uzo de gramatiko estis aĉa.

“Tuj post ilia foriro mi venis el la ŝranko kaj mi diris al la blanka kato: ‘Mi volas ke vi eduku tiujn katidojn ne ĝeni anasidojn. Nun aŭskultu: Hodiaŭ nokte, kiam la kultivisto kaj lia

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

edzino jam estos en la lito, forprenu ĉiujn viajn katidojn *escepte de la nigra-blanka*, kaj kaŝu ilin en la subtegmento. La kultivisto planas dronigi ilin kaj konservi nur tiun el ili.'



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“La kato obeis min. Kaj la sekvan matenon, kiam la kultivisto venis forpreni la katidojn, li trovis nur la nigra-blankan — tiun, kiun li planis konservi. Li ne povis kompreni la aferon. Tamen, kelkajn semajnojn poste, dum la edzino de la kultivisto purigadis la domon, ŝi ektrovis la aliajn en la subtegmento, kie la patrino kato estis sekrete kaŝinta kaj suĉiginta ilin. Sed nun ili jam estis sufiĉe kreskintaj por eskapi tra la fenestro kaj ili foriris serĉi novajn hejmojn por si.

“Kaj tial ankoraŭ nun la kultivisto kaj lia edzino insistas ke ilia kato komprenas la anglan lingvon, ĉar, laŭ ili, nepre ŝi aŭdis ilin paroladi super la korbo. Kaj ĉiam kiam ŝi estas en la ĉambro dum ili klaĉas pri la najbaroj, ili ĉiam parolas flustre, por ke ŝi ne aŭdu. Sed, sekrete mi diras al vi, efektive ŝi ne komprenas eĉ unu vorton diratan de ili.”

“**Kies vico** estas, rakonti al ni nun?” demandis la Doktoro, kiam la manĝilaro estis forigita la sekvan vesperon.

“Mi opinias ke la blanka muso devus rakonti al ni,” diris Jipo.

“Bone,” diris la blanka muso. “Mi rakontos al vi pri mia junaĝo. La doktoro konas ĉi tiun historion, sed vi ceteraj neniam aŭdis ĝin.”

Netiginte siajn blankajn vizaĝharojn, kaj vindinte sian palruĝan voston komforte ĉirkaŭ sian malgrandan glatan korpon, li dufoje palpebrumis kaj komencis:

“Kiam mi naskiĝis mi estis unu el sep ĝemeloj. Sed ĉiuj miaj gefratoj havis ordinaran musan koloron kaj nur mi en mia tuta familio estis blanka. Mia koloro multe maltrankviligis mian patrinon kaj mian patron. Ili diris ke mi estas tiom tuj rimarkebla ke mi nepre estos kaptita, tuj kiam mi eliros el la nesto, kaptita de la unua strigo aŭ kato proksima.

“Ni estis urbanoj, mia familio — kaj fieris pri tio. Ni loĝis sub la planko de butikoj de muelistoj. Kontraŭ ni, trans la strato, estis butikoj de buĉistoj, kaj apud ni estis butikoj de kolorigistoj — kie oni diverse kolorigas ŝtofon antaŭ ol ĝi iras al tajloroj por fariĝi vestoj.

“Nu, kiam ni la infanoj sufiĉe kreskis por povi sendepende vivi, niaj gepatroj zorge instruis nin pri kiel eskapi de katoj kaj musteloj kaj hundoj. Sed ili senesperis pri kompatinda mi. Ili vere kredis ke malverŝajne mi povos havi pacan vivon, pro mia blanka hararo kiun oni povas vidi de kilometroj for.

“Nu, ili plene pravis. Mia koloro endanĝerigis min jam en la unua semajno kiam mi eliris por memstare vivi — sed ne kiel ili anticipis. La filo de la muelisto kiu posedis la butikon kie ni loĝis trovis min unu matenon en avenujo.

“‘A ha!’ li kriis. ‘Blanka muso! Ĝuste tio, kion mi volis!’

“Kaj li kaptis min per fiskapta reto kaj metis min en kaĝon, por teni min kiel drolotbeston.

“Mi estis tre malfeliĉa, unue. Sed post iom da tempo mi pli-malpli kutimiĝis al tia vivo. La knabo — li estis nur okjara — tre afable traktis min kaj manĝigis min regule ĉiutage. Mi preskaŭ amis la komikecan platnazan junuleton, kaj mi fariĝis tiom malsovaĝa ke kelkafoje li lasis min eliri el mia kaĝo kaj mi kuradis supren kaj malsupren laŭ lia maniko. Sed neniam mi havis oportunon eskapi.

“Post kelkaj monatoj mi komencis enuiĝi pro tiu sencela vivo mia. Kaj, krome, la sovaĝaj musoj estis tre malafablaj al mi. Dum la nokto ili regule venis kaj indikis min malantaŭ la dratoj de mia kaĝo, dirante:

“‘Rigardu la malsovaĝan blankan muson! Ti-hi-hi! Ludilo por infanoj. Bona musetĉjo! Venu laviĝi vian vizaĝĉjon!’ La stultaj idiotoj!

“Nu, fine mi ekentreprenis, kaj elpensis planon por eskapi. Mi ronĝis truon en la ligna planko de mia kaĝo kaj tenis ĝin kovrita per pajlo, tiel ke la knabo ne povis vidi ĝin. Kaj unu nokton kiam mi aŭdis lin sendanĝere ronkadi — li ĉiam tenis mian kaĝon malantaŭ sia lito — mi kaŝiris el la truo kaj sukcesis foriri.

“Mi spertis multajn aventurojn kun katoj. Estis vintre kaj la neĝo kuŝis dika sur la tero. Mi ekiris esplori la mondon, ĝoja pro mia liberiĝo. Irinte malantaŭ la domon, mi iris el la korto de la muelisto en la najbaran korton de la kolorigisto. En la korto estis koloriga ŝedo kaj mi rimarkis du strigojn sur ĝia supro, per la lunlumo.

“Enirinte la ŝedon mi renkontis raton, maljunegan kaj tre maldikan. Diris li al mi:

“‘Mi estas la plej maljuna rato en la vilaĝo kaj mi scias multon. Sed, diru al mi, kial vi venis ĉi tien en la kolorigejon?’

“‘Mi serĉis manĝaĵon,’ mi diris.

“La maljuna rato ridis per skuetiĝanta rido, en kiu tute mankis ĝojo.



“Nenia manĝaĵo ĉi tie,” li diris, ‘nur kolorigiloj diverskoloraj.’ Li indikis la grandajn kolorig-kaldronojn, vice starantajn, turantajn en la duonmallumo super niaj kapoj.

“Ĉia manĝaĵo kiu ja estis ĉi tie mi jam manĝis,” li malĝoje daŭrigis, ‘kaj mi ne aŭdacas eliri por serĉi pli, ĉar la strigoj atendas sur la tegmento. Ili vidus mian malhelan koloron kontraŭ la neĝo, kaj mi neniel povus eskapi. Mi preskaŭ mortas pro malsatego.’ Kaj li ŝanceliĝis senforte sur siaj maljunaj piedoj. ‘Sed nun vi venis, kaj estas alie. Iu bonvola feino sendube sendis vin al mi. Mi sidas ĉi tie jam de multaj tagoj kaj noktoj, esperante ke blanka muso venos. Pro via blanka felo, komprenu, la strigoj ne povos vidi vin bone kontraŭ la neĝo. Oni nomas tion *protekta koloriĝo*. Mi scias ĉion pri naturostudoj — ar mi estas tiom maljuna. Tiel vi sukcesis eniri ĉi tien sen esti kaptita. Eliru nun, mi petegas, kaj portu al mi la unuan manĝaĵon ian ajn kiun vi trovos. La strigoj nokte kaj la katoj tage enkarcerigas min ĉi tie tute sen manĝaĵoj ekde la veno de la neĝo. Vi venis nur ĝustatempe por savi min de pereco.’

“Do mi eliris trans la lunlumigatan neĝon, kaj la netrevidpovaj strigoj sur la tegmento de la kolorigo-ŝedo tute ne rimarkis min. Kontraŭ la blanko mi estis preskaŭ nevidebla. Mi estis tre fiera. Fine mia blanka pelo utilas.

“Mi trovis rubujon kaj, elpreninte kelkajn lardorandaĵojn, mi portis ilin al la malsatega rato. La maljunulo estis ege dankema. Li manĝis kaj plu manĝis — je miaj lipharoj, kiom li manĝis! Fine li diris:

“Ha! Nun mi pli bone fartas.”

“Sciu,’ diris mi, ‘mi nur ĵus eskapis el kaptiteco. Min tenis knabo kiel dorlotbeston. Ĝis nun, esti blanka estis nur grandega ĝeno por mi. La katoj povas vidi min tiom ke la vivo ne havas valoron.”

“Nu, do, mi diru al vi kion ni faru,’ diris li, ‘vi ekloĝu en ĉi tiu kolorigo-ŝedo kun mi. Ĝi estas nemalbona loko — sufiĉe varma kaj komforta sub la plankoj, kaj la fundamentoj estas vere plenaj de truoj kaj koridoroj kaj kaŝejoj. Kaj dum restos la neĝo vi povos eliri kaj akiri manĝaĵojn por ni ambaŭ — ĉar estas malfacile vidi vin kontraŭ la neĝo. Kaj kiam la vintro estos finiĝinta kaj la tero denove estos nigra, *mi* serĉos manĝaĵojn ekstere kaj *vi* restos en-hejme. Komprenu, ankaŭ alial ĉi tiu estas bona loĝejo — ĉi tie estas nenio kiun ratoj kaj musoj povus detrui, do ili onin ne ĝenas. Aliloke — en domoj kaj manĝaĵbutikoj kaj muelejoj — oni konstante pretigas kaptilojn kaj sendas mustelojn por kapti nin. Sed al neniuj ĝenas ke ratoj loĝas en kolorigoŝedo, sciu. Malsaĝaj junaj ratoj kaj musoj decidas loĝi en loko kie estas multaj manĝaĵoj. Sed mi, ne! Mi estas saĝa, tia mi estas.’

“Nu, ni interkonsentis pri tiu aranĝo, kaj plenan jaron mi loĝis ĉe la kolorigistejo kun la maljuna saĝa rato. Kaj ni altkvalite vivis — pri tio ne dubu! Tute neniuj personoj ĝenis nin. Dum la vintraj tagoj mi serĉadis manĝaĵojn kaj kiam venis la somero mia maljuna partnero, kiu sciis kie akiri la plej plaĉajn manĝaĵojn en la tuta vilaĝo, tenis nian manĝaĵprovizon plena de la plej bongustaj frandaĵoj. Ha, multajn gajajn manĝojn mi spertis sub la planko de la kolorigo-ŝedo kun tiu maljuna veterano, flustre ridetante dum ni aŭdis la kolorigistojn en la supra etaĝo miksi la koloraĵojn en la grandegaj kaldronoj kaj diskuti la novaĵojn de la vilaĝo!

“Sed neniuj el ni kapablas esti kontenta longe, sciu — ni ja estas malsaĝuloj. Kaj kiam la dua somero proksimiĝis, mi sopiregis esti libera muso, por traveturi la mondon, kc. Kaj krome, mi volis edziĝi. Eble la printempo komencis penetri mian sangon. Do unu nokton mi diris al la maljuna rato:

“Rato,” mi diris, ‘mi estas amanto. Dum la tuta vintro, ĉiunokte kiam mi eliris por kolekti manĝaĵojn, mi amindumadis musinon — el bona klaso ŝi estas, kun eleganta konduto. Mi pripensas elekti loĝejon kaj havi propran familion. Nu, jen reproksimiĝas la somero kaj mi

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

devos resti en ĉi tiu mizera ŝedo pro mia koloraĉo.’

“La maljuna rato rigardis min penseme dum momento kaj mi sciis ke li diros ion nekuti-me saĝan.

“‘Junulo,’ diras li finfine, “se vi deziras foriri, mi supozas ke mi ne povas haltigi vin — kvankam mi opinias vin malsaĝa juna bubo. Kaj kiel mi povos sola prizorgi min post via foriro, nur Dio scias. Sed, ĉar vi estis tiom utila al mi dum la jama jaro kaj eĉ pli, mi helpos vin.’

“Dirinte tion, li kondukas min al la supra etaĝo kie staras la kolorigo-kaldronoj. Estis krepuske kaj la viroj jam estis hejmenirintaj. Sed ni povis vidi la neklarajn formojn de la grandaj kaldronoj super niaj kapoj. Post tio li prenas ŝnuron kiu kuŝis sur la planko kaj, grimpite la centran kaldronon, li pendigas la ŝnuron en ĝi.

“‘Por kio estas tio?’ mi demandis.

“‘Por ke vi povu elgrimpi per ĝi, post via baniĝo. Se vi elirus dum la somero kun felo kia la via, nepre vi mortus. Do mi kolorigos vin nigra.’

“‘Je saltanta fromaĝo!’ mi kriis. *‘Kolorigos min nigra!’*


“‘Ĝuste,’ diras li. ‘Estas tre simple. Grimpu tiun centran kaldronon nun — sur ĝian randon — kaj enplonĝu. Ne timu. Vi povos uzi la ŝnuron por elgrimpi.’

“Nu, laŭnature mi ĉiam estis aventurema. Kaj kuraĝiginte min, mi grimpis la kaldronon, sur ĝian randon. Estis tre mallume kaj mi apenaŭ povis vidi la kolorigaĵon, malhelan kaj mal-facile videblan, en la alta interno.

“‘Ne hezitu,’ diris la maljuna rato. ‘Ne timu — kaj ne forgesu trempi ankaŭ vian kapon kaj vian tutan korpon.’

“Nu, mi bezonos egan kuraĝon por plonĝi. Kaj se mi ne estus amanto, verŝajne mi ne plonĝus. Sed mi plonĝis — mi plonĝis rekte en la kolorigaĵon.

“Mi pensis ke mi neniam revenos supren, kaj eĉ kiam mi reestis supre mi preskaŭ dro-nis antaŭ trovi la ŝnuron en la mallumo kaj grimpis, anhelante pro spiromanko, el la kaldrono.



“Bonege!” diras la maljuna rato. ‘Nun ĉirkaŭkuru kelkafoje en la ŝedo, por ke vi ne malvarmiĝu. Kaj post tio enlitiĝu kaj kovru vin. En la mateno kiam estos lume, vi trovos vin tre diferenca.’

“Nu — larmoj plenigas miajn okulojn kiam mi pensas pri ĝi — la sekvan tagon, kiam mi vekigis, anticipante trovi min dece bele nigra, mi trovis anstataŭe ke mi estis koloriginta min hele puce *blua*! Tiu stulta maljuna rato eraris pri la kaldronoj!”

La blanka muso paŭzis dum momento en sia rakonto, kvazaŭ superemociita. Baldaŭ li daŭrigis:

“Neniam mi tiom furiozis kontraŭ iu en mia tuta vivo kiom kontraŭ tiu maljuna rato.

“Rigardu! *Vidu* kion vi faris al mi, nun!” mi kriis. ‘Mi eĉ ne estas marblua. Vi hidigis min!’

“Mi tute ne komprenas.’ li murmuris. ‘La centra kaldrono *antaŭe* estis la nigra, tion mi scias. Ne pre oni interŝanĝis ilin. La blua ĉiam estis la maldekstra.’

“Vi estas stulta maljuna fuŝulo,’ mi diris. Kaj kolerege mi foriris el la ŝedo kaj neniam reiris tien.

“Nu, eble mi estis atentonveka antaŭe, nun mi estis centoble tia. Kontraŭ la nigra tero, aŭ la verda herbaro, aŭ la blanka neĝo, aŭ brunaj plankoj, mia akra ĉielblua felo videbls tiom klare kiel pikstango. Tuj kiam mi estis ekster la ŝedo kato saltis kontraŭ min. Mi sukcesis eviti ŝin kaj eniris la straton. Tie kelkaj bubaĉoj rimarkis min, kaj vokis al siaj amikoj ke ili vidis bluan muson, kaj ili ĉasis min laŭlonge de la defluilo. Ĉe la stratanguloj du hundoj estis interbatalantaj. Ili ĉasis batali kaj ekĉasis min. Kaj baldaŭege la tuta damnita vilaĝo sekvis min. Estis aĉege. Mi tute ne povis esti trankvila ĝis post la noktiĝo, kaj tiam mi estis tiom elĉerpita pro kurado ke mi estis preta kolapsi.

“Ĉirkaŭ la noktomezo mi renkontis la musinon kiun mi amis, ĉe lampofosto. Kaj, ĉu vi povas kredi? Ŝi rifuzis paroli kun mi! Plene ignoris min.

“Por vi mi eniris ĉi tiun aĉan staton,’ mi diris, dum ŝi orgojle preteriris min kun la nazo alta. ‘Vi estas maldankema virino, tia vi estas.’

“Ho, la, la, la!” diris ŝi ridetaĉe. ‘Ĉu vi supozas ke memrespekta persono amindumus kun *blua* muso, ĉu?’

“Poste, dum mi penis trovi dormolokon, ĉiuj musoj kiujn mi renkontis, kie estis eĉ iometo da lumo, mokis min kaj indikis min kaj fikriis al mi. Mi preskaŭ ploris. Post tio mi iris al la rivero, esperante forlavi la kolorigaĵon kaj tiel reblankiĝi. Almenaŭ tia mi estus pli respektinda ol nun. Sed mi lavis min kaj naĝis kaj perakve kovris min, tute senrezulte. La akvo neniom helpis min.

“Do tie mi sidis, frostotremante sur la riverbordo, plene senespere. Kaj baldaŭ mi vidis ke la orienta ĉielo paliĝas, kaj mi sciis ke venas la mateno. Taglumo! Por mi tio signifis pli da ĉasiĝo kaj kurado kaj mokado, tuj kiam la suno montros mian ridindan koloron.

“Kaj tiam mi faris tre malĝojan decidon — verŝajne la plej malĝoja decido kiun iam faris libera muso. Anstataŭ ĉasiĝi kaj plu mokiĝi, mi decidis ke mi preferas denove esti en kaĝo, dorlotmuso! Jes, tie almenaŭ bone traktis min kaj bone manĝigis min la platnaza filo de la muelisto. Mi reiros kaj iĝos kaptita muso. Ĉu ne forpuŝas min mia amatino kaj mokas miaj amikoj? Nu, bone, do, mi forlasos la mondon kaj rekaptiĝos. Kaj tiam bedaŭros mia amatino — tro malfrue!

“Do, lace leviĝinte, mi komencis promeni al la butikoj de la muelisto. Ĉe la pordo mi paŭzis momente. Mi estas faronta ion aĉan. Mi mizere rigardis laŭ la strato, pensante pri la malfacileco de la vivo kaj la malĝojoj de la amiko, kaj jen, venanta miadirekte, kun bandaĝo ĉirkaŭ la vosto, estis mia propra frato!

“Dum li sidigis sin apud mi ĉe la pordo mi ekploris kaj rakontis al li pri ĉio okazinta al mi ekde kiam mi forlasis la hejmon de niaj gepatroj.

“‘Min malĝojigas via misfortuno,’ diris li, kiam mi finis. ‘Sed mi ĝojas ĉar mi renkontis vin antaŭ ol vi reenkapiteciĝos. Ĉar mi kreas ke mi povas gvidi vin al metodo ĉesigi vian problemon.’

“‘Kia metodo?’ mi diris. ‘Por mi la vivo ne plu valoras.’

“‘Iru konsulti la Doktoron,’ diris mia frato.

“‘Kiun doktoron?’

“‘Ekzistas nur *unu* doktoro,’ li respondis. ‘Ĉu vi volas diri ke vi neniam *aŭdis* pri li?’


“Kaj li informis min pri Doktoro Dolittle. Tiutempe la Doktoro unue komencis famiĝi inter la bestoj. Sed mi, loĝanta kun nur la maljuna rato en la ŝedo de la kolorigisto, ne sciis pri la novaĵoj.

“‘Mi ĵus venis de la oficejo de la Doktoro,’ diris mia frato. ‘Mia vosto implikiĝis en kapt-ilo kaj li bandaĝis ĝin por mi. Li estas mirindulo — afabla kaj honesta. Kaj li parolas la lingvon de la bestoj. Iru al li kaj mi certas ke li scios metodon forigi bluan kolorigaĵon forde muso. Li scias ĉion.’

“Do tial mi unue venis al la domo de Johano Dolittle en Puddleby. La Doktoro, post kiam mi rakontis al li mian historion, prenis tre etan tondilon kaj detondis mian tutan felon, tiel ke mi estis kalva kaj ruĝeta kiel porko. Post tio li frotis min per ia speciala haroredonaĵo por musoj — patentita invento de li mem. Kaj tre baldaŭ mi kreskigis tute novan felon, blankan kiel la neĝo.

“Kaj poste, aŭdinte kiom malfacile por mi estis eskapi de katoj, la Doktoro donis al mi hejmon en sia propra domo — en sia propra piano, efektive. Kaj neniuj musoj povus voli pli ol tion. Li eĉ proponis venigis la musinon kiun mi amis, kiu, sendube, alie opinius pri mi, nun kiam mi denove estas blanka. Sed mi diris:

“‘Ne, Doktoro. Lasu ŝin. Por ĉiam mi detenos min de inoj.’”



La sekvan nokton Jipo estis petita rakonti. Kaj post momento da pripensado li diris: “Bone, mi rakontos al vi pri ‘La Hundo de la Almozpetanto.’” Kaj la bestoj ĉiuj komfortigis sin por atente aŭskulti, ĉar Jipo ofte rakontis al ili antaŭe kaj al ili plaĉis lia rakontometodo.

“Antaŭ longe,” Jipo komencis, “mi konis hundon kiu estis la hundo de almozpetanto. Ni hazarde renkontiĝis unu tagon, kiam ĉaro de buĉisto akcidentis kaj renversiĝis. La knabo de la buĉisto, kiu pelis la ĉaron, estis stulta knabo kiun elkore malamis ĉiuj hundoj de la vilaĝo. Do kiam lia ĉaro trafis lampofoston kaj renversiĝis, disflugigante ŝafidajn kotletojn kaj pecojn tra la tuta strato, ni hundoj rapidis al tiu loko kaj forkuris kun lia viando antaŭ ol li havis sufiĉan tempon por levi sin el la defluilo.

“Tiuokaze, kiel mi jam diris, mi ekamikiĝis kun la hundo de la almozpetanto. Mi trovis lin kureganta laŭ la strato apud mi, kun bonega steko gaje skuiĝanta ĉe liaj oreloj. Mi mem estis preninta vicon da kolbasoj kaj la aĉaĵoj konstante implikiĝis kun miaj kruroj — ĝis li venis helpi min kaj montri al mi kiel nete volvi ilin tiel ke mi povis kuri tenante ilin sen stumbli.

“Post tio la hundo de la almozpetanto kaj mi intime amikiĝis. Mi informiĝis ke lia mastro havas nur unu kruron kaj estas ege ege maljuna.

“‘Li estas ege malriĉa,’ diris mia amiko. ‘Kaj li tro maljunas por labori, komprenu — eĉ se li havus du krurojn per kiuj li povus marŝi. Kaj nun li entreprenas paviman arton. Vi scias kio tio estas — oni desegnas bildojn sur la pavimo per koloraj kretoj kaj oni skribas sub ili ‘*Mi mem desegnis ĉiujn.*’” Post tio oni sidas apud ili kaj tenante ĉapon en la mano, atendas ke oni donu al vi monerojn.’

“‘Ho jes,’ mi diris, ‘mi scias. Mi jam vidis pavimartistojn.’

“‘Nu,’ diris mia amiko, ‘mia almozpetanto ne ricevas monerojn. Kaj mi scias la kialon: liaj bildoj ne estas sufiĉe bonaj — eĉ ne kiel pavimartaĵoj. Mi mem ne pretendas scii multon pri desegnado. Sed liaj bildoj estas vere aĉaj — *tute fuŝaj*. Afabla maljunulino antaŭ kelkaj tagoj haltis ĉe nia mopntrejo — volante kuraĝigi lin, komprenu — kaj indikante bildon, ŝi diris, “*Ho, kiom bela arbo!*” La bildo estis intencita reprezenti lumturon en la mezo de la oceano dum ŝtormas ĉirkaŭe. Jen kia artisto estas mia mastro. Mi ne scias kion fari pri li.’

“‘Nu, jen,’ mi diris, “mi havas ideon. Ĉar via mastro ne povas mem labori, kial vi kaj mi ne entreprenu ludonadi ostojn?”

“‘Ki, je la ĉielo, estas tio?’

“‘Nu,’ mi diris, ‘oni ludonas biciklojn kaj pianojn, ĉu ne? Do kial vi kaj mi ne luigu ostojn kiujn la hundoj povos maĉadi? Kompreneble ili ne povos pagi nin per mono, do ni petos ke ili venigu al ni aĵojn, anstataŭe. La almozpetanto povos vendi ilin kaj tiel akiri monon.’

“‘Jen bona propono,’ diris li. ‘Ni komencu jam morgaŭ.’

“Do la sekvan tagon ni trovis malplenan spacon, kie oni kutimis lasi rubaĵon, kaj fosis enorman truon, kiu estos nia ostobutiko. Post tio ni iris al la malantaŭaj pordoj de ĉiuj domoj de la riĉuloj frumatene kaj elektis la plej bonajn ostojn el la rubaĵujoj. Ni ek forkaptis kelkajn de aliaj hundoj ligitaj al hundetoj kiuj ne povis postĉasi nin — iom malhoneste, estas vere, sed nia celo estis bona do nemulte tio maltrankviligis nin. Ni portis ĉiujn ostojn kaj metis ilin el la truon kiun ni estis fosintaj. Dumnokte ni lasis ilin kovritaj per tero, ĉar ni ne volis ke ili ŝteliĝu — kaj, krome, kelkaj hundoj preferas ostojn kiuj estis enterigitaj kelkajn tagojn antaŭ ol ili maĉas ilin. Kaj dumtage ni staris ĉe niaj varoj, vokante al ĉiuj preterirantaj hundoj:

“‘Ostoj lueblaj! Bovostoj, ŝinkostoj, ŝafostoj, kokostoj! Ĉiuj sukoplenaj! Venu, gesinjoroj, kaj elektu. **Ostoj** lueblaj!’

LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Nu, jam de la komenco la komercado estis viglega. Ĉiuj hundoj eĉ kilometrojn for aŭdis pri ni kaj venis lui ostojn. Kaj



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

ili devis pagi laŭ kiom da tempo ili volas lui ilin. Ekzemple, eblis lui bonan ŝinkoston por unu tago kontraŭ kandelingo aŭ harbroso. Kaj se iu volis la oston por tuta semajnoj, tiu devis porti al ni page plenan vestokompleton.

“Nu, dum kelka tempo nia plano bonege sukcesis. La almozetanto vendis la aĵojn kiujn la hundoj pagis al ni kaj li ricevis monon per kiu vivi.

“Sed ni neniam demandis al ni elkie la hundoj akiras ĉion kion ili portis al ni. Efektive, ni ne multe interesiĝis pri tio. Nu, je la fino de nia unua semajno da vigla komercado ni rimarkis multajn personojn trairi la stratojn kvazaŭ serĉante ion. Kaj baldaŭ tiuj personoj, vidinte nia butikon en la malplena spaco grupiĝis ĉirkaŭ ni, interdiskutante. Kaj dum ili paroladis, trovhundo venis al mi portante en sia buŝo oran horloĝon kun ĉeno, kiujn li volis interŝanĝi por ŝinkosto.

“Nu, se nur vi povus vidi la ekscitiĝon inter la rigardantoj, tiam! La posedanto de la horloĝo kaj ĉeno ĉeestis kaj li laŭte protestadis. Kaj montriĝis ke tiuj hundoj prenadis aĵojn el la hejmoj de siaj mastroj por lui ostojn per ili. La popolon tio multege ĉagrenis. Ili fermis nian ostobutikon kaj tiel senlaborigis nin. Sed ili neniam sciigis ke la mono kiun ni akiris estis por la almozetanto.

“Kompreneble ni ne estis akirintaj sufiĉe da mono por komfortigi lian vivon longe, kaj tre baldaŭ li devis denove esti pavimartisto kaj estis egale mizera kiel antaŭe — kaj la bildoj kiujn li desegnis estis eĉ pli aĉaj ol antaŭe, se tio eblas.

“Nu, hazarde, unu tagon, dum mi vagis en la kamparo ekster la vilaĝo, mi renkontis eksterordinare orgojlan spanielon. Li preterpasis min kun la nazo suprenturnita en la aero laŭ tiom aroganta maniero ke mi diris al li: ‘kial vi tiom fieregas?’

“‘Mia mastro ricevis mendon pentri la portreton de princo,’ li diris, eĉ pli orgojle.

“‘Kiu estas via mastro?’ mi demandis. ‘Laŭ via mieno, oni



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

supozus ke vi mem pentros la portreton.'

“‘Mia mastro estas tre fama artisto,’ diris li.

“‘Kiel li nomiĝas?’ mi demandis.

“‘Georgo Morlando,’ diris la spaniolo.

“‘Georgo Morlando!’ mi kriis. ‘Ĉu li estas ĉiloke nun?’

“‘Jes,’ diris la spaniolo. ‘Ni loĝas ĉe la hotelo *Reĝo Georgo*. Mia mastro pentras bildojn pri la pejzaĝo kaj post semajno li reiros al Londono por komenci la portreton de la princo.’

“‘Nu, oportune mi estis renkontinta tiun Georgon Morlandon, kiu estis, kaj ankoraŭ estas, eble la plej fama pentristo de kultivistecaj bildoj kiujn iam vidis la mondo. Min fierigas povi diri ke mi konis lin. Li estis precipe lerta pri pentrado de ĉevaloj en ĉevalejoj, porkoj en porkejoj, virkoko kaj hundoj apud kuirejpordejoj, kaj tiaĵoj.

“‘Do, sen lasi la spanielon rimarki ke mi sekvas lin, mi sekvis lin por vidi kien li iras.

“‘Li kondukis min al soleca kultivkampoj en la montetaro. Kaj tie, kaŝinte min en iuj arbustoj, mi rigardis la grandan Morlandon pendi unu el siaj famaj kultivoscenoj.

“‘Baldaŭ li demetis sian pentropenikon kaj murmuris al si: ‘Mi bezonas hundon — apud la trogo tie — por fini ĉi tiun bildon. Ĉu eble mi povus devigi tiun stultan spanielon kuŝi senmove dum kvin minutoj? ... Venu, Makul’, Makul’! Venu ĉi tien!’

“‘Lia spaniolo, Makul’, venis al li. Kaj Georgo, lasinte sian pentraĵon dum momento, metis la spanielon apud la trogon, kaj glatigis lin, kaj ordonis ne moviĝi. Mi komprenis ke Georgo planas ke li aspektu kvazaŭ dormanta en la sunlumo. Georgo amegis pendi bestojn dormantajn en la sunlumo.

“‘Nu tiu stultega spaniolo ne restis senmova eĉ dum momentaro. Unue, li penis kapti la muŝojn kiuj mordis lian voston; poste li gratadis sian oreton, poste li bojadis kontraŭ la kato — neniam kvieti. Kaj kompreneble, Georgo tial tute ne povis pendi lin, kaj fine li tiom koleriĝis ke li ĵetis la pentro-bruson kontraŭ lin.

“‘Tiam min trafis ideo — unu el la plej bonaj ideoj kiujn mi iam havis. Mi eliris el la arbustaro kaj trotis al Georgo, skuetante mian voston. Kaj kiom mi fieriĝis kiam la granda Morlando rekonis min! Ĉar, sciu, li renkontis min nur unufoje antaŭ tiam — en la aŭtuno de 1802.

“‘Ho, estas Jipo!’ li kriis. ‘Bona hundo. Venu ĉi tien. Ĝuste vi estas kiun mi deziras’


“‘Post tio, dum li kunmetis la aĵojn kiujn li estis ĵetinta kontraŭ la spanielon, li plu parolis al mi — same kiel homoj ja parolas al hundoj, komprenu. Kompreneble, li ne supozis ke mi komprenos kion li diras, sed mi ja komprenis — ĉiun vorton.

“‘Mi volas ke vi venu ĉi tien apud la trogon, Jipo,’ diris li. ‘Via sola tasko estos kuŝi senmove. Vi rajtos dormi, se vi deziras. Sed ne movu vin nek eĉ movetu min, dum dek minutoj. Ĉu vi kredas povi fari tion?’

“‘Kaj li kondukis min al la trogo, kie mi kuŝiĝis kaj restis tute senmove dum mi pentris min en la bildon. Tiu bildo nun videblas en la Nacia Galerio. Ĝi nomiĝas *Vespero ĉe la kultivejo*. Centoj da homoj rigardas ĝin ĉiujare. Sed neniu el ili scias ke la elegantaspekta hundo formanta apud la trovo estas mi mem — nu, la Doktoro scias, mi gvidis lin rigardi ĝin, unu tagon, kiam ni butikumis en Londono.

“‘Nu, jen, kiel mi jam diris, min trafis ideo dum ĉio ĉi. Mi esperis ke se mi faros ion por Georgo Morlando, eble li bonvolos fari ion por mi. Sed kompreneble, ĉar li ne komprenis hundan lingvaĵon, estis iom malfacile komprenigi lin. Tamen, dum li pakis siajn pentrilojn mi ekmalaperis dum kelka tempo, tute kvazaŭ mi foriras. Post tio mi revenis kurante al li tre ekscitite, bojante, penante montri al li ke io misas, kaj ke mi volas ke li sekvu min.

“‘Kio misas, Jipo?’ diris li. ‘Ĉu la domo brulas, aŭ io alia okazas?’



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

“Do mi plu bojis kaj kuris iomete cele la vilaĝon, retrorigardante lin por montri al li ke mi volas ke li akompanu min.

“‘Kio ĝenas la hundon?’ li murmuris al si. ‘Nepre neniu dronas, ĉar mankas rivero proksima. ... Nu, bone, Jipo. Mi venos. Atendu sekundon dum mi purigos ĉi penikojn.’

“Do mi gvidis lin en la vilaĝon. Survoje tien fojfoje li diris al si: ‘Kio povas esti misa? Io misas, nepre, alie la hundo ne tiom maltrankvilus.

“Mi gvidis lin laŭ la ĉefa strato de la vilaĝo ĝis ni venis al la loko kie la almozetanto havis siajn bildojn. Tuj kiam Georgo vidis la bildojn li *sciis* kio misas.

“‘La ĉielo nin gardu!’ li kriis. ‘Kia fuŝa montraĵo! Ne mirigas ke la hundo estis ekscitita.’

“Nu, hazarde, dum ni proksimiĝis, la unukrura almozetanto, kun la propra hundo apud li, prilaboris novan desegnaĵon. Li sidis sur la pavimo, farante per kredo sur kanvaso bildon de kato trinkanta lakton. Nu, mia ideo estis ke la granda Morlando — kiu, malgraŭ kion oni diras pri li, estis ĉiam tre bonkora viro — faros kelkajn bonajn bildojn kiujn la almozetanto povos montradi, anstataŭ la aĉajn fuŝaĵojn kiujn li mem faris. Kaj mia plano sukcesis.

“‘Je la homaro!’ diris Georgo, indikante la bildon kiun faras la almozetanto, ‘la spino de kato ne kurbiĝas tiel — jen, donu al mi la katon kaj mi mem pentru ĝin.’

“Kaj, elviŝinte la tutan bildon, Georgo Morlando redesegnis ĝin siamaniere. Kaj ĝi estis tiom vivaspekta ke oni preskaŭ povis aŭdi la katon lekadi la lakton.

“‘Jadi! Se nur mi mem povus desegni tiel,’ diris la almozetanto. ‘Kaj tiom rapide kaj facile vi desegnas — kvazaŭ tute ne necesas peno.’

“‘Nu, por mi estas facile,’ diris Georgo. ‘Eble ĝi ne tiom meritas, pro tio. Sed, diru al mi, ĉu vi gajnas multe de mono per ĉi tiu laboro?’

“‘Malmultege,’ diris la almozetanto. ‘Mi ricevis nur du pencojn dum la tuta tago. Mi supozas ke, verdire, mi ne sufiĉe bone desegnas.’

“Mi rigardis la vizaĝon de Morlando dum la almozetanto diris tion. Kaj la esprimo sur ĝi informis min ke mi ne vane venigis ĉi tien la grandulon.

“‘Jen, vidu,’ li diris al la almozetanto. ‘Ĉu plaĉus al vi se mi redesegnus ĉiujn viajn bildojn por vi? Kompreneble, vi ne povus vendi la bildojn desegnitajn sur la pavimo, sed ni povos defroti ilin. Kaj mi havas en mia valizo kelkajn ekstrajn kanvasojn. Eble vi povos vendi kelkajn. Mi povas vendi bildojn en London ĉiutage. Sed antaŭ nun mi neniam estis pavimartisto. Estus iom petole trovi kio okazos.’

“Do Morlando, tre vigle kaj ekscitite, kvazaŭ lernejinfano, prenis la kalkajn bildojn de la almozetanto de la muro kaj, frotpuriginte ilin, redesegnis ilin laŭĝuste. Li tiom okupis sin per tio ke li ne rimarkis ke granda amaso da homoj algrupiĝas, rigardante. Liaj verkoj estis tiel lertaj ke la homoj estis sorĉitaj de la belo de la katoj kaj hundoj kaj bovinoj kaj ĉevaloj kiujn li desegnis. Kaj ili komencis flustre demandi inter si, kiu estas tiu nekonato kiu desegnas por la pavimartisto?

“La homamaso konstante pligrandiĝis. Kaj baldaŭ unu el la homoj jam antaŭe vidinta la bildojn de Morlando rekonis la laboron de la granda artisto. Kaj tiam flustroj trairis la homamason — ‘Jen Morlando — la granda Morlando mem.’ Kaj iu iris informi bildovendiston, kiu havas butikon en la Alta Strato, ke Georgo Morlando desegnas en la bazaro por lama almozetanto.

“Kaj la vendisto venis. Kaj la vilaĝestro venis — kaj ĉiuj riĉuloj kaj malriĉuloj. Do, kiam la tuta vilaĝanaro estis grupiĝinta tie, oni komencis proponi aĉeti la bildojn, demandante al la almozetanto kiom da mono li volas por ili. La maljuna fuŝulo pensis vendi ilin po ses pencoj, sed Morlando flustris al li:

“Dudek du pundojn — neniun el ili vendu por malpli ol dudek du pundoj. Oni pagos tiom.’

“Kaj tutvere, la vendisto kaj kelkaj el la pli riĉaj vilaĝanoj aĉetis ĉiujn bildojn po dudek du pundoj.

“Kaj kiam mi hejmeniris tiunokte mi sentis ke mi faris bonan tagon da laboro. Ĉar la mastro de mia amiko, la unu-krura almozpetano, estis nun sufiĉe riĉa por vivi komforte dum la tuta cetero de sia vivo.”

Ĉiuj bestoj nun estis rakontintaj escepte de Tu-Tuo, la strigo, kaj la puŝu-min-tiru-vio. Kaj la sekvan nokton, vendredon, oni interkonsentis rapide rotaciigi moneron (la pencon de la Doktoro, en kiu estis truo) por decidi kiu el tiuj du rakontu. Se la monero surtabliĝos kapsupre, rakontu la puŝu-min-tiru-vio, kaj se kapsube, rakontu Tu-Tuo.

La Doktoro rotaciigis la pencon, kaj ĝi haltis kapsube.

“Bone,” diris Tu-tuo. “Do mi supozas ke mi devas rakonti. Mi rakontos al vi pri la fojo — la sola fojo en mia tuta vivo — kiam oni kredis min Feo. Imagu min feo!” ridis la malgranda ronda strigo. “Nu, okazis tiel: Dum oktobra tago, ĉirkaŭ la vespero, mi vagadis tra la arbaro. Estis vintra gusto en la aero kaj la malgrandaj felkovritaj bestoj okupadis sin inter la sekaj susurantaj folioj kolektante nuksojn kaj semojn por konservi ilin kiel manĝaĵon uzeblan kiam venos la neĝo. Mi mem serĉis sorikojn — frandaĵon kiun mi multe amis tiutempe — kaj dum ili okupadis sin furaĝe estis facile ĉaskapti ilin.

“Dum mia veturo tra la arbaro mi aŭdis la voĉojn de infanoj kaj la bojadon de hundo. Kutime mi plu forirus en la arbaron, for de tiaj sonoj. Sed dum mia juneco mi estis scivolema birdo kaj mia scivolemo ofte kondukis min al aventuroj. Do, anstataŭ forflugi, mi iris en la direkto de la bruoj kiujn mi aŭdis, moviĝante zorge de arbo al arbo, por ke mi povu vidi sen esti vidata.

“Baldaŭ mi trovis infanpiknikon — pluraj geknaboj vespermanĝis en kverka bosko. Unu knabo, multe pli granda ol la ceteraj, turmentetadis hundon. Kaj du aliaj infanoj, malgranda knabino kaj malgranda knabo, plendis pro lia krueleco kaj petetis lin ĉesigi ĝin. La tiraneto rifuzis ĉesi. Kaj baldaŭ la malgrandaj knabo kaj knabino ekatakis lin per siaj pugnoj kaj piedoj kaj forte batadis lin — kio surprizegis lin. La hundo fuĝis hejmen kaj baldaŭ la malgrandaj knabo kaj knabino — mi baldaŭ trovis ke ili estas gefratoj—forvadis de la cetera piknikanta



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

grupo serĉante agarikojn.

“Mi admiris ilian kuraĝon puni knabon tiom pli grandan ol ili mem. Kaj kiam ili solaj forvadis, denove pro scivolemo mi sekvis ilin. Nu, ili longadistance marŝis, kiam oni pripensas ilian malgrandecon. Kaj baldaŭ la suno subiris kaj mallumo komencis rampi sur la arbaron.

“Tiam la infanoj ekpensis reiri al siaj amikoj, kaj komencis retroiri. Sed, estante nesper-taj arbaristoj, ili erardirekte iris. Eĉ pli senlumiĝis, kompreneble, dum la paso de tempo, kaj baldaŭ la infanoj falis kaj stumblis pro radikoj kiujn ili ne povis vidi kaj fariĝis plene perditaj kaj lacaj.

“Tutdume mi sekrete kaj senbrue sekvis ilin super iliaj kapoj. Fine la infanoj sidiĝis kaj la malgranda knabino diris:

“‘Vilĉjo, ni estas perditaj! Kion do ni faru? La nokto venas kaj mi *timegas* la mallumon.’

“‘Ankaŭ mi,’ diris la knabo. ‘Ekde kiam Onklino Eminjo rakontis al ni tiu timigan rakonton pri la “Koboldo en la ŝranko” mi morte timegas la mallumon.’

“Nu, eblus batfaliĝi min per plumo! Kompreneble, vi devas konscii ke neniam antaŭe mi aŭdis pri timo je la mallumo. Verŝajne ŝajnas ridinde al vi, sed al mi, kiu ĉiam preferis la malvarmegan trankvilan mallumon kontraŭ la brilegoplana ordinara taglumo, tiam ŝajnis al mi preskaŭ nekredeble ke iu povus timi nur ĉar la suno enlitiĝis.

“Nu, iuj missupozas ke vespertoj kaj strigoj povas vidi en la mallumo ĉar ni havas kurozan specon de okuloj. Tio estas falsa. Kuriozajn orelojn ni ja havas — sed ne okulojn. Ni povas vidi en la mallumo ĉar ni praktikadas tion. Temas nur pri praktikado — same kiel pianoludado, kaj ĉio alia. Ni ellitiĝas kiam aliuloj enlitiĝas, kaj enlitiĝas kiam aliuloj ellitiĝas, ĉar ni preferas la mallumon; kaj vi mirus kiom pli plaĉe estas, kiam oni kutimiĝas al ĝi. Kompreneble, ni strigoj estas specife trejnataj de niaj gepatroj jam kiel junuloj vidi dum tre mallumaj noktoj. Do estas pli facile por ni. Sed ĉiu ajn povas — almenaŭ



LA POŝTO DE DOKTORO DOLITTLE

iom — se ili praktikadis.

“Nu, plu pri la infanoj: Jen ili tute maltrankvilaj kaj malkvietaj kaj timoplenaj, sidantaj sur la tero, plorantaj kaj malcertaj kion fari. Tiam, ekmemorante la hundon, kaj sciante ke ili amas bestojn, mi pensis peni helpi ilin. Do mi translugis al la arbo super iliaj kapoj kaj diris per plej afabla, plej milda voĉo, ‘Tu-vit, Tu-vu!’ kio en la striga lingvo, kiel vi scias, signifas ‘Estas bela nokto! Kiel vi fartas?’

“Nu, se vi nur povus vidi kiel tiuj povraj infanoj eksaltis!

“‘Uĥ! diras la malgranda knabino, krocante sin al la kolo de sia frato. ‘Kio estis? Ĉu fantomo?’

“‘Mi ne scias,’ diris la malgranda knabo. ‘Ve, mi timegas! La mallumo estas terura, ĉu ne?’

“Post tio mi unu-dufoje provis trankviligi ilin, afable parolante al ili per la striga lingvo. Sed ili nur konstante pli timis. Unue ili kredis min koboldo; poste, ogro; poste arbara giganto — mi, kiun ili povus porti en la poŝto! Estas nekredeble kiom stultege la homoj edukas siajn infanojn! Se ja ekzistas fantomo aŭ giganto aŭ ogro — ĉu en la arbaro, ĉu ekster ĝi — nu, neniam mi vidis ion tian.

“Nu, post tio mi pensis ke se mi foriros tra la arbaro tu-vitante kaj tu-huante tutdume, ili sekvos min kaj mi povos gvidi ilin al ilia hejmo. Do mi provis tion. Sed ili ne sekvis min, la stultaj uletoj — kredante min sorĉistino aŭ iu fiaĉaĵo tia. Kaj la sola rezulto de mia tu-vitado kaj tu-huado tra la tuta arbaro estis ke vekiĝis alia strigo tre malproksima, kredante ke mi vokas al li.

“Do, ĉar mi malsukcesis pri la infanoj, mi foriris renkonti tiun alian strigon por trovi ĉu li povas proponi ion fareblan. Mi trovis lin sidanta sur la stumpo de kava betulo, frotanta la okulojn, ĵus vekiĝinta.

“‘Bonan vesperon,’ diras mi, ‘Estas bela nokto!’

“‘Jes,’ diras li, ‘sed ne estas sufiĉe mallume. Kial vi ĵus faris tiom da bruego tie?’